


VALO



...el la karra
infameco



SAT-Brosurservo
1983

VALO

... EL LA KARA INFANECO

Ha, kredeble rememoro
El la kara infaneco ?...

L.L. Zamenhof.

(Mia penso)

"Laŭte!" * Cercle espérantiste de l'Agenais

F 47340 Laroque Timbaut

1983 * 12 FF

Neologismoj ne difinitaj en PV kun suplemento kaj fremdaj vortoj estas aŭ klarigitaj en la teksto mem, aŭ alfabete listigitaj en fina glosaro.

Averto

La vinjeto de la Literatura Komitato de SAT ne signifas, ke ĉiuj komitatanoj konsentas pri la uzado de "ci". Kelkaj eĉ absolute malaprobas ĝin. Tamen, ĉar "ci" ne estas kontraŭfundamenta, la aŭtoro persistis pri tiu uzado, sub sia persona respondeco.

Korektendoj

paĝo 23,	lasta linio	kja → kaj
28,	linio 26	homaj vivoj → viroj*
49	16	unu el liaj amikoj → iliaj
64	- 9	filozofa → filozofia
69	5	"Tabo" → "Tabo"
86	7	regalis min → nin

paĝo 33, ekde linio 18, mankas :

(ĝis la) hejma domo, kaj li gajnis. Alian fojon la sentima knabeto grimpis per la pluvakvaj tuboj ĉe la domfasado (ĝis la tria etaĝo).

Aldonendoj

paĝo 13, linio 4. Post "ombrelon". La nizo refermas siajn ungegojn sur sian predon.

paĝo 80 (4) linio 10. Post "avelojn" : mirtelojn.

paĝo 28, linio 26 : bova kaj homaj viroj* . Aldoni jenan piednoton :

* En la lastaj jardekoj, ankaŭ pluraj junaj virinoj, en torera kostumo kun spado en la mano, ne timis alfronti la danĝeran virbovon.



Mi ŝuldas dankojn al jenaj personoj, kiuj tiel
afable bonvolis kritike legi mian manuskripton,
kaj helpis min per altvaloraj konsiloj :

F-ino Gudrun Riisberg en Aarhus,
S-ro L. Sjøgaard-Hansen en Viby,
S-ro L. Friis en Aabyhøj,
Gek-doj Denise kaj Henriko Castelló en Béziers,
K-dino Germaine Roux en Monflanquin, kiu, plie,
tre bone tajpis la tekston,
kaj kompreneble nia amiko Kribo.

Al la amatoj
forpasintaj, malaperintaj,
svenintaj aŭ dronintaj en spac- kaj tempnebulo,
mi dediĉas tiujn ĉi paĝojn.

Kial, en mia 75a jaro, mi eksentas la emon skribi
pri tiu malproksima tempo de mia infaneco ? Kiun povus
interesi

tiuj sensencaj babilaĵoj de kadukulo ?

tiuj sencelaj zigzagaj rakontoj ?

tiuj sensukaj remaĉitaĵoj ?

Kiun ja, krom mi sola ?

Krom mi, strebanta forviŝi la kruelan bildon
senkompate reflektatan de tro fidela spegulo,

Kaj vane serĉanta rifuĝon en la kompleza mis-
formigo, en la flata transfiguro de la rememoroj ?

Arbo maljuna, en malfrua aŭtuno...

Tra sia raspa ŝelo, sulkigita de faltoj kaj
cikatroj, ĝi antaŭsentas la baldaŭan froston.

Ĝi vidas siajn lastajn foliojn dise forfali.
Velkintaj, deŝiritaj, ili kirle flugas en la novembra
vento, ĝis ili sinkos sur la kotan teron.

Sed la forto de imago elvokas la freŝan helverdon
de ilia printempo, en dolĉaj sunradioj kaj milda
zefiro.

Ree suprenfluu la juna suko !

Renaskiĝu aprilaj floroj !

Resonu la ĝojkanto de gajaj birdetoj !

Reviviĝu la memoro

el la kara infaneco !

Prologo.

1900.

La jaro-ĉarniro, lasta el la 19a jarcento, sojlo de la 20a, tiel promesplena !

La tuta civilizita mondo turnas sian rigardon al Parizo, la brilega metropolo. Tie, ĉe la piedoj de la Eiffel-turo, floras la granda Universala Ekspozicio. La tuta civilizita mondo kredas pri senlima progreso kaj feliĉa estonteco.

En Aleso, la malgranda ĉefurbo de Ceveno, du viroj marŝas sur strato. La pli juna, tridekjara, iras al la urbodomo deklari unuenaskitan filon. Lin akompanas lia sepdekjara patro, fiera kaj ĝoja. Ankaŭ al ili tiu jaro ŝajnas promesplena.

La ĵusnaskito estas mi, la juna virò mia patro, la sepdekjarulo mia avo Stefano.

I - AVOJ KAJ AVINOJ.

1

1904.

Sidanta sur fotelo, avo Stefano faras por mi, el la kartono de skatolo, ludmodelon de ventmuelilo, kies aloj turniĝas helpe de inĝenia kapstano movata per ŝnureto.

La belvizaĝa maljunulo restis fidela al la romantika modo de sia juneco : longaj krispetaj haroj, kurbaĵoj, kvadrata tondita barbo, la tuto blanka kun restaĵoj de iama blondo, kaj ĉiam zorge kombita. Li estis frizisto por viroj kaj sinjorinoj.

La seĝo staras en angulo de meze vasta ĉambro, nomita manĝoĉambro - oni dirus nun vivejo. Fakte, nur en solenaj okazoj la familio tie manĝis ; kutime, simple en la sufiĉe granda kuirejo.

Super la fotelo, ĉe la muro, estas fiksita ligna

rako, en kiu vice ingiĝas ses pipoj el blanka argilo kun rekta tubo. Meze de la muro, kameno, en kiu dan-
cas gaja flamo : tie bruladas verdakverkaj ŝtipoj. Super ĝi tronas en nigra kadro gravuraĵo prezentanta en romantika stilo la venkon de Garibaldi kun siaj ruĝaĉemizuloj kontraŭ la Prusoj en la batalo apud Diĵono. Sub tiu majesta bildo diagonale pendas paro da dutubaj ĉaspaŝiloj.

Tia estas la ĉirkaŭaĵo, kiu restas stampita en mia memoro, nedisigeble de la bildo de mia kara avo, mir-
inde viva. Iam, ĉar mi portis ruĝajn ŝuojn kaj ŝtrump-
etojn, li nomis min Perdriketo ; de tiam li daŭre don-
adis al mi tiun karesan kromnomon.

1906. Venis periodo, eble monato, ĝi ŝajnis al mi
longa, dum kiu li restis en sia dormoĉambro, kaj mi
ne rajtis eniri.

Tiun tagon, la pordo silente malfermiĝas. Elvenas
mia onklo kaj mia patro, kun malgajega vizaĝo kaj ru-
ĝaj palpebroj. Ili refermas la pordon, kaj peze ek-
marŝas, ire kaj reire, kun la pugnoj malantaŭ la dorso
kaj la kapo klinita.

Venas mia patrino ; ŝi forkondukas min al nia pro-
pra hejmo. Mi konfuze sentas, ke okazis io nekutima.
Al demando de mi estas respondite, ke la avo por kelka
tempo forvojaĝis.

Du monatojn poste. Unu posttagmezon, mia patrino
kaj mi estas pretaj por vizito al amikino ŝia. Tuj el-
ironte, subite mi demandas pri la vojaĝanta avo. Mi
volas ekscii, kiam mi revidos lin. Komence la patrino
flanke respondas, sed miaj demandoj fariĝas pli kaj
pli rektaj, precizaj kaj urĝaj. Fine ŝi konfesas :
"Avo ne revenos ; li estas mortinta."

Ĉe tiuj vortoj min ekkaptis tia afliktiĝo, ĝi kaŭ-
zis tian plorkrizon, tiel longedaŭran, ke mia patrino
devis rezigni pri la projektita vizito, kaj resti por
konsoli min.

Ofte en mia vivo mi estis vidonta de pli proksime
la teruran vizaĝon de la morto ; sed tiu flanka ren-
konto unufoje sentigis al mi la konsternan efikon de
"neniam plu".

Dudek jarojn pli juna estis mia patrino avo.

Kiam li naskiĝis, en 1850, li ricevis kiel duan antaŭnomon tiun de Napoleono. Por la tiamaj progresemuloj, respublikanismo kaj bonapartismo ne tre nete distingigis. La nevo de la imperiestro, Luizo-Napoleono, facile estis elektita prezidento de la Dua Respubliko; tiom pli facile, ke li estis kompletinta kun radikalaj respublikanoj, inter la karbonaroj, kaj enkarcerigita. Sed baldaŭ, imite al la onklo, li siavice strangolis la malfortan respublikon, kaj sin proklamis imperiestro sub la nomo Napoleono IIIa. De tiam liaj ekskamaradoj lin forĵetis, kaj la francaj respublikanoj daŭre kompletadis kun la italaj karbonaroj ĝis la milito de 1870 kaj la malvenko en Sedano, kiu kaŭzis falon de la Dua Imperio.

En la jaroj 1866-70, la juna Albano-Napoleono partoprenis en tiu kaŝa movado. Tial li sin rigardis pli radikala ol lia pli aĝa bofrato. Inter ambaŭ okazis homerecaj disputoj en okcitana dialekto. "Vi, deklaris la pli juna, vi estas nura oportunisto!" Al kio la eksplodema maljunulo indigne ekkriis: "Ni!! kiuj faris Kvardek Ok!!!" (t.e. : la revolucio de 1848, kiu forpelis la lastan reĝon Luiz-Filipon).

Malgraŭ tiuj elokventaj skermoluktoj, ili ĉiam restis tre bonaj amikoj.

Mia patra avo estis protestanta. Lia familio venis de Cevenmonta vilaĝo. Li mem vivis sian tutan vivon en Aleso kaj edziĝis kun hugenotino el Anduzo. Mi reparolos pri tiuj du najbaraj urbetoj.

Ankaŭ la patrino avo estis ido de Cevenaj kalvinanoj. Li naskiĝis en Nimo, longe vivis en Provenco, kaj edziĝis kun katolika Arlezanino.

Tiaj "miksitaĵ" geedziĝoj ne estas maloftaj en nia regiono. Same mia patro, edukita en la kalvina religio, edziĝis kun la katolika filino de tiu dureligia paro. Ankaŭ mi, baptita kiel katoliko - sed ricevinta nenian religian edukadon - edziĝis kun protestantino.

Ceveno, lando de la Kamizardoj, kie antaŭ du jarcentoj furiozis en civila milito ambaŭflanka fanatiko,

poste vidis la du popolpartojn kunvivadi en paco. Oni ankoraŭ ne parolis pri ekumenismo, sed iom post iom progresis toleremo kaj reciproka estimo.

En la fino de sia naŭdekjara vivo, mia patrino avo loĝis en vilaĝo, kie vivis ankaŭ du parencaj familioj, unu katolika, alia protestanta. Kun ili alterne, li ĉiudimanĉe vizitadis la diservojn, jen en la kirko*, jen en la templo*. Tiu sendiulo komplezeme aŭskultis la predikojn de unu kaj alia pastroj, kaj li senpartie konkludis : "Nu, ili ja ne konsilas malbonfari..."

4

Avo Albeno estis kondukisto de lokomotivoj. Kiel lia patro kaj lia bopatro, kiuj apartenis al la unua generacio de laboristoj en tiu metio.

Mia infaneco estis lulita per rakontoj pri tiuj fabelaj maŝinoj, kiuj ricevis individuajn nomojn, kiel amataj bestoj aŭ personoj.

Certe tial, mi, juna inĝeniero, nepre volis miavice labori sur lokomotivoj. Mi hejtis kaj kondukis maŝinojn trenantajn vagonarojn. En la sekvo de mia kariero, variaj cirkonstancoj forigis min de la fervojo. Mi pasis tra diversaj industriaj fakoj, sendube interesaj - tamen mi ĉiam konservis nostalgion al mia unua metio. Ankoraŭ nun, kiam ĉe stacidoma kajo mi vidas kaj aŭdas la efektan alvenon de longa rapidtrajno, mi ne povas defendi min kontraŭ bedaŭrosento kaj emocio.

Bela metio estas tiu. Dum la hejtisto, per lerte svingata ŝovelilo, ĵetas nigran karbon en la blankruĝan faŭkon, la maŝinestro, al ĉio atenta, regulas kaj taŭge variigas, laŭ la profilo de la vojo, vaporpremon kaj rapidon. La ŝtala bestego brue kuras sur la reloj, kraĉante blankan vaporon kaj grizan fumon. Vi sentas ĝin vivi sub viaj piedoj, kaj ĝia vibrado trakuras vian tutan korpon. Vi aŭdas ĝiajn knarojn, siblojn, ĝemojn, kaj komprenas ilian signifon. Vi partoprenas en ĝia spirado, kaj scias, en ĉiu sekundo,

* en Geveno, oni rezervas la nomon kirko al la katolika preĝejo, kaj la nomon templo al la protestanta.

kion vi devas fari. La maŝino, kvazaŭ rajdobesto, obeme respondas al ĉiu gesto de sia rajdanto ; sed tiu ĉi devas zorgi, ke li ne perfortu ĝin. Inter ambaŭ kreiĝas harmonia simbiozo. La estro kaj lia kunulo ĉiam agu kun firma kaj milda aŭtoritato.

Dume, la homo devas senĉese atenti pri la vojo, sur kiu kuras lia trajno kun siaj mortdanĝeraj rapido kaj inercia maso. Mi revidas, en nigra nokto, la malgrandajn lumojn verdajn aŭ ruĝajn, amikajn signalojn, al kiuj nepre necesas obei. Kaj kiel mi devis akriĝi mian vidkapablon, kiam ili apenaŭ videbliĝis tra griza nebulo aŭ blanka neĝtempesto !

Tiam la kondukisto kaj lia helpanto plene konscias pri sia respondeco. Malantaŭ ili, laŭlonge de la ruliĝanta vagonaro, centoj da homoj trankvile sidas aŭ kuŝas; ili senzorge legas, babilas, dormas, aŭ distre rigardas la glitantan pejzaĝon ; ili konfidis al tiu vira duosian vivon, eventuale la vivon de siaj infanoj, kaj ne timas.

Certiginte ilian sekuran kaj ĝustatempan alvenon al la etapo, la du kunuloj ne tuj ĝuas ripozon. Kiel bona rajdisto unue zorgas pri sia ĉevalo, ili vartas kaj flegas sian maŝinon, ĝin purigas kaj lubrikas. Inter ili kaj ĝi estas vera amrilato. Oni preskaŭ prave diras, ke lokomotivisto pli volonte pruntedonus sian edzinon ol sian maŝinon.

Vira metio, ja, kaj tiuj viroj ne havas facilan karakteron.

Mia avo rakontas :

"Kiel juna lokomotivestro, mi estis unu tagon revizata de ĉefmaŝinisto : altgrada, tre sperta lokomotivisto, komisiita por de tempo al tempo kunveturi, cele kontroli la laboron kaj la profesion kapablon de hejtistoj kaj kondukistoj, ilin noti kaj eventuale promociigi.

"Inter la aferoj, kiujn priatenti devas la maŝinestro, estas la niveltubo : vitrotubeto, tra du kranoj komunikanta kun la kaldronego kaj indikanta la nivelon de la akvo en ĝi. Por tio, kompreneble, necesas, ke la kranoj estu malfermitaj.

"Nu, mi konstatis, ke la ĉefmaŝinisto kaŝe fermis ilin. Sen ion diri, mi remalfermas.

"Dua kaŝa fermo. Dua silenta remalfermo. Kaj triafoja fermo.

"Tiam mi ekkaptis martelon, kaj senvorte frakasis la tubon.

"Tiu gesto ja meritis punsankcion. La ĉefo juste ĝin aplikis. Sed samtempe, kun forta manpremo, li diris al mi sian estimon."

Tiaj estas la lokomotivistoj.

Multajn anekdotojn mi povus ankoraŭ rakonti, aŭ el ava, aŭ el propra sperto.

Pri maŝinoj kaj maŝinistoj mi estus neelĉerpebla babilfonto.

5

En 1906, ankoraŭ ne maljuna, mia avo emeritiĝis ; tamen li ne tute forlasis sian metion.

Ĉiujare, dum kelkaj semajnoj, li iris en Kamargajn bienojn por la "submergado".

Grandflukvantaj pumpiloj, ĉerpantaj el Rodano, kovras per akvotavolo la vitkampojn ĉirkaŭbaritajn per teraj digetoj. La stagnanta akvo enfiltriĝas tra la laguna tero kaj sensaligas ĝin. Post konvena tempo, oni malfermas kluzetojn, kaj la restanta akvo refluas al Rodano. La pumpiloj estis movataj per fiksaĵaj vapor-maŝinoj, ĉar elektra energio ankoraŭ ne disvastiĝis.

Tie la eks-lokomotivestro retrovis kaldronegojn kaj cilindrojn, piŝtojn kaj kuplostangojn, lagrojn kaj kusinetojn, regulatoron, ktp. En tiu etoso li vivis feliĉa, en ege simpla komforto, en longa soleco taga kiel nokta, interrompata de maloftaj vizitoj. Tamen, kiel ni vidos, li ne malamis kompanion : sed tiuj mond-apartiĝoj, kun la maŝino kiel sola kunvivanto, estis al li kiel medit-tempoj al monakoj.

6

Inter libertempaj kromokupoj, li aparte amis fiŝ-kaptadon, precipe per "nizo". Tio estas ronda reto de proksimume dumetra diametro, ligita en sia centro al fortika ŝnureto kaj borderita per multaj globetoj el plumbo. Oni arte aranĝas la falditan reton sur la maldekstra ŝultro, kaj, starante sur la riverbordo aŭ sur boato, oni vigle ĵetas ĝin per la dekstra brako, retenante enmane la ekstremaĵon de la ŝnuro. Tion oni nomas

"sendi la nizon", ĉar la reto, etendiĝante en perfekta cirklo, ŝvebas kiel rabobirdo antaŭ ol fali horizontale sur la akvosurfacon. Tiam la pezo de la plumbaĵetoj fermas ĝin kiel ombrelon. Sufiĉas tiri per la ŝnuro por venigi al si la fermitan reton, ofte plenan de kaptitaj fiŝoj.

Largâ, harmonia estas la svingogesto de la fiŝisto. Apud li, la juna nepo konfuze admiras. Li gapas en streĉa atento, kiam la viro, antaŭen klinita, malmergas la reton pezan kaj ŝvelintan, en kiu svingetiĝas la brila kaptajo : dikaj karpoj, longaj ezokoj, bramoj, perkoj, tinkoj kaj aliaj. Ni hejmen revenis, fieraj, kun peza ŝargô.

7

Post la gloro de la fiŝkaptisto sekvis tiu de la kuiristino. Mia arleza avino konis multajn receptojn por riveraj aŭ maraj fiŝaĵoj. Unu el ŝiaj triumfoj estis la "bujabajso" : ŝi estis loĝinta sufiĉe longe en Marsejlo, la lulejo de tiu grandioza specialaĵo, konsistanta el plurspecaj rokmaraj fiŝoj boligataj, naĝantaj en altgusta saŭco kun safrano, pipro, papriko kaj aliaj spicoj. Ŝi ne malpli sukcesis pri angiloj, karmo en vinsaŭco, kc. Ŝi ankaŭ sciis kiel neniu prepari sovaĝan kuniklon kun timiano, aŭ turdojn kun junipero, aŭ... aŭ... mi ne finus. Kiam ni ŝin vizitis, ni antaŭsciis, ke ŝi regalos nin per luksaj manĝaĵoj... Inter krampoj el ploroj : ĉar ĉe nia alveno ŝi ploris pro ĝojo, kaj pro ĉagreno ĉe nia foriro.

Tiam ŝia edzo ŝin vire mokis - sed ...

8

...Sed li estis ne malpli sentimentala kaj emociiĝema.

La unuan fojon, kiam li estis vokita al telefonoficejo por komuniko de mia patro, li revenis kun la vangoj malsekaj de larmoj, kaj balbute konfesis : "Kiam mi aŭdis en tiu aparato la voĉon de Fernando parolanta de tiel malproksime, mi ricevis tian koruskuon, ke mi apenaŭ povis respondi. Kia mirinda invento!" Ĝi pli impresis al li ol, multajn jarojn poste, radio.

Dum la vivo de tiu homo el la vapor-eruo naskiĝis aliaj sensaciaj inventaĵoj : inter ili aviado, pli frue aŭtomobilo. Lia pliaĝa filo fariĝis aŭto-teknikisto, kaj direktis kiel vicmastro grandan garaĝon en Tunizo. Sed la patro neniam familiariĝis kun tiuj diablaj motoroj, laŭ li barbaraj en komparo kun la belaj, la karaj vapor-maŝinoj. Se li staris sur la mezo de larĝa ŝoseo, kaj mi avertis lin : "Atentu, avo : jen venas aŭto!", li trankvile respondis : "Ili ja vidas min!"

9

Mi revidas lin : altstatura, sangoriĉa, kun ruĝa vizaĝo, malgrandaj nigraj okuloj kun bore penetranta rigardo sub hirtaj brovoj. Sub la dika nazo, la buŝo enkadriĝas inter iom pendantaj lipharoj.

Li posedis stentoran voĉorganon. Unu nokton, dum ni ĉiuj dormis en la apartamento, kiel ĉiam neŝlosita, li neanoncote alvenis je la dua horo post noktomezo ; kaj ni en ĉiuj dormoĉambroj estis abrupte vekitaj de sonora voko : "Nu! oni do dormas unuj sen la aliaj, en tiu ĉi domo !"

Li estis dotita per sanaj dentoj, solida apetito kaj facila digesto. Al lia palato plaĉis ruĝa viando pli ol verdaj legomoj. En sia telero, ĉiun manĝaĵon li pipris nigra, dirante : "Pipro refreŝigas!"

Ĉiam rigide sobra en la laborhoroj, li eksterdeĵore tre aprecis alkoholaĵojn ; precipe tiun absintan aperitivon, kiu estis plej universala drinkaĵo de la francaj viroj. (Malpermesita ekde 1914, ĝi estis surogatita, sed ne vere anstataŭita, de hispanaj anizaĵoj kaj marsejlaj "pastis"oj, kun bazo de stelanizo (ilicio), malpli delikat-gusta).

Li volonte kantis drinkokanzonojn, en mirinde falsa tono. Tamen, neniam mi vidis lin ebria.

Li havis personajn parolturnojn. Li ne diris : unu kaj duono, sed : unu kaj la duono de alia. Pri iu altkreska, de pli ol 1,80 m, li diris : "li estas viro de unua staturo". Se ankoraŭ pli alta : "li estas pli granda ol homo!"

Babilema, li multe rakontis, miksante francan kaj provencan lingvojn, laŭ la momenta inspiro, ofte en

rabeleza stilo. Fojfoje mia avino, kiu tamen ne estis mem tre prudvorta, estis ŝokita, precipe en ĉeesto de infanoj, pro iu maldeca esprimo, kaj energie protestis. Mi vidas ŝin, kun flama rigardo, en tiuj vigle virtaj disputoj aŭ kvereloj. Tiam la viro, kun mokindulga rideto, flegme rimarkis, kiel objektivan konstaton : "Kiaj ni devas fariĝi!..." Tio signifis : "Vidu, jen ekzemplo de tio, kion faras el ni la maljuneco : tia oni nepre fariĝas maljuniĝante." Ŝerco tiom pli spica, ke lia edzino estis je kelkaj jaroj pli juna ol li.

Liaj mikslingvaj paroloj estis punktitaĵoj de sakraĵoj : Nom' de Dio! Fripono Dio! Parolante pri iu de li ne tre ŝatata, li facile honoris lin per la titolo "ido de putino".

Ĉar li ne malofte sin montris klaĉema, la edzino lin kvalifikis "lango de putino". De tio tamen ne konkludu, ke miaj geavoj estis krudaĉaj trivialuloj : tio estis simple ordinara parolmaniero de provencanoj. Oni konas la historion pri tiu marsejla maristo, kiu fervore preĝis al la statuo de la "Bona Patrino" en la fama alta preĝejo Nia Damo de la Gardo. Ĉar sunradio trafis en la okulon de la Jesu-infano surbrake portata de la Virgino, la preĝanto ricevis la impreson, ke la bebo strabas al li kun moka subridado. Li do svingas en direkto al ĝi minacan pugnon, kolere ekkriante : "Ne al ci mi parolas, infano de putino, sed al cia Sankta Patrino!"

10

Ne nur parole, ankaŭ age mia avo estis gaja homo. Kun kelkaj amikoj, li estis ĉiam preta por ŝercoj, petoloj, farsoj ; pri tio ili posedis inventeman kapablon.

Unu el iliaj inventoj - sed mi ne povas nomi ĝin ŝerco aŭ farso - kiel do ĝin nomi ? Nu, vi mem juĝu.

Mortis unu el la ĝoja bando. La amikoj kunvenis al lia domo por laŭtradicie tranokti en lia ĉambro.

Atendante la morgaŭan enĉerkigon, la mortinto kuŝas sur sia lito en ceremonia kostumo, sen ŝuoj, sed kun nigraj ŝtrumpetoj. La malsupra makzelo estas ferme tenata de granda pura naztuko nodita sur la verto kiel rubando de sukeraĵa Pask-ovo.

La kunuloj komencis sian gardadon en deca flustrado, emfaze resumante la multajn meritojn de la forpasinta kamarado. Iom post iom la konversacio glitetas al rememoroj pri la bonaj ŝercoj kaj farsoj, en kiuj li kun ili partoprenis.

Je noktomezo, ĉiam laŭkutime, oni portis al ili por manĝi kaj trinki. Suspirante ili sidiĝis ĉe la tablon, sed la koro ne partoprenas. Neniu emas al satiĝo, ĉiuj apenaŭ mordetas en la manĝaĵoj.

Unu diras : "Jen ni manĝas kaj trinkas, kaj li, povrulo..." Aliaj respondas : "Ĉu vi memoras, kia brava kunmanĝanto li estis ? Kia bona forko!" Tria aldonas : "Kaj kia sentima drinkanto, ĉiam preta por levi la kubuton!" Ĉiuj ĥore : "Ha! se li estus kun ni!..."

Tiu ideo rapide ĝermigas komunan inspiron. La sidantoj ekstaras, iras al la lito, tenere kaptas la kadavron sub la akseloj kaj la genuoj, kaj milde sidigas ĝin sur brakseĝon ĉe la tablo.

En tiu trankviliga ĉeesto, ĉiuj retrovis sian kutiman apetiton kaj konvene honoris la funebran festeton. Kiam la pladoj estis puraj kaj la boteloj malplenaj, ili resternis sur la liton la pasive kuncelebrintan kamaradon.

Kiu kuraĝus ilin riproĉi ?

11

La lokomotivisto, sperta kaj kompetenta en sia metio, ricevis nur tre limigitan ĝeneralan kulturon ; kompanse li posedis ne ordinaran kompren- kaj asimilkapablon, kaj grandan scivolemon. Tial kelkaj intelektuloj aprecis lian konversacion.

Unu el tiuj estis senatano D., kun kiu li konatiĝis okaze de bilardludo en Borso-kafejo. De tiu influhava eminentulo li ofte elpetis prebendojn aŭ postenojn por iuj meritplenaj malriĉuloj.

Iam la senatano demandis al li : "Sinjoro P., vi ĉiam pripetas min, mi devas konfesi, favore al interesindaj personoj. Sed kiam vi petos ion por vi mem ?

- Neniām."

En belaj vintraĵ matenoj, avo Albeno metis sur la stratrandon seĝon dorsapogitan al la muro de la dometo, flanke de la enirpordo. Tie sidante, sen ia survesto sur sia ĉemizo, li legis la lokan gazeton de la unua ĝis la lasta linio, inkluzive la reklamojn. Tio daŭris longe, ĉar li ne preterlasis unu vorton, kaj ofte interrompis la legadon por interŝanĝi impresojn kaj opiniojn kun konataj aŭ nekonataj pasantoj. Se iu diris : "Brr! estas malvarme : kiel vi povas tiel sidi senmove, vestita nur per pantalono kaj ĉemizo ?", li respondis : "Malvarme ? tute ne! Belega vetero. Al mi estas tre agrable."

Sed fine li eksentis sin ne tiel komforte. Li reeniris, kaj grumblis : "Nu! kion vi faras ĉi tie ? Ja frostas en tiu ĉi domo!" Kaj li komencis skrapi en la forno, aldoni karbon, pliardigi la fajron, kun sia sperto de hejtisto. Baldaŭ ĉiuj sufokiĝis pro varmego. Escepte de li, kiu kontente konstatis : "Nun, estas agrable varmete!"

Mi neniam vidis mian arlezan avinon en la tradicia loka kostumo. Ŝi portis ĝin en sia juneco, kaj mi bedaŭras, ke ŝi ne estis tiam fotita, ĉar laŭ onidiro ŝi estis bela arlezanino. Sed, ĉu ne pleonasmo ? La arlezaj knabinoj estas prave famaj pro sia beleco, heredita de la prapatrinoj el ambaŭ gentoj, helena kaj saracena.

Multaj estas brunaj, kun nigraj haroj, fajna senbrila haŭto, nigraj aŭ brunaj okuloj - jen fajre brilaj kiel tiuj de ciganino, jen oriente dolĉaj, velurmildaj kiel la rubando de la koketa kufeto. Brunaj kiel Artemisa, Salomea aŭ Fatma. Sed ankaŭ kelkaj blondaj kiel Afrodita, aŭ kiel, supozeble, tiu "Vénus d'Arles", kies marmora statuĉo, jam de tri jarcentoj, staras en ekzilo ĉe la Frankoj*, apud la Sejno-bordo. Rekte, arogantete staranta sur la verto, la konustrunka kufeto kun nigra velur-rubando reliefigas, kaj per kontrasto pliefektigas la oron de blondaj harfaskoj, la helon de bluaj, verdaj aŭ

* Frankoj : anoj de Germana tribaro, kiu invadis kaj konkeris Gallujon en la 5a j.c. (PIV). Uzata ĉi tie en la senco de Nord-Francoj, tradiciaj malamikoj, venkintoj de Okcitanio en la 13a j.c.

avelkoloraj okuloj. Mi memoras, kian impreson mi ricevis, en mia dek-kvinjara aĝo, de unua renkonto kun la dek-naŭjara edzino de onklo mia, arleze vestita, blonda kaj bela kiel madono de Filippo Lippi...

...Sed ni ne erarvagu. Ne temas tie ĉi pri blonda boonklineto, sed ja pri mia avino Aŭgustena, kiu apartenis al la bruna "raso". Malalta kaj maldika, ŝi dudekjara naskis sian unuan idon, mian patrinon; la morgaŭan matenon ŝi leviĝis kaj iris al la riverbordo lavi sian tukaron. Same ŝi refaris post ĉiu el tri pliaj akuŝoj.

14

Ŝi multe dorlotis min, kaj ofte vartis min dum semajnoj. En mia 4a jaro, ŝi trajne kunveturigis mian patrinon kaj min al Taraskono, najbara urbeto, por vizito al sia patrino kaj ties patrino - do mia prapraavino, preskaŭ centjara. Vidinte ilin nur tiun fondon, mi gardis en memoro iliajn mildajn trajtojn kaj afablajn voĉojn. Ili dolĉe parolis, en la melodia provenca dialekto, al la eta praido.

Neniam plu mi aŭdis pri ili, ne scias, kiam ili mortis: tial estas al mi, kvazaŭ ili estus senmortaj bonaj feinoj.

15

Avino Aŭgustena rakontis al mi pri rememoroj el sia juneco. Iam ŝi vidis pasi en kaleŝo imperiestron Napoleonon IIIan, kiun ŝi trovis brunhaŭta kaj malbela. Poste, en sia dek-sesa jaro, ŝi partoprenis en akcepto kaj flegado, en la Arleza stacidomo, de vunditaj soldatoj transportitaj el la batalejoj de la milito en 1870. Ŝi pentris impresajn mizerbildojn, kiuj revenis en mian memoron, kiam mi havis kun mia alia avino samteman konversacion (pri ĝi mi siatempe diros).

Ŝi rakontis ankaŭ pri pli frua tempo, kiam ŝi, juna orfino, estis vartata de du onkloj: maturetaj fraŭlinoj, kiuj, kvankam malriĉaj, frekventadis la aristokratan socion.

Tiu medio estis piege katolika, fervore monarkista kaj "legitimista": tio signifas, ke ili subtenis la

"legitimano" pretendanton al la trono de Francio. Tiu estis ido de la rekta Burbona branĉo, duko de Bordojo, grafo de Šambordo, kiun liaj partianoj jam nomis Henriko Va (sed li estis neniam reĝonta).

Kiam la du virgaj militantinoj sin preparis por vizito en aristokrata salono, ili en boneduka intenco admonis la nevineton :

"Se iu demandas, kiun koloron ci preferas, atentu (rondaj okuloj, teruret-afekta mieno) :

"ne endos diri : la ruĝon!... (serenigite, kun devota vizaĝesprimado kaj frandema lipopinĉo) :

"Ci diru : la blankon..."

" - Sed - impete rebatis la spitema bubino - sed ruĝo estas ja multe pli bela!"

Tiam ili, konsternite, kolerbleke :

"Aĉulineto!! (aŭtoritate, sen replikeblo) :

"Ci diros : LA BLANKON!!!"

16

Longe mi parolis pri miaj provencaj geavoj, malpli pri mia pli maljuna avo, ĉar mi nelonge konis lin. Pri lia edzino, mia avino Aliks', mi ankoraŭ nenion diris.

Mi konis ŝin precipe dum la kvin lastaj jaroj de ŝia vivo, kiam, vidviniĝinte, ŝi venis loĝi ĉe miaj gepatroj. Mi ĉiam vidis ŝin en nigraj vestoj, kun la kapo kovrita per nigra krespa kufo kun ondita rando ĉirkaŭ la frunto. Tia estis en Ceveno la kostumo ne nur de vidvinoj, sed de ĉiuj "maljunaj" virinoj, t.e. pli ol kvardekjaraj.

Sub tiu severa vesto, ŝi estis aminda maljunulino. Ŝi volonte ŝercis, kaj ŝi amis fari kun mi longajn damludajn batalojn. Ŝi sciis grandan kvanton da proverboj, enigmoj, anekdotoj, fabeloj kaj fabeloj, en franca lingvo kaj en okcitana. Ŝi diris ilin kun humuraj tonoj kaj mimikoj. Ekzemplo de enigmo : Granda kiel domo (olivarbo), eta kiel fingringo (olivo), amara kiel galo (olivo), dolĉa kiel mielo (oleo).

Ŝi rakontis rememorojn el sia juneco. Ŝi montris kamparanojn en dimanĉaj vestoj irantaj al la urbeto gaje planti sur placo la arbon de libero, kaj ŝi kantis iliajn kantojn. Ĉion tion mi mem jam longe parkerumis, sed neniam laciĝis reaŭdi.

Tiu ĉi avino estis, samkiel la alia, majstrino en kuirarto. Mi revidas ŝin prepari por la tuta familio "ajoli"-saŭcon aŭ "brandadon".

"Ajoli" estas speco de majonezo kun drasta ajlo-gusto. En tera pistujo oni miksas kaj pistas ajlo-bulb-erojn kun ovoflavo kaj olivoleo tre malrapide, etflue enverŝata. Tiel oni ricevas firman, bele flavan, fortik-odoran kaj -gustan akompanaĵon por boligitaj helikoj, gado aŭ sensaligita laberdano.

Ekzistas pluraĵ receptoj kun bazo de gado aŭ laberdano. Stranga ŝajnas la graveco de tiuj fiŝaĵoj en la sudlanda kuirarto, ĉar la mediteraneaj fiŝistoj ne kaptas moruojn. Sed la nordaj, el Manikaj havenoj, kiuj ĉasadas tiujn fiŝojn ĉirkaŭ Islando kaj Tero-Nova (Novlando), bezonas multe da salo por konservi sian kapt-aĵon. Tiun salon ili aĉetis de la mediteraneaj salmar-ĉoj, kaj venigis al si per platŝipoj sur la kanaloj tra tuta Francio. Tio necesigis iran aŭ reiran frajton, kiu konsistis tute nature el laberdano.

De tio venas interalie la suda "brandado", kaĉo el laberdana karno tre fajne dispremita, miksitita kun oliv-oleo, iom da lakto kaj iafoje aldono en malgranda pro-porcio de terpomoj, por ĝin malplipezigi. En grandfes-taj okazoj oni parfumas tiun blankan kaĉon per maldikaj nigraj trufranĉaĵoj.

Nun neniu plu preparas brandadon hejme. Ĝin produktas industriaĵ maŝinoj, kiuj jam ekzistis en mia infanaĝo ; de mia dormoĉambro mi aŭdis nokte la bruan funkciadon de unu el tiuj maŝinoj. Sed mia pacienca avino ĉiam faris mem brandadon, ne per pistilo, sed simple per forko : tio daŭris tutan matenon, sed la fina rezulto estis supersukcesa.

Miaj patraj geavoj posedis, tri kilometrojn for de la urbo, malgrandan farmobienon, kiun ni nomis La Vitejo. Ĝin kultivis farmisto, kiu ĉiuviintre buĉis grasan porkon. Tiukaze, li portis al ni sangokolbason kaj porciojn el la plej delikata karno : tion oni nomis "la donaco de l'porko".

La Vitejo konsistas el vinberkampeto kun kelkaj

olivarboj kaj migdalarboj. Seka grundo, kun multaj ŝtonoj, inter kiuj fosiliaj ekinoj, ovoformaj, glataj, kun kvinpetala desegno. Tie estas ankaŭ unu grandega ĉerizarbo, pluraj figuoj, persikuj kaj aliaj fruktarboj. Ĉirkaŭ puto kun pura malvarma akvo, bosketo da verdaj-kverkoj, kies foliaro estas tiel densa, ke en ĝia ombro eĉ tage kantas najtingalo. Apude, granda ŝtonamaso ; en ĝi libere nestas kunikla tribo.

Vintre ni kolektis inter la vitoj maldikajn sovaĝajn poreojn, nomitajn vitporeojn, kiuj, boligitaj, tre bon-gustas en salato.

Printempe kaj somere floras lilakoj, iridoj, levkojoj, lilioj, rozoj diverskoloraj kaj la bela ruĝa granatfloro. Frumatene, mi kun mia patro tien piediris. En la silento niaj paŝoj sonis sur la ŝtonoj. Fore aŭd-iĝis kelkaj kokerikoj.

Ni malfermas la grincantan ferpordegon kaj eniras en aleon. Sur la folioj perlas rosgutoj. La floroj malvolvas siajn nokte fermitajn korolojn kaj elspiras siajn parfumojn. Ni urĝe kolektas, kaj, antaŭ la malfermo de la lernejo, revenas kun brakplenoj da floroj, kiujn mia patro scios lerte aranĝi en artaj bukedoj. Granatflorojn ni plejofte lasis sur la arbedo, por ke maturiĝu la dolĉaj freŝaj fruktoj.

Sur tiu vojo mi revidas min ankaŭ kun mia avino en ĵaŭdo, kiu tiam estis feria tago por junaj gelernantoj. De la Vitejo aŭ de najbaraj farmoj ni reportis freŝajn ovojn, iafoje ankaŭ vivan kokidon.

Tiutempe ankoraŭ estis urba limimposto : oni devis pagi por importi ĉiajn manĝovarojn. Mi portis la kokidon kaŝitan sub mia granda pelerino el blunigra lano, kaj avino diris : "Se, ĝuste pasante ĉe la pagolimo, la kokido ekkrius..." Kaj, kiam ni trapasis antaŭ la budo, ŝi subite, imitante imagan doganiston, duonvoĉe krietis : "Kontrabandisto, haltu!" Mi tremetis pro plezura timo, kaj ni ambaŭ ridis.

19

Tiu avino loĝis kun ni ĝis sia morto, en mia dek-dua jaro.

Mi ofte vidis ŝin legi en sia dika familia biblio. Mia patro rakontis, ke en lia juneco la familio ĉiu-

vespere kunsidis ĉirkaŭ la kameno, kaj unu el la infanoj, laŭvice, laŭtlegis ĉapitron el la Libro. Ĝi estis la ĉefa legaĵo de la Cevenaj protestantoj ekde la 16a jarcento. Ĉar ne ekzistis traduko en okcitana idiomo, ili lernis la francan pere de tiu libro. Tial, eĉ en malgrandaj vilaĝoj kaj izolitaj farmodomoj, ili estis dulingvaj kaj parolis tre puran francan lingvon.

Simila fenomeno okazis en tuta Sudfrancio post la Revolucio, kiu finplenumis la nacian unuigon kaj starigis la devigan publikan instruadon. De tiam la franca lingvo estis instruita en ĉiuj unuagradaj lernejoj. Tiuj infanoj, kies hejma idiomo estis okcitana, lernis la francan kiel fremdan lingvon, kaj ĝin uzis, skribe kaj parole, kun granda gusteco - kvankam ili transigis en ĝin kelkajn dialektajn parolturnojn.

Do, mia avino konservis la prapatran kutimon. Sed ofte, dum ŝia legado, mi vidis malŝatan rideton flirti sur ŝiaj lipoj. Fojfoje, ŝi per seka gesto refermis la dikan libron, kaj mi aŭdis ŝin murmuri, balancante la kapon : "Kiom da stultaĵoj!..."

Tia estas, en aparte originalaj spiritoj, la natura evoluo de la protestanta penso. Komence, ĝi kontestas la oficialan interpreton de la teksto far la klerikaro, kaj pretendas kompreni ĝin senpere per propra inteligento, sed ĝi restas sankta nepridubebbla vero. Poste, iom post iom, la kritika ekzameno aplikiĝas al la teksto mem, tiel en la fundo kiel en la formo. Oni ĝin submetas al racia dubo kaj libera diskuto - kaj fine ĝin tute forĵetas. Tiel la evoluo, komencita en plej pura religia kredo, kondukas al ia filozofia diismo, al liberpenso aŭ al simpla ateismo.

20

Kiam mi estis naŭjara, mi ricevis en la lernejo patriotan edukadon, en kiu estis glorataj la militistaj virtoj kaj la herooj de la franca historio. Mi revis pri bataloj, kavaleriaj ŝtormatakoj, galopadoj kun svingataj sabroj, bravaj rajdantoj en belkoloraj uniformoj, brilaj kiraso kaj kaskoj, kaj pimpaj ornamaĵoj.

Neniam mi estis aŭdinta pri senperaj rememoroj de batalintoj. En 1870, mia unua avo estis kvardekjara kaj patro de du infanoj : tio sufiĉis, tiam, por ne parto-

preni militon. La alia, dudekjara fraŭlo, estis mobilizita kiel fervojisto, kaj servis malproksime de la batalkampoj.

Do mi vidis la militon nur tra la beliga prismo de patriotisma propagando, kaj mi vidis min kiel unu el tiuj heroaj batalantoj.

Iam mi vante bombastis pri tiu glora temo. Sed mia bona avino duŝis mian entuziasmon, mildavoĉe demandante : "Ĉu ci konscias, ke en bataloj oni povas ricevi terurajn batojn kaj vundojn, kaj mortigi homojn ?" Kaj ŝi elvokis frakasitajn kraniojn, tranĉitajn membrojn, truitajn brustojn kaj ventrojn. Ŝi diris pri la fetoro de putrantaj kadavroj de homoj kaj ĉevaloj, de disverŝita sango, pri la veoj kaj dolorkriegoj kaj la longa agonio, en teruraj suferoj kaj soifo, de mortvunditoj vokantaj sian patrinon.

Tiu realisma kontraŭflanko de la belega bildo draste impresis al mia infana sentemo. Ĝi memorigis al mi la rakontojn de mia alia avino pri la vunditoj de 1870, kiujn ŝi flegis en la Arleza stacidomo. Ĝi igis min profunde pripensi, kaj radike revizi miajn knabetajn antaŭjuĝojn.

De tiam mi abomenis la militon, kaj tre malvarmiĝis rilate al patriotismo. Mi ne havis komprenon nek informojn pri la veraj kaŭzoj de internaciaj konfliktoj ; mi ne sciis, ke ambaŭflankaj proletoj interbuĉadas pro la profito de ambaŭflankaj kapitalistoj ; sed mi konfuze ekvidis, ke ili estis logitaj al tiuj buĉoferoj per iluzioj, per la miraĝo de heroeco kaj gloro, kaj per la kredo kja amo al la sanga idolo Patrio.

II. ARLEZO-ĈE-RODANO.
PROVenco, KAMARGO.
TAŬROJ KAJ CIRKOLUDOJ.

1

Rektangula placo kun obelisko en la mezo. Maldekstre, la nuda fasado de arkeologia muzeo. Dekstre, la fama skulptita pordego de Sankta-Trofima preĝejo. En la fundo la urbodomo kun la "Viro el Bronzo" sur la belfrido.

Tra solena pordego oni eniras en vastan halon. Ĝin trapasante, oni iras tra fronta pordo al malantaŭa placeto. En la halo, kun mano en mano de sia avo, staras kvinjara knabeto, forte impresita de la majesta loko.

Dekstre, larĝa ŝtuparo el marmoro, flankita ĉe la bazo de du grandaj kuŝantaj leonoj, bele skulptitaj. La avo prenas min sub la akseloj, levas per siaj fortaj brakoj, kaj sidigas min rajde sur unu el ambaŭ sovaĝbestoj. Tio plezure fierigas min, kvankam mi ankoraŭ ne lernis la frazon: "Kiu kuraĝas rajdi sur leono?"*

En la blazono de Arlezo kiel en tiu de Liono, la leono kredeble simbolas la impetan fortegon de Rodano.

2

Kvin jarojn poste, en kanoto sur la riverego.

Fortika grizharulo kun knabeto, kiu, baraktante per grandaj pezaj remiloj, penas imiti lin kaj diligente sekvi liajn konsilojn. Ili remas kontraŭflue, tre proksime de la bordo: ĉar en la mezo, kun rapida fluo, ondoj kaj vorticoj, estus neeble.

Aliajn fojojn, ili faras trankvilajn promenadojn sur la senmova akvo de kanaloj inter verdaj bordoj, en la ebenaĵoj de Kraŭo kaj Kamargo. Agrablaj rememoroj.

3

Agrabla ankaŭ la dolĉa ombro en la ĝarden-promenejo "Lices" (Turnirejo), kie mi admiris belan skulptaĵon el

* Fundamento - Ekzercaro.

blanka marmoro : la malfeliĉa Nioba, vane penanta ŝirmi siajn infanojn kontraŭ la mortigaj sagoj de la senkompataj Apolono kaj Artemisa.

En tiu ĝardeno mi ofte ludis kun mia kuzo Antoneno. Ni kolektis karobo-guŝojn teren falintajn (kaj tretitajn - negrave!), kiujn ni frande maĉadis. Ni kuris sur la aleoj, kaj sur la kalkoŝtonaj ŝtupoj de la apuda antikva teatro.

Ni ludis ankaŭ sur la trankvila promenejo "Alyscamps", aleo inter sarkofagoj, restaĵo de antikva tre vasta tombejo el romia epoko. Tie estis entombigitaj multaj kadavroj transportitaj, per ŝipoj sur Rodano, de malproksimaj urboj kiel Orangô, Valenco, Vieno*, eĉ Liono.

Ni kaŝis nin en tiuj el la sarkofagoj, kiuj perdis sian ŝtonan kovrilon. Tiam avino kaj onklino diris : "La mortintoj venos vin kapti per la piedoj kaj sinkigi en la teron!" Terura minaco, kiu nur ridigis nin.

4

Miaj geavoj loĝis en la malnova kvartalo Roketo, apud la Rodan-kajo, kiu konsistas nur el duetaĝaj dometoj.

Ĉe la enirejo estis duobla pordo. Unue, plena ligna pordo, nokte ŝlosita, tage malfermita kaj turne alpuŝita kontraŭ la mur-eksteraĵo. Malantaŭ ĝi, demuntebla pordo en du ekzempleroj : unu por la vintro, kun vitroj, unu por la somero, kun ŝtalmaŝaj paneloj : tre fajnaj maŝoj el maldikega drato, por ne enlasi la moskitojn. Ankoraŭ malantaŭe pendas unu el tiuj kurtenoj el liberaj vertikalaj fadenoj provizitaj per globetoj aŭ cilindretoj el vitro aŭ alia materio, kiuj aŭdigas tintan brueton, kiam oni ilin trairas.

Tra tiu komplika enirejo oni penetras en komunan ĉambron, kun manĝotablo kaj telermeblo en la unua parto kaj kuirparto en la fundo. Tie estas kameno ĝenerale kun forno, lavoŝtono kun akvokrano, kaj mallarĝa fenestro, ankaŭ per maŝo provizita. En somero la ŝutroj estas duonfermitaj, kaj la krano lasas elfluadi maldikan akvofluon, en fontana susureto.

La eniranto, blindigita de la kontrasto inter la ekstera intensega sunlumo kaj la interna densa ombro, ricevas impreson, kvazaŭ li penetras en sepultan kelon. Sed tuĵ, el la fundo aŭdigas ordona voĉo : "La muŝoj!" (t.e.:

* Vieno en Francio, ĉe Rodano.

rapide refermu, ke ne kune envenu muŝoj!). Kelkaj tamen sukcesis enflugi, sed baldaŭ ili senpardone algluiĝos al mielpapera bendo pendanta de la plafono, ĉe kiu ili suferos longan zuman agonion.

Tiu muŝfobio estas unu el la aspektoj de la puremanio de la arlezaj mastrumantinoj. Ilia amo al pureco kontrastas kun la ĝenerala malzorgemo de la sudlandaj virinoj, kutime vivantaj en libera aero kaj sunlumo.

Ĝi manifestiĝas ankaŭ per la ĉiumatena rito de la balailo, per kiu ili, interbabilante, transŝovas de unu al alia la akvon de la strata defluilo antaŭ siaj pordoj. Ankaŭ per la kalkofarba sitelo kaj la dika peniko, kiujn ili uzas sabate por reblankigi siajn murojn, intere kaj ekstere, kaj eĉ la pordosojlon kaj la fenestrajn apogilojn.

De la unika teretaĝa ĉambro aŭ de apuda mallarĝa koridoro, rekta kruta ŝtuparo kondukas al la supra etaĝo, kie estas unu aŭ du dormoĉambroj.

Unu el tiuj dometoj, en kiuj sinsekve loĝis miaj geavoj, havis terasan tegmenton ombritan de vasta vitlaŭbo, kies dika trunko kreskis de la strata tero, tute ĉe la muro. Aŭtune, antaŭ ol la folioj ruĝiĝis, pendis tie longaj, dikaj, pezaj grapoloj el dolĉaj muskataj vinberoj.

Tamen, en tiuj domoj, ne ĉio estis tiel agrabla. En ili ekzistis nek ban- aŭ duŝoĉambro nek... necesejo. La loĝantoj uzadis t.n. "higienajn sitelojn". Ĉiumatene, de ĉevalo tirata, pasis sur du radoj veturanta barelo dancanta sur la malglata pavimo. En ĝin kuraĝaj urboficistoj transversis laŭvice la familiajn sitelojn. Pri la odoro mi nenion diros.

5

En mia sepa jaro mia avino kondukis min al Marsejlo okaze de kolonia ekspozicio. Mi precize memoras pri la Sudanaj forĝistoj, la Alĝeriaj tapiŝteksistinoj kaj la Kamboĝaj dancistinoj.

Tiun tagon mi unuafoje vidis la maron kaj la Malnovan Havenon, kie multaj velŝipoj mole balanciĝis sur la kvietakvo, kun sia aro da mastoj kaj velstangoj, simila al vintra arbaro.

Kelkajn jarojn poste, ni kunveturis al Saintes-Maries-de-la-Mer per etŝpura fervojo, en la tago de la pilgrimfesto omaĝe al la tri sanktulinoj : Maria-Jakobea, Maria-Salomea kaj ilia servistino Sara, la Egipta, patronino de l'Ciganoj. Ĉi tiuj venas de tuta Eŭropo, kaj la amaso de iliaj nomadaj loĝveturiloj dense ĉirkaŭas la fortikigitan preĝejon.

En tiu preĝejo-citadelo ni ĉeestis la ceremonian mal-suprenigon de la relikvokesto dumjare pendinta sub la alta volbo, - ceremonio majstre priskribita de Mistral en la unua kanto de "Mirejo". Ni rigardis preterpasi la procesion gvidatan de rajdantaj bovpaŝtistoj, la Kamargaj "gardians" sur blankaj ĉevaloj, sekvataj de klerikaro en bele ornamitaj vestoj kaj de la sanktulinaj statuetoj kun la relikvokesto pompe portata. Ĉirkaŭ ĝi svarmas fervorege krianta cigan-amaso, densa kiel abelaro. La procesio iras al la strando, la ĉevaloj eniras en la akvon ĝis ĝi atingas ilian bruston, la homoj portas super ĝin la statuetojn kaj la riĉe ornamitan vitrokeston, la pastroj benas la maron, kiu portis ĝis tiu bordo la sanktulinojn. Poste la tuta procesio revenas al la preĝejo, kaj la sankta kesto estas por jaro rehisata al sia loko, alte sub la volbo.

Ni ne povis viziti la kripton, speciale dediĉitan al la kulto de Sara, ĉar en tiu tago praktike nur ciganoj eniras en ĝin. Iuj pretendas, ke en tiu subtera kulto miksiĝas restaĵo el Mitraismo kaj adoro al taŭro.

6

La taŭro, la besto de Kamargo !

Sur la ebenaĵo, inter la maro kaj la Rodan-brakoj, inter kanaloj, marĉoj, lagetoj, ĉirkaŭ la vasta Vakares-lago ; inter vito- kaj rizo-kampoj, kanoj kaj salikoj, sur etendaĵoj de diversaj lagunaj herboj, vage sin paŝtas multopaj gregoj de duonsovaĝaj kornobestoj kune kun same duonsovaĝaj ĉevaloj. La bovoj estas nigraj, la ĉevaloj blankaj. Ili tie kunvivas apud diverskoloraj akvobirdoj el multaj specioj. Inter tiuj, la belaj flamengoj (fenikopteroj), kies flugantaj bandoj punktatas la helbluan fonon de l'ĉielo kiel pluvo de rozaj petaloj.

La geavoj ofte kondukis min en la romian amfiteatron, sur kiu la Saracenoj starigis tri kvadratajn gvatoturojn.

Tie ni ĉeestis taŭroludojn el du specoj.

En la kamarga kurludo, viglaj lertaj viroj vestitaj per blankaj ĉemizoj kaj pantalono, piedvestitaj per ŝnurplandaj tolsuoj, provas kapti kaj depreni kokardon ligitan per ŝnureto inter la kornoj de la taŭro. Tion oni nomas "razeto". Ne sendanĝera ludo : tiuj kamargaj bestoj, ne tre grandaj, estas rapidmovaj, fulmorefleksaj ; iliaj akrapintaj kornoj estas nudaj, sen ia ŝirma garnajo ; ili brave defendas sian kokardon, kure pelas la "razetiston" ĝis la ligna ĉirkaŭbaro, kiun ili kornobatas, kiam li ĝin supersaltas ; iafoje la taŭro mem supersaltas post la viro, kaj ĉiuj tie starantaj devas rapide transsalti en la arenon por eviti la atakon de la ĉiam pretaj kornoj.

En la Arlezaĵa cirko kiel en la Nima kaj kelkaj aliaj en Okcitanio, okazas ankaŭ "corridas de muerte" frekventataj de francaj kaj hispanaj "aficionados". Dikaj iberiaj bataltaŭroj estas kontraŭmetataj al hispanaj, portugaliaj, latinamerikaj aŭ francaj "toreros".

Post la brilaj priskriboj de Blasco Ibañez, de Montherlant, de Hemingway, mi ne provos detale rakonti pri tiu spektaklo, kiun amis Goya kaj Picasso. Spektaklo sanga kaj kruela, sed ankaŭ emocia kaj arte bela ; kruela kaj bela kiel antikva tragedio ; estetike bela kiel harmonia baletto, tiu vira skermodanco inter la bova kaj la homaj vivoj ; inter la peza atakema bruto kaj la sveltaj, elegantaj junuloj en "vesto de lumo", sub la brila suda suno. Tragika precipe en la lasta akto, kiam la matadoro, nudkapa, ŝirmata nur de malgranda kvadrato el ruĝa ŝtofo, tenante per la dekstra mano sian nudan spadon, alfrontas sol-al-sole la timindan kontraŭulon, lacigitan sed ankoraŭ danĝeran.

Sendube, la ambaŭflankaj ŝancoj estas malegalaj : ĉiaokaze la besto iras al certa morto, la homo nur tre malofte. Neniam mi ĉeestis la morton de taŭristo, sed mi vidis unu grave vunditan. Alte ĵetita en aeron per terura kornobato, li refalis kiel elartikigita klaŭno-pupo sur la sablon, en rapide larĝiĝanta sangolageto.

Imagu, ĉirkaŭ la granda elipso de la areno, la buntan spektantaron sidantan aŭ starantan sur la altaj ŝtono-ŝtupoj, la tondran bruon de iliaj aplaŭdoj (aŭ severe kritikaj kriadoj) jen al la taŭristo, jen al la taŭro. Imagu la efekton de subita mortosilento en la dramaj

momentoj. En tia etoso, kiel vibras la sentema koro de infano !

Tiel, dank'al la arlezaj geavoj, restas en mi pri tiu urbo kaj tiu lando multaj diversaj rememoroj : iuj dolĉaj kaj serenaj, aliaj forte emociaj. Ĉiuj profunde stampitaj.

Mia patro Fernando kaj mia patrino Luiza havis sian naskiĝdaton en la sama tago, nome la 17an de majo, sed kun kvarjara intervalo. Ili interkonatiĝis, kiam ili estis respektive dek-naŭ- kaj dek-kvinjaraj. En tiu jaro 1889, ili ne konjektis, ke iam ili geedziĝos.

Li revenis de Parizo. Tie li lernis la horloĝistan metion (kiun li estis neniam profesionta). Aŭreolita de ĉefurba prestiĝo, li amindumis al bela pliaĝa koketulinino. Luiza kaj ŝiaj amikinoj primokis tiun galantulon kaj liajn artifikojn ; ili nomis lin "la ravito de Filomena".

Fernando baldaŭ foriris por trijara militservo en Belforto en Alzaco.

Post lia reveno, li kaj Luiza interrenkontis kaj komencis "interparoli". En Parizo, pri gejunuloj, kiujn oni vidas ofte ambaŭkune, oni diras, ke li kaj ŝi "frekventas". En Aleso, oni diras : ili interparolas. Tiuj oftaj kaj longaj interparoloj finiĝas ordinare per gefianĉiĝo. Tia estis la sekvo.

La geedziĝo postvenis, ne sen kelktempa kontraŭstaro de liaj gepatroj : ĉu tial, ke ili, iel etburĝaj, esperis pli riĉan boparenciĝon, ĉu tial, ke la knabino estis katolika. Sed ŝia afabla ĝentileco venkis ilian antaŭjuĝon kaj konkeris ilin.

Luiza estis de sia patrino severe edukita kaj frue kutimigita al laboro. Tre juna, ŝi jam devis helpi en la doma mastrumado, en la vartado de siaj tri gefratoj, vintre lavi tukojn en la malvarma akvo de l'rivero, kaj multon fari per propraj manoj.

Ŝi estis sentima knabineto. Jen ekzemplo, pri kiu mi aŭdis. La fakto okazis en Grau-du-Roi, langvedoka vilaĝo kun sabloplaĝo frekventata de someraj bangastoj kaj kanalo kondukanta de laguna lago al la maro, en kiun ĝi penetras inter du moleoj perpendiklaj al la bordo. Tiu kanalo konsistigas fiŝistan havenon.

Unu tagon, Luiza dek-dujara, kun siaj pli junaj gefratoj, eniris en kanoton sur la kanalo. Ŝi deligas ĝin de ĝia fikso, ekprenas la remilojn, kaj - ek al la maro ! La geknabetoj, manbatante, ĝojis pri la plezura promenado. Sed la afero difektiĝis, kiam temis pri reveno.

Blovas kontraŭa vento, malhelpanta la repason inter la moleoj. La boateto ne antaŭeniras ; ĝi dancas kiel fragila muksoŝelo sur la ondoj, kiuj minacas puŝegi ĝin frakase al la digaj ŝtonblokoj. Ektimas la etuloj, sed la kuraĝa pliaĝulino, frontante al konsterniĝo, trankviligas ilin per aŭtoritata parolo. Ne allasante sin al senesperaĝo, ŝi kunpremas la dentojn, streĉegas siajn delikatajn muskolojn, kaj energie remas.

Sur ambaŭ moleoj, ĉeestantoj maltrankvile gapas al ŝia baraktado, ne klare vidante, kiel ili povus helpi...

Fine, ŝi sola sukcesis venki la kontraŭajn elementojn. La kanoto, trafinte la malfacilan pasejon, retroviĝis en la sekura rifuĝejo de la kanala haveneto, kaj facile realbordiĝis. Post la pena luktado, la malstreĉiĝo de la nervoj sin manifestis per tremo kaj plorkrizo. Sub la hardita armaĵo de la heroineto reaperis la malforta infano. Kaj la severa patrino, pli kortuŝita ol ŝi lastis vidi, tiufoje moderigis la akrecon de sia riproĉadmonado.

3

En siaj adoleskaj jaroj, mia estonta patrino kelkfoje vizitis vilaĝojn en la Malgranda Kamargo, t.e. la laguna ebenaĵo okcidente de la Rodan-delta, propre nomita Kamargo. Tie, kiel sur la delto, estas bredataj duonsovaĝaj nigraj taŭroj kaj bovinoj kaj blankaj ĉevaloj kun longaj kol- kaj vost-haroj. Luiza lernis rajdi kun la bovistoj kaj partoprenis en "abrivadoj" : kondukado de taŭroj libere kurantaj inter rajdantoj tra la stratoj. La bestoj estas gvidataj en improvizitajn cirkojn el runde aranĝitaj ĉaroj, aŭ por taŭroludoj, aŭ por la "ferado", la festo de la markado al junaj bovoj. La "gardians", kun sia tridento pelas la taŭreton en rapida kurado. Kiam ĝi ŝajnas sufiĉe lacigita, unu el ili subite saltas de sia araba selo, kaptas la boveton per la kornoj, kaj per abrupta tordomovo ĝin renversas. Por tio necesas granda lerteco,

kaj ne malgranda forto por teni la beston surflanke kuŝanta, dum alia bovisto venas kun arderuĝa ferstampilo por brulstampi sur la felo la distingan markon de la "manado" (grego).

En tiuj festoj la junulino multe amuziĝis - sed ŝi restis tre "saĝa", ĉasta knabino.

4

Luiza vizitadis la lernejon nur ĝis la atesto pri unuagrada lernado. Tamen, ĉar ŝi estis inteligenta, scivola kaj leg-amanta, ŝi akiris ian aŭtodidaktan kulturon. Dank'al ĝi ŝi fariĝis ŝatata interparolanto de viroj inter parencoj kaj amikoj. Tiuj, krom ŝia ina ĉarmo, aprecis ŝian konversacion en komparo kun la supraĵaj babiladoj de tro multaj belulinoj.

Ŝi lernis kudri, kaj kelkan tempon laboris en fabriko de pantalonoj. Poste, novedzino, ŝi tenis magazeton de mercero. Sed baldaŭ ŝia tempo estis plene okupita per la doma mastrumado kaj la vartado kaj flegado de ŝia bebo, mi.

En mia plej frua memoro mi vidas junan virinon, kiun mi trovis tre bela, kun krispetaj nigraj haroj kaj malhelbrunaj okuloj. Ŝi prenis min sur siaj genuoj kaj nomis min sia filino : ĉar ŝi estis vane dezirinta infaninon, kaj ricevis nur unu filon. Sed neniam mi suferis pro tiu spito de l'sorto. Kiel solinfanon, kiun plurfoje ŝi timis perdi, ŝi vere adoris min.

Kelkafoje ŝi provis min, dirante, ke ŝi ne estas mia vera patrino, ke mi estas adoptita infano. Pri tiu aserto mi energie rifuzis kredi. Se ŝi tamen insistis, mi impete ĵetis min al ŝia kolo, dirante : "Kiel ajn, ci estas kaj restos mia panjo!" Tiam ŝi sovaĝe premis min al sia brusto, kaj kiseĝis min kun pasia ardo.

5

Mi naskiĝis fragila bebo, kies vivon endanĝerigis, jam en la dek-oka monato, grava bronkito. En la kvara jaro mi ricevis sinsekve du infekto-malsanojn, nome difterion kaj meningiton. Ambaŭ estis gravegaj, ĉar la medicino ankoraŭ ne disponis pri tiel efikaj rimedoj, kiel nun. Ambaŭfoje la familia kuracisto avertis mian

patron pri mortodanĝero - tamen li sukcesis min savi ; sed de tiam mia patrino vivadis en konstanta timo pri mia sano. Ŝi treme flegadis min, dorlote vartis min kvazaŭ en vato-ŝelo, min gardis kontraŭ ĉia temperatur-vario kaj ceteraj danĝeroj - ne konsciante, ke tiel ŝi malhelpas naturan reagon kaj fortikiĝon de mia temperamento.

Mia patro estus preferinta pli hardan korpedukon ; sed vidante sian edzinon tiel timoplena, li ne kuraĝis trudi al ŝi sian opinion. Mi kreskis kiel planto vartata en vitra flordomo, ĉiujare suferis longajn bronkitojn, kaj neniam fariĝis tre forta en korpekzercoj, kontraste kun la rajdokapabla patrino kaj la maldika, vigla, lerta patro, kiu en sia knaba aĝo estis vera akrobato.

Li brilis en ĉiaj gimnastik-ekzercoj : ĉe reko, pendringoj, paralelaj stangoj, eĉ flug-trapezo. Iam la gimnastik-instruanto vetis kontraŭ la lernejestro, ke la bubo marŝos sur la manoj, senhalte, de la lernejo ĝis la tria etaĝo. Eble al tio mi ŝuldas mian nesentemon al kapturmo kaj mian amon al grimpado sur krutaj roksurfacoj ; sed neniam mi atingis la akrobatan majstrecon de mia patro.

6

Ĉe protestantoj la "unua komuniĝo" okazas ne antaŭ la dek-kvara jaro. Por tiu solena okazo la juna Fernando unuafoje ricevis novan vestaron (ĉar ĝis tiam li finuzadis la vestojn de sia du jarojn pli aĝa frato).

Kiam ĉio estis preta, kaj venis la antaŭtago de la ceremonio, la knabo flegme deklaris, ke li ne volas ricevi tiun sakramenton, kaj deziras pri religio nenion plu aŭdi. Post patra kolereto, li, firme starinte sur sia pozicio, venkis - kaj konservis la belan kostumon.

Tamen, du jarojn poste, li regule vizitadis la katalikan preĝejon "Sankta-Jozefo" ; ne pro la diservoj, ĉar li ja ne konvertiĝis, sed por kanti en la ĥoro. Li havis belan voĉon. La paroĥestro facile akceptis herezajn aŭ senreligiajn ĥoranojn. Vespere, post la prov-ripetoj, tiu afabla bonulo kunigis ĉiujn kunkantintojn ĉirkaŭ tavolo konvene provizita per kuketoj kaj blanka vino. Al la junulo plaĉis tio, kaj ankaŭ la kunesto de kelkaj agrablaj ĥoraninoj, eble ne tro prudaj, kiujn li kavalire akompanis al hejmo post la vespera ceremonio kaj festen-

eto. Supozeble la vojirado daŭris sufiĉe longe...

Pri la bela voĉo de mia patro mi tre bone memoras, ĉar dum jaroj mi aŭdis lin kanti diversajn pecojn : kanzonojn, valso-kantojn, oper-ariojn. Kantis ankaŭ mia patrino, kvankam ŝi ne havis tiel favoran dispozi-
cion.

Cetere, en tiu epoko, ĉiu virino kantis laborante, ĉu hejme, ĉu en fabriko ; ankaŭ multaj viroj, kiel ma-
sonistoj aŭ farbistoj sur siaj ŝtupetaroj, kc. Tiel sin esprimadis vivoĝojo, kiu nun ŝajnas perdita aŭ forgesita.

Forperditaj, la kantoj aŭ modulaj krioj de strat-
metiistoj : riparistoj de ombreloj, de fajenc- kaj
porcelanaĵoj, kamenskrapistoj, hundotondistoj, kling-
akrigistoj, ĉifonistoj. Estis ankaŭ strataj kanzonvend-
istoj, kiuj kantis akompanate de kelkaj muzikistoj aŭ
de gurdo. La ĉirkaŭstaranta publiko ĥore ripetis la
strofojn kaj la rekantaĵon, kiel en la fama filmo de
René Clair "Sub la tegmentoj de Parizo".

7

Mia patro ĝis la dek-sesa jaro vizitadis la urban
gimnazion. Li tiel profitis el tiu instruado, ke multaj
kredis lin abituriento, kvankam li ne atingis tiun ti-
tolon. Li havis viglan menson, rapidan komprenemon,
akutan spriton.

Kvankam li neniam sin ekzercis en manlaboroj krom
la horloĝista metio, li estis fingrolerta, kaj li pro-
pramane elfaris, per ligno de pakokestoj, plaĉaspekt-
ajn kaj praktikajn meblojn, kiujn li bele poluris, la-
kis kaj dekoris : interalie tablojn, kaj por mi skribo-
tablon kun tirkestoj kaj cilindra lignokurteno.

Li havis precipe artan guston kaj inklinon por de-
segno per grafito-, karbo- aŭ okraruĝ-krajono, tuĉo,
paŝtelo, akvarelo. Li akiris embrion de talento, tiel
ke liaj desegn-instruistoj deziris peli lin al la Bel-
arta Altlernejo en Parizo. Sed la familio ne estis
sufiĉe riĉa por elporti la elspezon de plurjara stud-
ado en la ĉefurbo.

La knabo facile rezignis. Li fariĝis komizo en ladaĵ-
vendejo, poste komerc-vojaĝisto, kaj fine, asocie kun
sia frato, reprezentanto-makleristo.

Dum la ok unuaj jaroj de mia vivo, li travojaĝis Cevenon kaj Bas-Langvedokon, unue per publikaj ĉevalveturiloj kaj fervojaj trajnoj ; poste li uzis prefere petroltrickiklon, kiu ebligis pli liberan tempo-disponon. De ĉiu vizitata urbo li sendis al mi ilustritajn poŝtkartojn, kiujn mi zorge konservis.

En la fino de sia vivo mia patro estis tutvizaĝe razita ; pli juna, li portis lipharojn kaj pintan barbeton. Li estis brunhara, kun fajna hela haŭto. Liaj helbrunaj okuloj havis rektan rigardon, iafoje akran kaj severan ; tiam ĝi forte impresis al mi, kaj mi timis meriti mallaudon de li. Tamen li ofte ridetis, neniam grumblis, kaj ĉiam milde parolis. La riproĉadmonoj en laŭtega voĉo kaj la facilaj vangofrapoj apartenis al la prerogativoj de mia patrino. Ho ve! mi tro ofte havigis al ŝi motivojn por ilin apliki...

8

Kiel ĉiuj samtempaj Okcitanoj, mia patro estis dulingva. Kutime li parolis france, sed kun la gepatroj, frato kaj parencoj, preskaŭ ĉiam dialekte ; ankaŭ kun la plimultaj el siaj amikoj, kiujn li elektis en la laborista klaso.

Li akiris trian lingvokapablon, kiam en 1912 ni kune lernis esperanton. Ĉe la tablo dum la manĝoj aŭ en niaj promenadoj, ni ĉiam kunportis la ruĝan broŝureton aŭ la Ĉefeĉ-ŝlosilon, kaj ni provis ĉion diri en la lingvo internacia. Dank'al tiu konstanta ekzercado ni rapide progresis. De tiam ĝis lia morto, ni ĉiam uzadis inter ni nur tiun lingvon, kiun mia patrino, sen tre funda lernado, bone komprenis.

Nia diligento rezultigis, ke jam du jarojn poste, ni povis sukcese provi ekzameniĝon por la "Atesto pri Kapableco". Ĉar en Aleso estis nur unu diplomita instruanto, ni devis iri al Avinjono, kie funkciis la necesa triopa juĝantaro. Unu el la tri, kiu min demandis por la parolaj provoj, estis juna fraŭlino, kies beleco treege impresis al mi. Mi ektimis, ke mi ne kuraĝos respondi. Sed ŝia ĉarma rideto venkis mian timemon, kaj ŝi afable min gratulis.

Dank'al la sufiĉe klera familia etso, mi fariĝis bona lernanto. Pri la franclingva redaktado min helpis la

povoscio de esperanto, anstataŭe de latino, kiun mi ne lernis. Helpis ankaŭ mia patrino, kiu frue faris el mi sian privatan sekretarion. Mi estis komisiita por skribi ĉiujn leterojn al parencoj kaj amikoj. Ofte mi devis rekomenci, eĉ plurfoje, tiun taskon, tial ke la stilo ne plaĉis al ŝi. Ŝi estis ja tiel sentema, ke ŝi preterlasis neniun delikatan nuancon en vortelektio aŭ frazoturno. Mi devis rebaki la redaktaĵojn, ĝis ŝi trovis ĝin plene konvena.

9

Se mia patro ne povis sporte hardigi min, li almenaŭ transdonis al mi sian amon al naturo. Ĉirkaŭ lia kvardeka jaro li konvertiĝis al terkulturado. Li diligente fosis, semis, plantis, piĉetis kaj sarkis, tondformis arbustojn kaj greftis. Kvankam tio estis nur kromokupiĝo, li metis en ĝin sian kutiman emon al preciza zorgo kaj taŭge farata laboro.

Sed pli frue li ne alte ŝatis ĝardenojn. "Kamparo inter kvar muroj", li diris.

En printempo, frumatene, ni ambaŭ biciklis en la Alesa "Prerio", la verda ebenaĵo. Tie staris multaj kaŝtanoj, nun mortintaj pro malsano aŭ forhakitaj pro la disetendiĝo de la urbo kaj de la legomĝardenoj. Tiuj arboj sur la ebenaĵo kreskis malpli dense ol sur la Ceven-montoj. Inter iliaj dikaj trunkoj verdis grasa herbo, riĉe nutrita de aluvia tero. Fine de l'vintro ĝi ornamigis per bonodoraj violetoj ; baldaŭ sekvis primoloj, lekantoj, jonkviloj kaj belaj grandaj narcisoj. Ĉe la bordoj de riveretoj kreskis ruĝaj lilioj kaj aliaj sovaĝaj floroj, super kiuj flirte flugetis libeloj kaj papilioj. Preskaŭ tuŝe sur la akvo zigzage pasis la bluverda fulmo de alciono.

Ni laŭiris tiujn bordojn, biciklante sur vojetoj apenaŭ kelkajn centimetrojn larĝaj, ofte glitaj, kun flanko deklivo. Tio ne estis senriska, sed la patro instruis al mi ne timi fizikajn danĝerojn kaj strebi al "virtuozeco" en korpaj ekzercoj, eĉ se mi restis iom mallerta.

Vintre, en belaj sunhelaj tagoj, ni ambaŭ, kelkafoje kun mia patrino, piediris en natura kamparo, tra la

proksimaj montetoj. Tie, inter verdaj-kverkoj, arbutuoj, juniperoj kaj aliaj makisaj arbedoj, troviĝas kelkaj kreskejoj de sovaĝaj mimozoj. Tagmeze ni serĉis kaj trovis en iu valetio agrablan lokon por manĝo, kun fonteto, el kiu ni ĉerpis puran akvon, kaj en kiu ni malvarmigis la botelojn. Du aŭ tri taŭge elektitaj ŝtonoj konsistigis improvizitan fajrujon, en kiu ni ekbruligis sekajn branĉetojn rapide kolektitajn. El verdaj branĉetoj lerte plektitaj, mia patro faris kradrostilon sufiĉe fajrorezistan por la tempo necesa al kuirado de kotletoj aŭ de kolbaso, surŝutitaj per dispecigitaj timianfolioj. Ni trinkis akvon el la fonto, vinon, kaj post la manĝo kafon, el pokaloj faritaj el duonŝeloj de kokoso.

En somero ni iris prefere al idilia loko ĉe la bordo de rivereto, proksime de romanika ponto. Tie staras renesanca kastelo kun teraso kaj aleo de gigantaj platanoj. Ĉe la kontraŭa bordo elŝprucas fonteto sub la ombro de ducentjaraj verdaj-kverkoj kun dikega trunko kaj fortikaj branĉoj, tordaj kaj nodoplenaj. En ili trilas birdoj kaj stridas cikadoj. Tie estis, en varmegaj somertagoj, agrable malvarmete kaj ripozige.

Aliajn fojojn ni iris kelkajn kilometrojn al rivero, kie mia patro fiŝkaptis. Marŝante kun bankalsono en la neprofunda akvo, li tenis enmane malgrandan rondan reton kun rigida metala ĉirkaŭrando, kiun li serĉe ŝovis inter la radikojn de ĉebordaj salikoj. Tiu procedo, per kiu oni facile kaptas malgrandajn fiŝojn, estas malpermesita, kaj ĝendarmoj persekutadis la nelicajn fiŝistojn. Iam mia patro, ekvidinte paron el ili, antaŭ ol ili povis vidi lin tra la foliaro, rapide elakviĝis kaj sidiĝis sur sian reton, ĝin kaŝante, apud ni ĉe la bordo. Kiam la ĝendarmoj sensuspekte preterpasis, li afable salutis ilin, kaj ili interŝanĝis kelkajn vortojn.

Li amis tiel mistifiki la reprezentantojn de la ŝtata aŭtoritato. Unu tagon, survoje kun sia triciklo, li troviĝis en paneo. Jen venas du piedirantaj ĝendarmoj, neniel similaj al la nunaj motorciklaj vojpolicistoj, kiuj estas tre spertaj motoristoj. La dukorn-ĉapeluloj, videble - kaj prave - suspektis, ke la triciklisto ne posedas la devigan legitimilon ; sed al ili nenio urĝis. Ili ĝuis la atendon, komencante kun li banalan konversacion pri la vetero kaj similaj temoj, kaj rigardante kun intereso

liajn vanajn klopodojn por solvi la paneon... Dume, li tamen eltrovis la kaŭzon, kaj kaŝe reordigis la aferon ; sed, sidante sur la selo, li ŝajnis, kvazaŭ la paneo daŭrus, kaj li grumbladis kaj sakradis kontraŭ la aĉa mekaniko... La paro, silenta, kaŝis ironian rideton sub siaj dikaj lipharoj... Subite, li per rapida movo ekfunkciigas la motoron, kluĉas kaj fulme startas, lasante tie la gapantajn ĝendarmojn, kaj salutante ilin per facila mangesto kaj afabla : "Ĝis revido, sinjoroj!"

En aŭtuno niaj promenadoj celis kolektadon de fungoj, arbutoj kaj kaŝtanoj, kiujn ni trovis abunde ne malproksime de la urbo. Ni kunportis hejmen nian kolektaĵon, sed antaŭe ni mangis kelkajn kaŝtanojn kuiritajn en la varma cindro de bruligitaj branĉetoj, meze de arbara maldensejo. Ankaŭ en tiu sezono la kamparo estas belega, kun la multnuanca orruĝo de la velkantaj foliaroj, la daŭra malhelverdo de la pinoj kaj ileks-kverkoj, la flavaj deklivoj kovritaj de reflorantaj genistoj, kaj la fajra rebrilo de la rozruĝaj erikejoj.

Tiel ĉiu sezono favoris min por spiri puran aeron en sunlumo. Mi ŝuldas al mia patro konservitan guston pri naturo kaj pri naturscienco. Estas ja li, kiu instruis min praktike pri sovaĝaj mambestoj, reptilioj, birdoj kaj insektoj, pri la vegetaĵoj de niaj arbaroj, makisoj kaj herbejoj. Ankaŭ pere de li mi ekkonis la unuajn fosiliajn kuŝejojn, en kiuj mi poste faris interesajn kolektadojn.

10

De multaj el tiuj lokoj en la Alesa ĉirkaŭaĵo mi konservas kompletan, netan, fotografan memorbildon. Mi povus retrovi la vojon al ili senhezite, senerare, kun fermitaj okuloj. Male, kelkaj lasis en mia memoro nur fuĝan impreson, kvazaŭ stompitan en nebulo. Se mi planas pilgriman revenon al ili, mi ne kapablas ilin situigi, kaj ne prosperus al mi reserĉi la irendan vojon. Ili aperas kaj disvaporiga kiel vaglumo, fatamorgano, miraĝo. Ĉu mi vidis ilin en realo, ĉu nur en sonĝo ? La demando restas sen kontentiga respondo. Ĝi elvokas tiujn pejzaĝojn, pri kiuj oni dubas, ĉu oni vidis ilin, eble, en iu antaŭa vivo.

Tiel mi revidas, aŭ kredas revidi - kie ? - mallarĝan ebenan valetan inter du rektaj montdeklivoj kovritaj de densa makiso. Ĉe la piedo de unu el ambaŭ deklivoj, rivereto fosis sian sulkon, rekta kiel kanalo, inter rokaj parietoj vertikale tranĉitaj en kalkoŝtona skisto. En la fundo, du metrojn malsupre, kviete fluas kristala akvo, kun supra surfaco glata kiel spegulo, kiu reflektas la bluan ĉielon. Inter la rivereto kaj la alia deklivo etendiĝas graso, intense verda herbaĵo. Sur tiu mola ebenaĵo staras larĝa aleo, eble cent metrojn longa. Grandaj arboj kun dikaj rektaj trunkoj : ĉu ulmoj, fraksenoj, sikomoroj ? Tiuj fortikaj gigantoj aspektis aĝaj de almenaŭ cent kvindek jaroj.

Tiu aleo, paralela al la rivereto, prezentis strangan karakteron. Ĝi nek komenciĝis ĉe pordego en limomuro, nek finiĝis antaŭ konstruaĵo aŭ ruino. Cetere, kie estis la komenco, kie la fino ? Mi ofte meditis pri la mistero de tiu majesta vojo kondukanta de nenio al nenio. Kiu plantis ĝin ? Kiam precize ? Por kiu celo ?

Mi imagas iun el tiuj nobeloj - filozofoj el la Jarcento de la Lumoj, disĉiplo de Rousseau. Li elektis tiun valetan por starigi al si kasteleton aŭ kampardonon ; kaj li rezonis jene : por konstrui domon, sufiĉas unu, du jaroj. Sed arbo, por atingi plenkreskon, bezonas almenaŭ tridek jarojn. Do mi unue plantos la arbojn, poste venos la konstruado.

Ne ĉiam plaĉas al la sorto la projektoj de la homo. Venis kriza tempo. Pro kiu ajn kaŭzo, la planita konstruaĵo neniam konkretiĝis. La verda valeta restis senhoma.

Pasis sezonoj, jaroj, jardekoj, jarcento. Forpasis la homoj, kiuj plantis la aleon. Ili kaj iliaj idoj, pluraj sinsekvaj generacioj, ripozas ie en la patrino sino de la tero. Restas, daŭre vivanta, tiu duobla vico de imponaj gardostarantoj. Ignorante la rolon, por kiu ili estis destinitaj, ili flegme daŭrigas sian naturan kreskadon ; kaj en ĉiu printempo, ili gastigas en siaj branĉoj kaj folioj ĝojkantantajn birdarojn.

Kvankam li kapablis teni konversacion kun intelektuloj, mia patro preferis la kompanion de simplaj homoj. Ne tial, ke lia relativa klereco faris lin elstara inter ili kaj admirata : kun tiaj personoj li ne paradis per

supera scio kaj afektaj vortoj. Li parolis ilian lingvon, ĉar li vere sin sentis kiel unu el ili.

Sed li ne ŝatis la maldiskretulojn, kiuj volis trudi al li nedeziratan interparoladon. Iam ni estis kune en vagono. La kontraŭsidanta vojaĝanto alparolas lin : "Mi kredas, Sinjoro, ke ni konas nin." Respondo, en ĝentila sed malvarma tono : "Mi ne kredas, Sinjoro." La tedulo insistas : "Tamen ŝajnas al mi, ke ni jam interrenkontis, ie." Mia patro sulkigas la brovojn, kvazaŭ en intensa peno por streĉi sian memorkapablon. Fine, kun afabla rideto : "Ĉu eble antaŭ du jaroj, en la regiona malliberejo en Nimo ?"

Tamen erare estus kredi, ke mia patro estis homevitulo. Eĉ kiam li iris al soleca kamparo, tio ne estis kun la celo apartiĝi de siaj similuloj. Dum niaj promenoj aŭ ekskursoj, ni havis oftajn renkontojn. Laŭ la ĝenerala moro, li alparolis ĉiun renkontaton.

La konversacio komenciĝis per demando, laŭ kvazaŭ ritaj formuloj. Al hokfadena fiŝisto, tenanta sian bambustangon kaj sekvanta per la rigardo la flosantan korikon : " (Ĉu) bekas?" t.e. : Ĉu la fiŝoj bekmordas al la vermoprovizita hoko ? Al marŝanto en arbaro, taŭzanta per bastono la velkfolian tavolon : "(Ĉu) fungoj ?" Al kampulo fosanta : "Bona laboro ?" t.e. : Ĉu la laboro estas facila, la tero oportune mola, sufiĉe malseka ? Oni interŝanĝis kelkajn frazojn pri la vetero kaj aliaj banalaj temoj, ĉiam en dialekto, kaj disiĝis kun afablaj bondeziroj.

Tia estas - aŭ estis - la popola ĝentileco. Ĉu nur supraĵa, senprofunda - hipokrita ? Ĉina samideano, kiun mi iam demandis pri lialanda rafinita ĝentileco, respondis : "Antikvaj civilizacioj, kiel nia, scias el longa spertado kiel akraj, malmildaj kruelaj estas la interhomaj rilatoj. Tial ili sentis la bezonon rondigi la angulojn, poluri kaj lubriki la interfrotantajn surfacojn..." Ĉu tiu nocio ne perdiĝas en nia moderna moro ?

Ne ĉiuj memoroj pri mia patro rilatas al kamparo : ĉar ni loĝis en urbo.

Nia mediteranea civilizacio estas tiu de tritiko kaj uvo, de pano kaj vino - kiuj fariĝis ritaj simboloj de

la kristana religio. Jam longe la urbanoj, eĉ ankaŭ la kampuloj, ne plu faradas sian panon ; sed en la tempo de mia infaneco, ili ankoraŭ mem faradis vinon por la familia konsumado.

Ĉiuaŭtune, mi iris kun mia patro al la vinberfoiro. La vitkulturistoj alportis, sur plataj ĉaroj trenitaj de ĉevalo, lignajn ujojn en formo de elipsa konustrunko kun du teniloj, plenajn de traŭboj. Mia patro iris de unu ĉaro al alia, komparis la kvaliton kaj la sanecon de la vinberoj, diskutis la prezon, kaj fine aĉetis ĉaroŝarĝon.

La kampulo liveris ĝin en nian kelon. Mia patro dungis du taglaboristojn. Ili verŝis la enhavon de la ujoj en kuvon malaltan, en kiu, kun la pantalonoj suprenfalditaj super la genuojn, ili per nudaj piedoj tretpremis la grapolojn. La ricevitan sukon ili transversis en pli grandan kuvon por la fermentado.

De tiam, la patro mem ĉion prizorgis. Li lavis per akvo siajn barelojn, ilin sekigis kaj desinfektis per bruligado de sulfuro. Li mem kontrolis la fermentadon - iomete danĝera afero : ĉiujare kelkaj nesingarduloj morte asfiksiĝis en la kuvo plena de karbona dioksido. Mia patro ĝustatempe "gluis" per ov-albumeno, por ĝin klarigi, la fermentitan sukon ; ĝustatempe ĝin transversis de la kuvo en barelojn ; kaj ĉiel prizorgadis kaj "bredadis" sian vinon. La vinistoj uzas tiun vorton breĉi, kvazaŭ temus pri besto : vino estas ja vivanta estaĵo. Iuj eĉ diras "eduki", rigardante ĝin kiel inteligentan estulon, kiu bezonas kaj meritas atentajn zorgojn, kaj dankeme repagas ilin per la alta kvalito ricevita.

Tiel ĉiujare, mia patro prave fieris pri la boneco de sia vino. Ordinara ruĝa vino ne devenanta de iu fama regiono kaj grandnoma vitejo ; sed el sperte elektitaj traŭboj, sanaj, plene maturaj, ame traktitaj, en konstanta zorgado pri pureco de la materialo ; sen mikso de fremdaj substancoj kaj kemiaj ingrediencoj ; ido de fortika grundo kaj ĉiela akvo, kreskigita de energiplenaj sunradioj, kaj kondukita per homa kunlaboro al plena elvolviĝo. Fine, sincera, honesta trinkaĵo, inda je homoj de malnova kulturo.

En la lasta jarcento la Sudlandaj familioj estis kvazaŭ patriarkaj triboj. Nur masklaj idoj rajtis je la nomo infano : oni ne kalkulis la neglektindajn idinojn. Oni diris : li havas du infanojn kaj tri filinojn ; aŭ : infanojn li ne havas - nur knabinojn.

Unu el miaj praavoj kutime diris : "Mi havas naŭ infanojn, kaj ĉiu el ili havas sian fratinton." Komprenu, ke li havis naŭ filojn kaj unu filinon, komunan fratinton de la naŭ. Ŝi fariĝis la patrino de mia patro, mia avino Aliks'. Ĉiuj naskiĝis en la urbeto Anduzo.

El tiuj naŭ praonkloj, la plej riĉa estis pan- kaj kuk-bakisto en Aleso, poste en la pli granda urbo Montpeliero.

Alia estis "La Soldato"*. Post sia sepjara militservo, li servis sep jarojn plu anstataŭe de unu el siaj fratoj. En tiu tempo estis lice anstataŭi en militservo; multaj riĉuloj evitis ĝin, aĉetante anstataŭanton.

Alia, nomita Cezaro, estis pensiulo. Mi ne scias, kia estis lia antaŭa profesio. Mi ĉiam vidis lin kun blanka barbo kaj "melonforma" felto-ĉapelo.

La plej juna, Julio, estis horloĝisto. Sperta en sia metio, kiu faris lin iomete ĝiba, sed fantazia en la vivo kaj facile drinkema. Kiam li naskiĝis, la gepatroj kromnomis lin "Sen-Bezono" : ĉar naŭ infanoj estis jam pli ol sufiĉe en malriĉa familio. Dum sia tuta vivo li "tiradis la diablon per la vosto", t.e. al li mankadis mono. Ofte lia edzino aŭ lia filino venis al mia patrino elpeti uzitajn vestaĵojn aŭ aliajn helpdonacojn.

Pri pluraj el tiuj praonkloj mi neniam ion sciis. Sed la plej pitoreska estis senkonteste Kazimiro, "La Ĉapelisto". Li frue laboris en Anduzo, en ĉapelfabriko, kiu estis, kun silkoŝpinado, la ĉefa industrio de tiu urbeto. Li praktikadis tiun metion dum multaj jaroj, kaj plurfoje iris provi sian ŝancon en Parizo. Mia patro (mi

* Eraro, konfuzo : Felikso la Soldato ne estis frato, sed onklo de mia avino. Li jam estis soldato en 1830, Aliks naskiĝis en 1835.

suspektas lin pri plibeliga troigemo) rakontis, ke ĉiufoje Kazimiro ire veturis per trajno, kun nova valizo, kaj revenis piede, en longaj etapoj, portante surŝultre pakon ĉe bastonekstremaĵo.

Tiuj fiaskoj havigis al li guston por pli vastaj vojaĝoj kaj grandiozaj entreprenoj. Iam li eksciis pri laboroferto de ĉapelfabriko en Kebeko. Li tuj kolektas siajn magrajn ŝparaĵojn kaj, laŭkutime, pruntas de sia frato la panisto. Kaj jen li transoceanne forveturas. Ne, kompreneble, sur luksa rapida kurierŝipo, sed pli modeste sur neurgema kargoŝipo.

La vojaĝo estis longedaŭra. Kiam li alvenis, la fabriko, de monato bankrotinta, ne plu funkciis.

Jen do nia Kazimiro sola, sen monero en poŝo, sur la malmola pavimo de granda urbo, feliĉe franclingva. La knabo estis kuraĝa kaj elturniĝema. Li serĉis kaj trovis laboron. Li faris diversajn metiojn, nemulte monprovizajn : same kiel pluraj junaj amerikanoj, kiuj poste famiĝis kiel miliarduloj. Se nur oni kredas mirindajn legendojn el tiu ora lando...

Subite, jen Fortuna okulumas al li. Anoncafiŝo : koncesioj en la suda usona provinco de Nov-Orleano. Vastaj terbienoj aĉeteblaj por ducent francaj frankoj. Ja orfrankoj, sed eĉ en la 19a jarcento, tio ne estis tre granda sumo. Nur ducent frankoj, tio signifis : senlimaj kotonkampoj en Luiziano, kultivataj de armeo da nigraj sklavoĵoj ; spektakloŝipoj kun grandaj radoj sur Misisipo; muzikaj drinkejoj en Nov-Orleano ; dezirvekaj, amoremaj kreolinoj kaj mulatinoj ; kaj super ĉio, mono, oro, montoj da oro. Per nur ducent frankoj, certigita sukceso, unua ŝtupo al fabela riĉego. Nun mi estus heredinto de dolarmiliarda onklo el Ameriko...

Kiam pasas diino Fortuna, oni senprokraste ŝin ekaptu je la haroj.

... Sed kiu disponas la necesajn ducent frankojn ? Certe ne Kazimiro, kiu pene vivtenas sin de tago al tago per necertaj taskoj. Kion fari ?

"La gvardio, lastega espero kaj lastega penso!"*

La panisto-riĉulo, la ĉiam helpopreta frato ! Kablo-gramo al li !

Ho ve! tro multaj senefikaj pruntoj fine lacigis la

* Fama verso de Viktor Hugo pri Napoleono en Vaterlo :
"La garde, espoir suprême et suprême pensée".

paniston kaj elĉerpis lian helpemon. Ĉi-foje li ne montris komprenemon. Li restis surda al la patosa voko de la entreprenema pioniro. Adiaŭ! bela suda ĥimero !

Tiel forsvenis la brila miraĝo. Kelkan tempon plu, la ĉapelisto, elrevigita, daŭrigis sian amerikan aventuron en senespera vegetado, ĝis fine li revenis al la hejmo-lando.

Sed de la transatlantika vojaĝo, de la restado en Eldorado, aŭreolita de malproksimo en tempo kaj spaco, li reportis kun si amasrikolton da mirindaj rememoroj. Mi, neveto, kredeme glutadis liajn bombastajn rakontojn pri maristoj, ŝtelistoj kaj indianoj ; pri falo tra la tro maldika glacitavolo en la malvarman akvon de la rivero Sankta-Laŭrenco ; pri la heroa elmergiĝo kaj la subita renkonto naz-al-naze kun minaca foko - kiu iafoje transformiĝis en polusan urson. Ĉu li mem ne fine kredis al tiuj fantasmoj evidente kreitaj de lia imago, eble surbaze de iuj veraj okazetoj ?

2

Kiam li revenis de la nova mondo, la ĉapelindustrio en Anduzo malprosperis, kaj li ne povis redungiĝi. Neniam plu li relaboris pri ĉapeloj, sed en la familio li daŭre restadis La Ĉapelisto.

Pluiĝis lia migrado tra landoj kaj metioj. Kelkajn jarojn poste, ni retrovas lin en Alĝerio, tiam franca kolonio. Li estis dungita kiel provizora gardisto en malliberejo. Tre provizora, kiel ni vidos, kaj amatora, fantazia.

Al la malliberuloj estis malpermesite fumi. Li kaŝe kaj grandanime provizis ilin per kontrabanda tabako. Plie : li imagis propramove konsenti al ili forpermesojn. La historia vero devigas min konfesi, ke ili, tre honeste, ne trouzis kaj ne perfidis lian konfidon : ĉiuj revenis akurate en la interkonsente difinita horo.

Ve! la administracio eksciis pri la afero. Ĝi estis obtuze netolerema. Ĝi ne aprecis la iniciaton de la ĉapelisto-provoso, kaj ĝi sendiskute lin tuj maldungis. Li estis viktimo de la sorto destinita al ĉiuj geniaj pioniroj : pasis pli ol duonjarcento, antaŭ ol fakuloj en jura kaj reeduka scienco reeltrovis lian ideon kaj oficiale ĝin aplikis.

Kiam mi ekkonis lin, ĉirkaŭ lia sepdeka jaro, praonklo Kazimiro estis fine trovinta sian definitivan vojon. Li travojaĝis Langvedokon, disvendante boteletojn da absinta ekstrakto fabrikita de kuzo lia en Nimo. Sur la boteletoj estis gluita etiketo kun jena presita surskribo : "Se vi solvos la enhavon de tiu ĉi boteleto en litron da 45-grada brando, vi ricevos absintaĵon : estas malpermesite. Se vi solvos ĝin en litron da distilita akvo, vi ricevos bonegan dentpurigilon : estas lice."

Li portis la boteletojn en granda ledsako, sature penetrita de la fortaodoro. Kiam li piede alvenis, de la ekstremaĵo de la strato ni tuj flaris ĝin, kaj diris : jen venas la Ĉapelisto !

Ĉar li havis multajn klientojn en Aleso, li ofte vizitis la urbon kaj gastis alterne, jen ĉe mia onklo, jen ĉe mia patro. Li alportis donacojn aĉetitajn en aukciejoj, en Nimo aŭ Montpeliero, ofte iel strange elektitajn : bela oleopentrita portreto de nekonata knabeto, en orumita kadro, kiu kredeble iam prezentis intereson por la koncerna familio ; aŭ gipso-muldaĵo de la vizaĝo de same nekonata mortinto. Sed estas juste diri, ke la donacoj al mi estis ĉiam trafe plezurigaj. Inter alie, bela azeneto el griza felto, kun tuta leda jungilaro kaj ligna ĉareto, kiu poste perdiĝis en unu el niaj oftaj translokiĝoj. Tiuon perdon mi tre bedaŭras ; ĝi estis, de mia bona praonklo, la sola konkreta memoraĵo, kiun mi longe konservis.

Kiel ĉiuj familianoj de mia patro, la Ĉapelisto estis de malalta staturado kaj malgrasa korpo, vigla, rapidmova. Li havis fajrajn nigrajn okulojn, blankajn lipharojn kun mallongaj pintoj, sunbrunigitan vizaĝon, kaj, sub la nigra rando de la rigida "melonĉapelo", abundan densan hararon blankan kiel neĝo.

Iam mia patro anoncis : "La Ĉapelisto alvenis. Li aspektas kiel Brazilano." Tiu sibila informo vekis nian scivolemon, sed ni sciis, ke li ne precizigos sian diron, por domaĝi nian surprizon. Ni do pli-malpli pacience

atendis... ĝis aperis impona korsaro : blunigraj lip-
haroj, korvonigra harkasko nuancita per melongenkolo-
raj rebriloj - tinktura majstroverko de artisto friz-
isto. Konsternite, neniu, eĉ ne lia fratino, kuraĝis
kritiki aŭ moki. Sed li estis sufiĉe inteligenta kaj
sprita por mem kompreni, ke la rezulto ne respondis al
lia espero. Ekde la postvena vojaĝo, ni ĉiam revidis
lin kun liaj belaj neĝoblankaj kapo- kaj lip-haroj.

Li ne plu maljuniĝis laŭ ekstera aspekto ĝis sia
morto en okdekjara aĝo, kaj tia mi konservas lian afa-
blan bildon en mia memoro.

Inter la amikoj de mia patro, aparte karmemora estas al mi Klaŭdius D.

Li estis malalta, malgrasa kaj lama. Malgraŭ sia rigida kruro, li grimpis kun sciura lerteco sur altajn arbojn por dehaki aŭ desegi mortajn aŭ troajn branĉojn, foje ankaŭ por kolekti fruktojn.

Klaŭdius estis fraŭlo kaj vivis kun sia patrino en malgranda plaĉaspekta domo en la "Preria" kvartalo, trans la rivero. Malvasta ĝardeno, de ili ambaŭ ame kultivata, provizis legomojn kaj fruktojn en sufiĉa kvanto, kun bredado de kokoj kaj kunikloj, por vivteni ilin kaj por afablaj donacoj. Ionĉamante, li ekstre aldonis recepton: "Vi farĉos tiun ĉi brasikon." aŭ, pri fajnaj verdaj fazeolguŝoj: "Kuiru ilin en butero." Ofte en somero li regalas min per dikaj persikoj, sur la arbo maturiĝintaj; tiel frandegan guston mi neniam retrovis en iuj aliaj.

Ili estis tiel malavaraj kiel malriĉaj. Multaj pli-malpli sinceraj "kompanoj" sciis pri tio, kaj parazite ekspluatadis ilian gastigemon. "Kompano" estis la nomo, per kiu reciproke sin salutadis la liberecanoj, imite al la metiistoj migrantaj de urbo al urbo por sperte perfektigi en siafaka tekniko kaj arto.

Iam Klaŭdius veturis Parizon. Tie li vizitis la liberecanajn mediojn, la sidejon de la Anarkiista Federacio, kie Sébastien Faure redaktis la gazeton LE LIBERTAIRE kaj direktis la Anarkiistan Enciklopedion. Li vizitis ankaŭ la faman verkiston Octave Mirbeau. Li trovis lin en luksa apartamento (luksa almenaŭ laŭ lia kriterio), kaj li diris: "Oktavo, ĉi ne plu estas el niaj: ĉi estas burĝo". La verkisto-kompano respondis: "Ĝis ni faros la revolucion, ĉar la nuna socio estas tia, ĉu ne bone, se kelkaj el ni individue profitas el ĝiaj avantaĝoj?" Sed la rigora puremo de nia amiko ne kontentiĝis per tiel facila argumento.

Ankaŭ al Sébastien Faure li kritike riproĉis kaj admonis : "Atentu, Sebastiano : ci burĝiĝas!"

Nun, kiam en mia komforta salono mi sidas sur mola fotelo, kun la piedoj en pantofloj ripozantaj sur dika tapiŝo, mi iafoje memoras malgaje pri la kara Klaŭdius ; mi kredas vidi lin skui la kapon, kaj aŭdi lin mildavoĉe riproĉeti : "Rajmundo, ci ne plu estas el niaj..."

Mi ne scias, ĉu okaze de la vojaĝo al Parizo li iom dande sin vestis, sed en Aleso mi ĉiam vidis lin kun longe uzitaj pantalono kaj jako, kaj senforma kaskedo kline pendanta sur la dekstra orelo.

Super maldikaj lipoj, duonapertaj en ironia rideto, ombretis maldensaj kaŝtankoloraj lipharoj. Liaj flavebrunaj okuloj malicete brilis, disradiante bonkorecan esprimon.

Tiu milda anarkiisto, nekapabla malbonfari al muŝo, admiris kaj verve aprobis la nihilistojn, kiuj kondamnis kaj ekzekutis la policestron en Petersburgo.

Li revis pri la "granda vespero". Li diris al mi : "En revolucio, la unua farenadaĵo estos okupi la urbon kaj forbruligi ĉiujn arkivojn, komencante per la vivregistro : nur tiam la individuoj fariĝos liberaj." Kion li dirus nun pri la komputeraĵoj memorarkivoj?...

Li diris ankaŭ : "Rajmundo, malfidu la social-demokratojn. La marksistoj estas niaj plej danĝeraj malamiĵoj. Memoru la vorton de Roza Luksemburg : Kiam ni ekprenos la povon, nia unua tasko estos fusili la anarkistojn."*

Kvankam fraŭlo, li havis filinon, kredeble legitimita : ĉar, dezirante edziniĝi, ŝi petis lian oficialan konsenton. Li rifuzis dirante : "Ci estas libera. Se tiu knabo kaj ci volas kune kuŝi kaj vivi, vi ne bezonas ies permeson, ĉu de pastro, ĉu de magistratestro, ĉu de mi. Al vi solaj apartenas viaj korpoj kaj mensoj." Ĉar tamen la knabino insistis, nepre dezirante legitiman geedziĝon, li ridetante cedis al ŝia peto, dirante : "Nu, mi esperas, ke tiu sensignifa formaladaĵo ne malhelpos vian feliĉon."

3

Klaŭdius amike rilatis kun Bonnot kaj ties kunuloj,

* Mi ne scias, ĉu la frazo estas aŭtenta.

kiuj poste famiĝis, ĉirkaŭ 1910, proklaminte militon al la socio. La ĵurnalistoj nomis ilin "la tragikaj banditoj"***

Ili estis pioniroj en la "hold up"-arto. Traveturante la parizan regionon per griza aŭtomobilo, ili subite atakis bankojn kaj poŝtoŝtelojn. Dum monatoj ili spitas al la tuta pariza polico kontraŭ ili mobilizita.

Tiu obstina rezistado estis evidente senespera. Du paroj estis sieĝitaj, en antaŭurbaj vilaoj, de trupoj da armitaj policanoj kaj centoj da soldatoj. En la parte detruitaj domoj, tri mortis batalante, la kvar, vundite, estis arestita. Kvar frontis al tribunalo kun alte levita kapo, sentima rigardo kaj neta voĉo. Ili ridetante aŭdis sian kondamnon al senkapigo per gilotino. Unu el ili sukcesis sin mortigi per cianida veneno. La tri aliaj marŝis kuraĝe al la eŝafodo. Unu el liaj amikoj, senkulpa, estis per evidenta juĝeraro kondamnita al dumviva punlaborado. Kiam li revenis de Kajeno, liberigita post malfrua revizio de lia proceso, li estis blankhara maljunulo.

Antaŭ ilia freneza parizregiona aventuro, Bonnot kaj kunuloj ofte kunvenis en vilao apud Aleso. La polico, kiu ĉiam havas spionojn en la anarkiista medio, sciis pri tio. Ĝi longe kaj vane serĉadis komplikojn tra Ceveno, persekutis la konatojn de la bando, kaj juĝkomisie esploris en la hejmo de Klaŭdius.

Apenaŭ ĝustatempe avertita, li, tre timigita, haste forbruligis pakon da kompromitaj paperoj, inter kiuj troviĝis kelkaj leteroj de Bonnot. En tiu tro urĝa brulofero pereis ankaŭ leteroj al lia patrino senditaj de Louise Michel, la Ruĝa Virgino, heroino de la Pariza Komuno. Al ili ambaŭ tiu perdo kaŭzis senfinan bedaŭron.

4

Kiam en 1914 eksplodis la mondmilito, giganta tajdo-fluso levis la popolojn en Francio kiel en Germanio. La socialistoj, anoj de la Dua Internacio, partoprenis en registaro de "Sankta Unio". Predikistoj de revolucio kaj socia milito ekprenis al sia buŝo la heroan trumpeton.

** Ĉu ja banditoj ? Fakte jes. Sed ne ordinaraĵoj krimuloj. Kiuj konis ilin persone, tiuj rigardis ilin kiel sincerajn idealistojn ; kaj oni ne povas forrifuzi al tiuj romaneskaj aventuruloj ian tragikan grandecon.

Sekvis anarki-sindikatanoj kaj anarki-teoriistoj
(tamen ne Sébastien Faure).

Inter niaj konatoj, amiko Klaŭdius estis, krom mia
patro, la sola, kiun mi vidis rezisti al la kontraŭa
frenezo. Dum sia tuta vivo li restis firma en siaj ideoj
kaj fidela al sia idealo.

Ales', mia Ales', tiel beleta!
(La Faro, okcitana poeto)

1

Ĝis la komenco de la 19a jarcento, oni diris kutime : Aleso, malgranda urbo apud Anduzo. En la Mezepoko, la barono de Anduzo etendis sian feŭdan ĉefecon super vasta Cevena teritorio. Post la Reformacio, la urbeto fariĝis grava protestanta centro ; ankoraŭ nun ĝia kalvinana templo estas la plej ampleksa en Francio. Ĝi havis prosperan industrion : silkoŝpinejoj kaj vaste famaj ĉapel-fabrikaj.

En ĝia ombro kreskis Aleso, jam pli granda urbeto, kun 25 000 civitanoj. Ankaŭ ĉi tiu havis historian kaj ekonomian gravecon. Se ĝiaj sinjoroj estis malpli potencaj, kompanse ĝi estis, antaŭ la Revolucio, sidejo de katolika episkopo kaj de provinca subguberniestro. En ĝi ĉiujare kunvenis, por difini la dividon de la reĝaj impostoj, la civilaj delegitoj de la Cevenaj paroĥoj. En la urbodomo, en 1629, kardinalo Richelieu, ĉefministro, kun ĉeesto de reĝo Luizo XIIIa, subskribis kun la militistaj ĉefoj de tuta protestanta Francio la Favor-Edikton, kiun la hugenotoj prefere nomas la Alesa Packontrakto.

En Aleso Pasteŭro pristudis la specian malsanon de silkraŭpoj kaj eltrovis kuracrimedon kontraŭ ĝi. Tial staras en publika ĝardeno lia statuo el bronzo, kun dediĉo de "dankemaj silkraŭp-bredado kaj silkindustrio".

Krom silkoŝpinado, Aleso posedis aliajn gravajn industriojn ; karbo- kaj fer-minejoj, nun velkintaj, tiam floris kaj naskis aktivan metalurgion. Kaj daŭre vivis pli antikva : vitrofabrikado, laŭfame fondita de Fenicianoj.

Iam mi vizitis vitrofabrikon. En la ruĝa brilo de arda fajrego staris muskolfortaj viroj kun nuda torso, ŝvitantaj antaŭ inkandeska maso da fandita vitro. Per longa fera tubo ili prenis globeton el la mola pasto, blovis tra la tubo por formi vezikon, kaj per lertaj movoj havigis al ĝi la formon de botelo, aŭ de pli longa cilindro; en tiu lasta okazo, oni fendis la cilindron laŭ rekta linio, kaj derulis ĝin en maldika tavolo sur ebena, kie ĝi malvarmiĝis kaj solidiĝis : tiel estis fabrikitaj la vitroplatoj por fenestroj kaj similaj. La blindiga brilo

de la vitropasta maso, la ruĝblankaj sparkoj, la nigraj gigantaj ombroj de la vitristoj, la bruado de la blovil-egoj faris en tiu sceno efektan, kvazaŭ inferan spektaklon.

Ankaŭ nudtorse laboris la ministoj en la varmo de la subteraj galerioj, kaj la silkoŝpinistinoj dum horoj sidantaj antaŭ pelvoj da bolanta akvo, en kiuj ili bate disvolvis la kokonojn. Tiajn gelaboristojn mi ne vidis mem en iliaj laborejoj, sed mi renkontis ilin surstrate. Mi memoras pri la ministoj revenantaj de la minejo kun nigra vizaĝo, ĉar ili ankoraŭ ne kutimis blanke ŝmiri ĝin, kaj portantaj sian Davy-lampon.

Mi memoras ankaŭ pri bruaj, imponaj manifestacioj de strikantaj ŝpinistinoj, ministoj aŭ metalurgiistoj, kaj, kiam striko anonciĝis, pri la timiga parado de armitaj taĉmentoj da ĝendarmoj aŭ militistaj trupoj.

Dum la industria proletaro vekigis al klaskonscio, la tradiciaj metiistoj konservadis siajn mezepokajn kutimojn. Ĉiu korporacio celebris sian patronfeston. La 2a de decembro estis tiu de Sankta Eliĝo, patrono de orajistoj, forĝistoj kaj ĉiaj metallaboristoj; la 4a de decembro, tiu de Sankta Barbara, patronino de subfosistoj kaj ministoj, artilerianoj kaj fajro-brigadanoj. Sian patrontagon festis ankaŭ la panistoj kaj kukistoj, la ĉarpentistoj, la masonistoj ktp. Ili solene procesiis sur la stratoj, portante riĉe broditajn standardojn, statuetojn kaj "ĉefverkojn" de kompanoj freŝe akceptitaj kiel majstroj. Antaŭiris muzikistaro, kaj sekvis defilantaj kompanoj en tradicia kostumo, kun bastono kaj ĉapelo ornamitaj per korporacia rubando. Ili kantis malnovajn kantojn en okcitana dialekto, kiel "Mi volas masoniston, patrino, mi volas masoniston!" (kiel edzon).

Alia okazo de ĝojeksplodo estis la tago de la rekrutrevizio. Dum tiu tuta tago, la deknaŭ-jaraj rekrutoj, en kelkopaj grupoj, disvagadis tra la urbo, duonebriaĵoj pro drinkado kaj ĝojo, kantante, ĉiam dialekte, pli-malpli decajn kanzonojn, kaj atakante ĉiun renkontatan knabinon por ŝin perforte kisi. Sed neniam okazis opaj brutalaj seksatencoj, kiajn oni vidis en aliaj okazoj en la lastaj jaroj. La koketaj knabinoj sciis, ke tiuj atakoj estas sendanĝeraj, kaj nur ŝajne ili provis rezisti: simpla ambaŭflanka ludo.

La ĉefa festotago estis la nacia, la 14a de julio, datreveno de la venka atako kaj kaptado de la Bastilo far la Pariza popolo en 1789. Dumtage okazis oficialaj ceremonioj kaj militista parado, kiun miaj gepatroj neniam ĉeestis. Ni ekskursis ekster la urbo, sed vespere, kvankam lacaj, ni revenis por spekti la belan prezentadon de piroteknikaĵoj. Poste ni revenis hejmen, dum daŭris ĝis frumateno la strataj popolbaloj.

2

La fajrarta spektaklo okazis sur vasta placo, ĉe la piedo de alta teraso, kiu apudas naturan altaĵon. Sur la supro de tiu altaĵo staras fortikaĵo konstruita en la 17a jarcento. Ĝi superas la tutan urbon, kiu kuŝas sur la ebena valo de Gardono, ĉe la maldekstra bordo.

Gardono estas la komuna nomo de pluraj Cevenaj torenoj, kies kuniĝo formas la riveron Gardo. Tiu, post krutvalo, en sia lasta parto pasas sub la fama akvedukto "Pont du Gard", konstruita de Gallo-romanoj, antaŭ ol enflui Rodanon.

En la trairejo de la urbo, longa kajo ŝirmas la malaltajn stratojn kontraŭ inundoj. Se nur ili ne atingas tro altan nivelon.

La Alesa Gardono, kiel ĝiaj fratoj, estas kaprica rivero. Vidu ĝin en somero : magra flueto, pigre serpentumanta inter sablotavoloj, sur kiuj la lavistinoj etendas siajn tukojn en sunlumo. Kiu supozus, ke en la periodo de aŭtunaj fulmotondroj ĝi subite ekkoleras ? De la altaj krutdeklivaj Cevenvaloj ruliĝas dikegaj akvomasoj, kiuj tuj plenigas la riverujon. Kiam ankoraŭ ne ekzistis telefono, oni avertis pri tiuj abruptaj river-altiĝoj per rajdanta kuriero. Galopinte dekkvin kilometrojn de Grand-Kombo, li urĝe anoncis laŭtvoĉe : "Gardono venas !" La lavistino disponis apenaŭ sufiĉan tempon por levi kaj forpreni sian tukaron, sekan aŭ ne, kaj forkuri. La rivero efektive "alvenis" kiel rapida tajdofluso en la tuta larĝo inter la kajoj. Jen ĝi muĝas kaj ondas kiel tempesta maro. Ĝi transportas branĉojn, eĉ elradikigitajn arbojn, kiuj frakase batas la pontpilierojn. En oktobro 1907, la akvo invadis nian straton ĝis unumetra alto. De sur la ponto, kliniĝante super la randmureto, ni povis tuŝi la akvosurfacon per la pinto de la fingroj.

Impresa spektaklo, tiu grizflava ondmoviĝanta masego sub peza ĉielo el plumbegrizaj nuboj.

Sed escepta spektaklo. Ordinare la rivero ŝajnas tute bonvolema, neniel danĝera, kaj la urbo trankvile ridetas ĉe ĝia bordo, apud la piedo de du belprofilaj montetoj. Sur unu, inter restaĵoj de prahistoria "oppidum", staras preĝejo nomita Ermitejo. Supre de la alia estas, apenaŭ videbla de la valo, ruino de fortikigita monakejo. Sur iliaj flankoj vidiĝas la blanko de kalkoŝtono tra grizverdo de olivarbaj foliaroj kaj timiantufoj. Lastaj gardostarantoj de Ceveno, ambaŭ montetoj fermas la vidon al nordo, kiel fono de agrabla pejzaĝo. Malantaŭ ili sin kaŝas la Ceveno-krestoj, videblaj de la altaj partoj de la urbo, ĝis la Lozer-monto, 1700 metrojn alta, kies supro vintre kovriĝas de neĝotavolo.

De la urbo, la vojo al sudo kuras sur verda horizontala ebenaĵo ĝis la "garigo" antaŭ Nimo. La vojoj al nordo kaj okcidento baldaŭ penetras en valetojn, en kiuj ili torde grimpas al montpasejoj. Oriente, en la direktoj al Uzeso kaj Banjolo, ili renkontas ankoraŭ kelkajn altaĵojn. Inter ili la Bukedmonto, granda izolita maso, impone elstaras meze de la ebenaĵo.

La vojo al Banjolo iom krute altiĝas, ekde la urba eliro, al la proksima tombejo. Tiam la nekropolo estis ankoraŭ per muraj interbaroj dividita je tri partoj : protestanta kaj katolika, egalampleksaj ; inter ili, premata kiel kojno, la malvasta juda, kun malalta pordo, sur kies imoŝto estas ĉizita, en lingvoj hebrea kaj franca, biblia sentenco : "Se ciaj virtoj iros antaŭ ci, ci estos akceptita en la gloro de la Eternulo".*

En la katolika parto estas la tombmonumento de mia patrina familio, inkluzive de la protestanta avo, kaj en la protestanta tiu de mia patra parencaro. Kiam ni ĝin vizitis, mia avino, frapante per la pinto de sia ombrelo, montris al mi : "Tie kuŝas avo, kaj tie apude estas mia loko." En ambaŭ restas elekteblaj lokoj por mia edzino kaj mi - sed al ni estas indiferece, kien oni sternos niajn kadavrojn. Al mi ne malplaĉus imagi, ke la mia eble falos en maron, kaj la karno fariĝos frandaĵo por ŝarkoj aŭ kraboj ; sed, se ĝi estas nutronta nur honestajn ter-

* Jesaja, 51-8 - Teksto en la esperanta Londona Biblio :
"Via virto iros antaŭ vi ; la gloro de la Eternulo
gardos vin malantaŭe."

vermojn - nu, ankaŭ bone !

3

De la tombejo revenante, en krepuska horo, mi ofte ĝuis belegan vidaĵon.

Tuj post kiam la suno sin kaŝis malantaŭ la montsiluetoj, ĝiaj diverĝantaj radioj trastrekas la ĉielon kiel la faskoj de lumtura lanternego. Ili koloras la nubojn per riĉa paletro de diversaj ruĝoj : fajre roza, oranĝa, ora, kupra, skarлата, purpura, kun brilegaj arĝentaj borderaĵoj. La formoj kaj la koloroj de la mirindaj nuboj ŝanĝiĝas ĉiumomente dum la daŭro de la krepusko.

En la valo, iom post iom, ombrigas la urbeto, kviete kuŝanta en la konkavo de la rivera kurbo.

4

Jes, beleta estas mia urbo.

Kaj vivoplena. Ĉiulunde matene, sur la bazarplaco, kampulinoj venis prezenti la produktojn de siaj fruktaroj, legomĝardeno kaj birdokorto, kiujn marĉandis la urbaninoj. Dume, sur alia placo kun arkadoj teniĝis la pogranda bazaro.

Dimanĉe, sur du placoj kun kioskoj, alterne koncertis la du urbaj muzikistaroj : la Filharmonio kaj tiu de la fajrobrigado, kies estro estis bona muzikisto kaj fameta komponisto.

Ĉirkaŭ la kioskoj, en la urba parko kaj sur la "ŝoseo", larĝa aleo kun platanoj, sidis aŭ promenis la dimanĉe vestitaj familioj. Ŝercantaj soldatoj gaxis al servistinoj kaj mamnutristinoj. Junaj oficiroj, trenante sian sabron, sonigante siajn spronojn kaj pinĉfrizante siajn lipharojn, okulumis al belulinoj. Inter la amaso pasis vendistoj de vafloj, kaj la promenantoj ofte haltis ĉe la budoj de glaciaĵistoj.

Entute, klasika dimanĉo en provinca urbeto.

5

Nun Aleso havas rektajn stratojn kaj larĝajn avenuojn inter altaj novaj domegoj kun moderne ekipitaj loĝejoj. Kiu povus bedaŭri la serpentajn stratetojn de mia infanco, kun iliaj nigraj domoj, pli pitoreskaj sed malkom-

fortaj - kvankam la dikaj muroj estis efika ŝirmo kontraŭ varmo kaj malvarmo kaj kontraŭ la ekstera bruo.

Cetere, la bruo estis malpli forta kaj nervostreĉa ol nun. Eĉ sur pli largaj stratoj cirkulis nur malmultaj, nerapidaj aŭtomobiloj : ne tre disvastigita vetur-rimedo, uzata de kelkaj kuracistoj kaj de originalaj riĉuloj. Pli multaj estis ankoraŭ la fiakroj, kaleŝoj kaj aliaj ĉevalveturiloj.

Inter ĉi tiuj estis facile rekoneblaj la rapidaj, malpezaj veturiloj kun du grandaj radoj de la alkohol-kontrabandistoj. Ili okupis ne malgravan situacion en la loka komerco. Kompreneble, ĉiu el ili estis bone konata ; sed la akcizistoj ne persekutis lin, ĝis ili konjektis lin sufiĉe riĉiĝinta, ke li povu pagi decan monpunon sumon. Mi supozas, ke tiuj honorindaj sinjoroj, aŭ iliaj posteuloj, nun konvertiĝis en pli modernajn trafikojn ; eble eĉ, kial ne ? en honestajn, aŭ almenaŭ licajn vivrimedojn.

Estas ja permesite revii, ĉu ne ?

6

Ni loĝis unue en teretaĝa apartamento, ĉe avenuo, kiu estas la vojo al Nimo. Inter ĝi kaj la riverkajo kuŝas la "ŝoseo"-promenejo. Antaŭ la domo, korteto, sur kiu mi ludis en la ombro de platanoj.

De la malantaŭa fenestro mi vidis la taŭrocirkon, kiu estas nevasta kaj malbela konstruaĵo, neniel komparebla kun la monumentaj amfiteatroj de Nimo kaj Arlezo. En ĝi riskema junulo, amiko de mia onklo la aŭtisto, sin ekzercis al "morto-salto" sur biciklo. Mi rigardis lin mal-suprenruliĝi sur ligna dekliva vojo ; li malaperis malantaŭ la ĉirkaŭmuro ; aŭdiĝis ekfrapo, kaj la viro kun sia maŝino turniĝante reelŝprucis alte en la aeron, antaŭ ol fali sur siaj radoj interne de la ronda muro.

Poste miaj gepatroj luprenis alian loĝejon en pli centra kvartalo, super la Borso-kafejo. Sur la unua etaĝo estis la apartamento de juĝisto, prezidanto de la urba tribunalo, grava ŝtatoficisto, kaj en mia imago granda riĉulo. Apude, bela solena pordo kun ŝildo "Socia Emancipado" : sidejo de socialista klubo. Sur la dua etaĝo loĝis Stefanana paro tre simpatia. La edzo estis vicmaŝtro en ciklofabriko. Bedaŭrante ne havi idon, ili kom-

pense dorlotadis ĉarman hundeton, kaj ameme rilatis al alies infanoj, kiel mi. Kun ili ni amikiĝis, kaj daŭre korespondadis, kiam ili reiris al sia hejma urbo San-Stefano.

Ni okupis ĉambrojn sur la tria etaĝo, senpere sub la tegmento. Apud la kuirejo, en pli malalta subtegmento, loĝis katino kun siaj idoj. Sovaga besto, kiu akceptis manĝaĵojn, sed ne karesojn. Se iu provis afable proksimiĝi, ĝi arkigis la dorson, snufis, sible blovis kaj elmontris mordemajn dentojn kaj skrapopretajn ungojn. Ĝi estis akrobato. Ĉu vi jam vidis katon fari lopon? Tiu suprengrimpis muron, kuris kelkajn paŝojn renversite sub la plafono, kiel muŝo, kaj mole falis al la planko sur siaj kvar piedoj, en gracia returna movo. Mi opiniis ĝin iom freneza. Kiam ni forlasis tiun loĝejon, la katino energie rifuzis sekvi nin, kaj restis en sia subtegmento.

Fine ni instaligis en domo, kiu estis proprietaĵo de la patraj geavoj. Ili aĉetis ĝin per kredito, kaj devis longe kaj pene ŝparadi por repagi per jarrento la pruntitan sumon kun la interezoj. Tiu domo situis sur la Granda-Strato, antaŭe nomita Rekta-Strato, kvankam ĝi estis nek granda (nur longa) nek rekta, sed fakte kurba, paralele al la rivero. Pri tiu loĝejo mi pli detale skribos.

Alvenis ciganoj.

La tribeto haltis ĉe ekstremaĵo de la urbo, instalis siajn loĝveturilojn sur placeto kaj dejungis la ĉevalojn, kiuj nun sin paŝtas apude sur magra herbejeto. La bistravizaĝaj homoj, sidantaj aŭ kaŭrantaj, plektas korbojn el salikbranĉetoj. Krom tio kaj iafoje montrado de dresitaj ursoj, la ĉefa okupado de la viroj estas negoco de ĉevaloj kaj muloj. Kelkaj virinoj diligentas ĉirkaŭ rapide ekbruligita fajro el branĉaĵoj por prepari la baldaŭnan tagmanĝon. Ĉirkaŭ la plenkreskuloj svarmas ludantaj, pepantaj kaj kverelantaj gebubetoj, duonmudaj, malpuraj ; kaj ĉarmaj kiel ĉiuj infanoj en la mondo.

Posttagmeze la virinoj kun bunta fulardo kaj longa larĝa jupo iros al la urbo oferti al eventualaj klientoj korbojn kaj diversajn bagatelaĵojn ; ili proponos al naivaj pasantoj "diri la bonan aventuron", t.e. antaŭdiri la sorton, kiun ili legas en la linioj de la maldekstra mano ; kaj kelkaj simple almozpetos kun bebo sur brako kaj alia en la ventro. La pli junaj ofte estas tre belaj, kun flamaj okuloj kaj sentima provoka rigardo. Tamen ne fidu flirtemaj galantuloj : se ili celus facilan amor-aventuron, ili certe mistrafus, kaj spertus humiligan rifuzon.

Post kelktaga restado la ĉevaloj estos rejunigitaj, kaj la karavano ekmigros al alia urbo. Tiuj vaguloj, ofte suspektataj pri ŝteletado aŭ almenaŭ marodado, estas tamen ĝenerale rigardataj kun indulgemo kaj eĉ simpatio.

Inter tiuj eternaj nomadoj, kelkaj, tre malmultaj, fiksiĝis en la urbo kiel daŭraj enloĝantoj. Unu el ili estas granda fortika virino, bone konata de la polico kaj de la tuta urbo kiel vendistino de kontrabandaj alumetoj, malpli karaj kaj laŭfame pli bonkvalitaj ol tiuj de la ŝtata monopolo. Ili formas piramid-trunkajn fasketojn, kelkope kuntenigante per la piedoj, kaj la fosforruĝaj kapoj iomete disstarantaj ; ne en skatoloj, sed en simpla dikpapera volvaĵo, la vendistino tenas

ilin en grandaj poŝoj de sia subjupo ; per la volumeno, kiu ŝveligas ŝian ampleksan jupon, kaj la fosfor-odoro, kiun ŝi ĉiam trenadas post si, ŝi ne pasas nerimarkite.

Jen ŝi frapis al la pordo, kaj abrupte eniras en nian kuirejon, anhelante kaj spasme parolante : "Urĝe, sinjorino, aĉetu mian tutan provizon, mi faros al vi rabaton, sed rapide, kaj tuj kaŝu ĝin, ĉar min sekvas pelanta policano, mi timas, ke li baldaŭ alvenos, kaj prenu ankaŭ tiun ĉi pakaĵon da sendanĝeraj pingloj, kaj montru ĝin al li, se li demandos, kion vi aĉetis de mi..." Vera parolmuelilo, kaj samtempe la brilaj okuloj ĉiudirekten turniĝadas, la brunaj vangoj ruĝe ardas, la nigra harkasko onde moviĝadas. La fortikulino fariĝas bela kiel tragedia aktorino, kaj la klientino ne rezistas al ŝia subjuga influo.

2

Duonnomadaj estis la migrantaj hispanoj el provinco Aragono, kiuj venis dungiĝi en farmoj kiel taglaboristoj, individue en ĉiuj sezonoj aŭ pli amase dum la vinberrikoltado. Ili estis silentemaj, suple marŝantaj en ŝnurplandaj tolŝuoj, kaj tuj rekoneblaj per la zorge faldita lana litkovrilo, kiun ili portadis sur la maldekstra ŝultro.

Pli multaj estis la hispanaj restadantoj, komercistoj, kiuj monopoligis la vendadon de sudlandaj fruktoj. Oni diris : "Iru aĉeti oranĝojn, aŭ melonon, ĉe la hispano". Unu el tiuj estis vickonsulo de Hispanio, influhava membro de la urba komerca ĉambro, riĉulo, sed tre afabla, konata de la tuta urbo kaj tre populara. Li marŝis en iom solena balancpaŝado, kun la ventro antaŭe kaj la ĉapelo malantaŭen ŝovita sur la nuko ; malgraŭ tio, dank'al la senafekta, bonvola esprimo de lia vizaĝo, li aspektis tute simpatie. Li parolis perfektan francan lingvon laŭ la alesa prononcmannerio, kaj lian nacian devenon apenaŭ perfidis malforta rulado de r kaj preskaŭ neperceptebla gingivigo de s al ŝ.

Inter la italoj - ŝuflikistoj, diversaj metiistoj kaj komercistoj - estis ankaŭ unu riĉa, eminenta kaj populara homo, vendisto de ĉapeloj. Tiu ĉi, post kvardekjara vivado en nia lando, neniom perdis el la karakteriza parolmaniero de sia itala provinco.

Multaj rigardis ankaŭ kiel fremdulojn la savojanajn - kamenskrapistoj, portistoj, ŝuciristoj -, ĉar Savojo, itala provinco, estis aneksita al Francio nur en 1860 : pasis apenaŭ duonjarcento.

Poloj estis el du klasoj : unue tri kuracistoj, due kelkaj judoj - tajloroj, peltistoj, juvelistoj. Ĉi tiujn distingis iliaj germandevenaj nomoj, same kiel tiuj de la francaj judoj - teksaĵvendistoj kaj aliaj komercistoj. Sed ili estis neniel apartigitaj de la cetero de la popolo, krom en la tombejo, kiu estis en tiu tempo, mi jam diris, laŭreligie dividita.

Fakte la alesanoj estis nek naciistaj nek rasistaj. La araboj ankoraŭ ne konkurencis la enlandajn laboristojn, ili nur vendis arakidojn aŭ tapiŝojn de malalta kvalito. Pitoreskaj, kun sia ruĝa tarbuŝo kaj sia pufa pantalonon, ili estis rigardataj sen malŝato, simpatie traktataj kaj familiare alparolataj per la nomo "sidi" (oni ĝenerale ne sciis, ke ĝi signifas "sinjoro" en araba lingvo).

Unu el la ĉefaj komercistoj estis vendisto de kafo, kun la slogano : la reĝo de la kafoj kaj la kafo de la reĝoj. Iam li aĉetis imponan kafrostan maŝinon, brilmetalan, kiun li instalis en vitritan ĉambron, por ke ĝi estu videbla de la strato. Tiu viro posedis la genion de reklamo. Por prizorgi kaj funkciigi sian belan maŝinon, li dungis junan negron el Kongolando, kun plej nigra haŭto kaj blankaj dentoj, tre gaja, ĉiam ridanta aŭ ridetanta. En sia ofico li portis pimpan livreon, kaj ekstere en urbo li estis ĉiam dande vestita. La eŭropaj vestoj tute konvenis al la gracio de lia figuro kaj al la natura eleganteco de liaj teniĝo kaj movoj. Ĉiuj konis lin, li estis dorlotata karuleto de la tuta urbaninaro. Kiam li aperis ĉe stratangulo, "Sinjoro Alfonso! Sinjoro Alfonso!", tuj ekflirtis ĉirkaŭ li trupeto da koketaj knabinoj, kiel papilioj ĉirkaŭ floro.

3

En printempo 1913 neatendite alvenis strangeta persono. Viro de alta statur, maldika sed fortika, kun longaj ruĝflavaj lipharoj. Liajn piedojn vestis fortaj ŝuoj de vojmarŝanto ; aparte rimarkinda estis lia vesto, aŭ pli ĝuste kostumo : tirola pantaloneto kaj longaj ŝtrumpetoj

lasantaj la genuojn nudaj, diktola blanka jako kun grandaj verdaj steloj sur bendoj ĉe ambaŭ manikoj, kaj blanka kolonia kasko kun larĝa rubando portanta surskribon el dikaj verdaj literoj : **ESPERANTO**.

Li estis germano, dungita de la firmo Hachette en Parizo por propagandi nian lingvon kaj samtempe reklami por la firmo, kiu akiris eldonrajton pri la verkoj el la "kolekto aprobita de Dro Zamenhof". Tiucele la neordinara turisto trairadis Eŭropon, ĉiam piede, vendante ilustritajn poŝtkartojn kun propaganda teksto kaj bildo prezentanta lin kun kolomboj antaŭ la preĝejo Sankta-Marko en Venecio.

Laŭdire la vendado de tiuj kartoj estis la sola monhaviga rimedo por lia vojaĝo, kaj tio estis ja kredebla, ĉar en ĉiu trapasata urbo li estis senpage gastigata de samideanoj. Li pasigis du tagojn en nia hejmo ; mi promenigis lin tra la urbo, kaj ni kune vizitis ĉiujn membrojn de nia juna grupo. Preskaŭ ĉiuj ankoraŭ ne sciis multe pli ol "bonan tagon". Krom la instruanto kaj mia patro, mi estis la sola parolkapabla, kaj mi tre fieris, ke mi, juna knabo, povas servi kiel interpretisto.

Tial mi alvenis kun granda memfido ĉe unu el la polaj kuracistoj, kiu estis ne tre diligenta lernanto en la esperanto-kurso... sed tie min atendis spito. Tiu pola sinjoro parolis la francan lingvon tute flue, ĝuste kaj elegante, sen ia plej eta fremda prononco aŭ tono. Mi do prezentas al li nian turiston, klarigante, ke li tute ne komprenas la francan ; sed apenaŭ mi menciis pri lia nacieco, jen la doktoro tuj alparolas la migranton en flua germana lingvo - kaj mi, neutila interpretisto, restas ekster ilia konversacio, el kiu mi eĉ unu vorton ne komprenas.

Tio tre malplaĉis al mi. En mia infana logiko, mi ne povis konsenti, ke malsamnacianoj uzas inter si alian komunikilon ol la lingvon internacian. Kaj tiurilate, mi post pli ol sesdek jaroj ankoraŭ ne tute eliĝis el la infaneco.

Unua kontakto kun lernejo okazis en mia tria jaro. Matene la afero komenciĝis glate. Sed dum la unua paŭzo, iu "grandulo" (sesjara) pretendis timigi min per ludilo prezentanta serpenton el artikigitaj lignaj eroj, nigre kaj verde farbitaj. Tiun pretendon mi sentis kiel insulton al mia juna inteligento : por kiu oni prenis min ? Mi ekkoleris, kaj estis tiel spilita, ke mi rifuzis reiri en tiun lernejon.

Kelkan tempon poste, mi estis kondukita al alia pli malproksima de la hejmo, ĉe Abatejo-Placo. Oni devis supreniri kelkajn ŝtupojn por atingi la teretaĝon de tiu "patrina lernejo"; kie min akceptis afablaj instruistinoj.

Ĉar mi estis ofte malsana, mi malregule ĝin vizitis. Neniam sufiĉe longe por parkeri la kantojn, kiujn kantis la lernantoj vice marŝante ĉirkaŭ la interna korto. Por tamen ne tute apartiĝi, mi takte malfermis la buŝon, eligante nenian sonon.

Malgraŭ la kompetento kaj la granda sindonemo de la instruistinoj, mi nenion lernis. Mi pasigis la horojn desegnante per grifelo aŭ kreto sur ardezo, laŭ propra inspiro, personojn aŭ bestojn. Iam la instruistino gratulis min pri bele desegnita bovino, kaj ŝi aldonis : "Bone, sed endus ankaŭ kopii la literojn, kiujn mi skribis sur la nigra tabulo." Al tio mi respondis kun senarmiga sincero : "Mi ne scipovas. Estas tro malfacile."

Tiu ardezo akompanis min ĉie, ankaŭ en la lito, kiam mi kuŝis malsana. Iam mia patrino trovis min plorantan. Desegninte knabon, mi konstatis, ke li havas ses fingrojn en ĉiu mano. Mia patrino ridante diris : "Nu, jen ja grava afero! Sufiĉas forviŝi po unu fingro el ĉiu mano." Mi rigardis al ŝi kun rondaj okuloj. Ĉu tiel stultaj estas la plenkreskaj personoj ? Kompreneble, sufiĉas forviŝi ! Kirurgia operacio : kion tio ŝanĝos en la fakto, ke mia knabo naskiĝis nenormala ?

* vartejo.

Tiel mi atingis mian sepan jaron, ne lerninte "b,a ba". Mi memoras, kian impreson mi ricevis de iu skribaĵo aŭ presaĵo : la saman, kiun kaŭzas nun al mi la vido de hebrea, araba aŭ ĉina teksto.

Mi akiris legokapablon per empiria, suma "metodo", se tiel diri, deĉifrate la ŝildojn de urbaj magazenoj. Tiu ekzercado tre ekscitis min, kaj mi rapide progresis. Baldaŭ mi povis legi libretojn kaj mi fariĝis fervora leganto.

Ne estas kulpo de miaj bonaj instruistinoj, ke mi ne pli frue vekiĝis, sed, ekde kiam mi forlasis ilian "patrinan lernejon" por eniri en la "unuagradan", mi, spontanee maturiĝinte, fariĝis bona lernanto - malgraŭ la pludaŭrado de oftaj forestoj.

Komence mi vizitis novan lernejon en Pasteur-strato. La unuan jaron, ĝi konsistis el nur du klasoj. En la pli-alta, dekdujaraj knaboj sin preparis por la atesto pri lernado. En la alia, unu sola instruisto okupiĝis pri kvardeko da buboj grade dispartigitaj inter la aĝoj de sep ĝis dek unu jaroj. Ĉiujn, laŭ iliaj diversaj niveloj, li devis instrui pri legado, skribado, kalkulado, gramatiko, ortografio, geografio, historio, civitana instruado, moralo, desegno, muziko kaj elementoj de naturscienco modeste nomitaj "lecionoj pri aferoj" (konkretaĵoj). Giganta tasko, kiun tre kontentige plenumis tiu eksterordinara pedagogo.

Ĉiun novan jaron oni aldonis unu klason kun unu plia instruisto, kaj la tasko de la mia tiome malplipeziĝis. Restinte kun li ĝis mia deka jaro, mi konservis alt-respektan kaj admirplenan memoron pri tiu viro. Li estis juna, malalta, vigla kaj fervora, kun dikaj nigraj lipharoj, agrabla voĉo kaj penetranta rigardo en tamen mildaj brunaj okuloj.

Transirinte al la Nov-Kaja lernejo, ankaŭ tie mi trovis bonajn, kompetentajn kaj sindonemajn instruantojn. Ĉi tie mi volas omaĝi al tiu kolegaro de la laikaj instruistoj de la Tria Respubliko. Sufiĉe kleraj por efike doni al la infanoj solidajn elementajn sciojn, ili montradis moralajn ecojn, precipe profesian konsciencon, superajn al ĉiuj laŭdoj. Ofte ateaj, ili eniris pro vera alvokiteco en tiun metion, kiel aliaj monakiĝas, kaj ili ĝin plenumadis kiel pastrecan servon. Konsciaj pri la alta valoro de sia misio, ili restis persone humilaj, kaj neniel strebis al honoroj.

Ĉu mi riproĉu, ke ili tro plenŝtopis miajn junajn cerbojn per patriotismo ? Ne : ĉar ili obeis nur al sincera konvinkiteco.

Nun certe mortis miaj bonaj instruistoj. Iliaj nomoj restas gravuritaj en mia koro, kaj mi elvokas ilin kun senfina dankemo.

3

En Aleso, ĉefurbo de minregiono, estas faka lernejo, kiu formas ĉefministrojn kaj inĝenierojn per teoria kaj praktika instruado. En la daŭro de tiu instruado, la lernantoj devige laboras kvincent tagojn en karbominaj galerioj. Al tiu lernejo, plej supera en la urbo, mi dediĉis la ambicio de miaj gepatroj. Sed en 1906 okazis en norda Francio la terura katastrofo de Kurjero, en kiu pereis 1 200 ministoj. Ĝi kaŭzis konsternegon en ĉiuj minregionoj, kaj la gepatroj strebis deturni min de tiu projekto, pri kiu mi jam revis kun ili.

Mi do daŭrigis mian unuagradan lernadon sen preciza celo. Baldaŭ mi viciĝis kiel unua en ĉiuj teoriaj fakoj ; sed, dum en matematiko kelkaj kunlernantoj preskaŭ egalas min, mi aparte elstaris en franclingvaj ekzercoj. La instruisto konsilis, ke mi daŭrigu mian lernadon en liceo (ginnazio), kaj en la klasika (literatura kaj filozofa) fako. Sed mi sentis min pli logita al matematiko kaj ekzaktaj sciencoj ; kaj precipe, konscia pri mia natura mallerteco, mi tre deziris ekzerciĝadi kaj pliperfektigi en manlaboroj. Tial mi elektis por la dua grado la praktikan, profesion lernejon ; tie mi lernis laŭ ĝusta tekniko prilabori feron kaj lignon. Ekde tiam mi celis la inĝenieran lernejon de Artoj kaj Metioj, ĉar mi sciis, ke en ĝi la teoriaj studoj alternas ĉiutage kun kvarhora manlaborado.

IX - KNABETO EN ĈAMBRO KAJ BUBOJ SUR STRATO.

1

Ofte, malsana, mi restadis hejme.

Nia domo konsistis el du simetriaĵoj konstruaĵoj, rigardantaj unu al la strato, la alia al ĝardeneto duon-etaĝe pli alta, ĉirkaŭita de altaj dommuroj. Tiuj muroj estis tegitaj de ampelopsa foliaro tute ruĝa en aŭtuno. Inter ambaŭ partoj de la domo, komuna ŝtuparo kondukis al la ambaŭflankaj etaĝoj. La ŝtuparo kaj la etaĝaj placetoj okupis nur parton de la spaco inter la du konstruaĵoj. Apude, apartigita per ferkradaj parapetoj, restis malplena spaco, pli ol du metrojn longa kaj larĝa kaj dek metrojn alta. La tuton lumigis tegmenta vitraĵo.

Ni loĝis sur la tria etaĝo, kun la dormoĉambroj ĉe la ĝardenflanko. Al la strato rigardis la "mangoĉambro", uzata nur en grandaj okazoj por manĝi kun gastoj aŭ akcepti vizitantojn, kaj la vasta komuna ĉambro, kiu servis kiel kuirejo kaj kutima vivejo. Tie ni manĝis, tie mia patrino mastrumis, lavis, gladis, kudris per sia pedala stebmaŝino. Antaŭ tie mi faris miajn taskojn kaj lernis miajn lecionojn, ĝis mi disponis en nia dormoĉambro la skribotablon faritan de mia patro. Kaj tie, matene, oni instalas la zinkan "tub" por la duŝoj.

Dum la unuaj jaroj ni lumigis la ĉambrojn per porteblaj petrollampoj. Kiam, en vintraj mallumaj vesperoj, mi revenis de la lernejo en foresto de miaj gepatroj, mi devis ekbruligi, kaj iafoje plenigi la lampon en la komuna ĉambro. Poste ni havis gaslampojn, por kiuj ni ne bezonis alumetojn, ĉar ili aŭtomate ekbrulis per simpla malfermo de krano. Ili donis agrablan, bele blankan lumon. Sed ne haltas progreso : gaslumon forigis elektro.

2

Iafoje, en la hejmo mi estis sola el la homa specio ; sed mi havis agrablajn kunulojn, kvar- aŭ dupiedajn.

Unu el ili estis beleta katido, el la plej ordinara tegmenta raso. Ĝi estis tre ludema. Kiam mi sidis skribante, ĝi malpeze saltis sur mian ŝultron, kaj provis

kapti per la fingroj mian plumingon, dum la plumo kuris sur la papero. Rezultis kelkaj misstrekoj aŭ inkomakuloj sur la blanka paĝo : etaj incidentoj, kiujn mi facile akceptis.

En granda kaĝo farita de mia patro komforte loĝis pluraj paroj da birdetoj : fringeloj, flavaj kanarioj, verdaj emberizoj, buntaj kardeloj, kies pepado aŭ kantado tute ne ĝenis min en mia laboro. Mi rigardadis ilin flugeti, manĝi, trinki, aŭ, en la amsezono, amindumi kaj nestetojn prepari. Mi provizis ilin per grajnoj kaj freŝa akvo, purigis la tireblan plankon de la kaĝo, kaj laŭbezone ŝanĝis la sepian oston, per kiu ili akriĝis siajn beketojn.

Alia interesa kunulo estis mia testudo. Mi nomis ĝin Petronila, supozante ĝin insekse, pro la nura kialo, ke la nomo testudo estas ingenra en la franca lingvo. Mi nutris ĝin, aŭ ŝin, per freŝaj folioj de laktuko. Baldaŭ ĝi kutimiĝis al mia voko. Ĝi rampis en malrapida hasto sur la ruĝa kahelplanko - kiu ŝajnis al ĝi tiel natura, kiel tera grundo aŭ herbo - kun la kolo rekte etendita kaj la etaj okuloj observantaj. La oblikvaj kruretoj diligente remis al la verda folio, en kies rando festone tondis la korna beko. Min amuzis ankaŭ ĝiaj vanaj klopodoj por surgrimpi malaltan ŝtupon antaŭ la fenestro. Malgraŭ ripetitaj fiaskoj, ĝi obstine re- kaj reprovadis, ĝis fine ĝi renverse falis sur la konvekso de la ŝeldorso. "Jen vi havas, Petronila!" mi diris ridante, "mi tamen avertis vin, ĉu vi estos ĉiam tiel stulta?" Ĝi senhelpe movis la krurojn kaj kapon en komika baraktado, ne kapabla per propraj rimedoj elturniĝi el tiu malagrabla situacio. Fine mi devis remeti ĝin en normalan pozicion.

Iam - ho vea tago! - ĝi eskapis tra la duone malfermita pordo al la etaĝa placeto, kaj eksentis nepran deziron esplori la eksteran mondon. Ĝi pasis inter du stangetoj de la krado, kaj falis de la tria al teretaĝo.

Alveninte tro malfrue por malhelpi tiun akcidentan sinmortigon, mi rapidege malsupreniris la ŝtuparon. Jen estis la amiko-besteto, surdorse kuŝanta.

Mi prenis ĝin en miaj manoj. Supre de la karapaco estis longa fendo, tra kiu fluetis ruĝa sango. La kompatinda etulo direktis al mi kortuŝan petegan rigardon, anhelante tra la malfermita beko, kaj, post lasta trem-

eto de la kruroj, rigidiĝis.

Mi priploris mian Petronilan, kaj enterigis ĝin en la ĝardeno. De tiam, mi neniam plu volis havi testudon en la hejmo.

3

Kiel unika ido, mi estis dorlotata infano. De la gepatroj kaj parencoj mi ricevis jul- kaj novjardonacojn, kiuj nuntempe ŝajnus modestaj, sed tiam preskaŭ luksaj. La ludilojn mi ne ofte uzadis, kaj konservadis longe kvazaŭ novaj en la originaj pakaĵoj. Kiam nin vizitis iuj el miaj gekuzetoj, mi malfermis la skatolon, kaj ekludis kun ili. Ĉiuj tre ĝuis tiun plezuron. La kuzinetoj aparte interesiĝis pri transformeblaj konstruaĵoj el lignaj aŭ metalaj elementoj (plastoĵoj ankoraŭ ne ekzistis) : tio estis ja knabaj, viraj ludoj, al ili ne kutimaj, do des pli logaj.

4

Kiam la trankvila knabeto ne sidis aŭ kuŝis en ĉambro, li fariĝis petolema stratbubo inter aliaj.

En varmegaj somertagoj, agrabla estis la densa ombro de strateto. Ĉe angulo staris fontano en marĉeto el malvarma akvo, en kiu tretadis grupo da pepantaj aŭ kverelantaj bubaĉoj. Ni suĉe trinkis tra latuna krano tegita de verdigro, spite la avertajn admonojn (pri veneniĝa danĝero) de la ĉiam timemaj patrinoj.

Mia lernejo situis ĉe la kajo, kun larĝa strato inter la kajparapeto kaj la trotuaro. En someraj posttagmezoj ni alvenis duonhoron antaŭ la malfermo de la kurso, kaj ludis en sunlumo sur la strato, tiam libera je cirkulado de danĝeraj veturiloj. Nia ĉefa ludo estis tiu, vaste konata en pluraj landoj : la knaboj, dividitaj en du egalaj teamoj, okupas du paralelajn liniojn je distanco de kelkaj dekmetroj. Ili strebas kiel eble proksimiĝi al la kontraŭa teamlinio, sed en difinitaj teritorioj oni povas esti kaptita ; la kaptitoj restas tie, ĝis la kamaradoj sukcesas ilin liberigi. Kaptado kaj liberigado efektiviĝas per konvenciaj mantuŝoj. Tio estas neniel brutala ludo, sed ĝi postulas grandan rapidecon en la kurado kaj viglajn refleksojn en direktoŝanĝaj ekmovoj.

Oni baldaŭ ŝvitis, kaj estis al ni tre varme, kiam ni eniris en la klasĉambron, en kiu la duonfermitaj latkurtenoj konservis agrable malvarmetan duonombron. Se mia ĉiam maltrankvila patrino estus vidinta sian delikatsanan fileton...!

La paŭzoj okazis en vasta korto, kie ni ekzerciĝis en diversaj knaboludoj, kiel ŝafo-salto*, rajdo-turniroj inter kavaliroj sursŭltre portataj, ĝendarmoj-kaj-ŝtelistoj, aŭ pli kvietaj, kiel pilko-, globetoj - aŭ turboludoj ; aŭ ankaŭ, laŭ la sezono, similaj ludoj per kernoj de ĉerizoj aŭ abrikotoj. Dum kelka tempo estis en granda favoro diablo, remodiĝinta post jarcenta eklipso.

Inter ni, du jarojn furoris la angla-boksa skermado per nudaj pugnoj. Senkolere, kiel bonaj kamaradoj, ni frapis kaj ricevis fortajn pugnobatojn, kaj akiris lertecon kaj maltimon. En tiu sporto mi fariĝis sufiĉe sperta. Tial, se iu malbonintence min atakis, mi ĉiam frontis, kaj plejofte venkis per unu frapo, kiu sangigis lian nazon. La afero finiĝis "je la unua sango", kiel en spadueloj inter bonedukitaj kavaliroj.

Tiu kapablo en batalsporto havigis al mi ian famon inter la kolegoj, kaj certan memfidon, dank'al kiu mi ne timis la provokojn de stratbubaĉoj.

Iam en Altcevena vilaĝo mi renkontis trupeton da fortikaj knaboj, kiuj baris al mi la vojon, kaj komencis rikane direkti mokajn aludojn al la urba sinjoreto. Mi ne lasis min impresi, kaj aplombe respondis, montrante min preta por pugnobato. Ili aprecis mian kuraĝon. La ĉefo de la bando premis mian manon, kaj ni fariĝis bonaj kamaradoj.

Simila aventuro en Tunizo, kiam mi kun mia pli juna kuzo Renato renkontis francajn stratbubojn, kiuj nomis min judo. Vidante min ne timigita kaj firme decidiĝinta batali se necese, ili ne insistis. Sed al la kuzeto, rasista kiel ĉiuj nordafrikaj francoj, la dirita vorto efikis kiel morta insulto, kiu nepre devis esti lavita en sango ; kaj, hejmen reveninte, li indigne akuzis min : "Fi! li lasis, ke oni nomu lin judo!" Honto al mi! sed mi ne hontis.

* Ŝafo-salto : unu ludanto sin klinas teren, kun fleksitaj genuoj, kaj aliaj saltas super li, apogante ambaŭ manojn sur lia dorso.

Krom la individuaj luktoj, okazis ankaŭ kolektivaj militetoj de kvartalo al kvartalo, de lernejo al lernejo. Por ekzemplo, mia laika lernejo kontraŭ katolika, kies instruantoj estis "fratoj" en nigra sutano. Tiuj stratbataloj nomiĝis "Tabo", kio estis la militkrio de la Alesanoj en mezepoko.

Mi partoprenis sen entuziasmo. Mi ne bone komprenis la kialon de tiuj konfliktoj, kaj mi ne amis aŭdi la siblon de ŝtonoj preter miaj oreloj : ŝtonĵetado estis kutima batalprocedo, kiu ne malofte vundis kelkajn batalantojn. Mi montris min bravulo inter bravuloj, sed nur pro propra digno. Mi ankoraŭ ne suspektis, kion mi nun scias : ke la braveco de multaj herooj, universale admirataj, akklamataj kaj ordenitaj, apartenas al la sama speco.

5

Iam la viraj ludoj kaj herooj subite forsvenis en mia lernejo. Ni estis dek-dujaraj knaboj nin preparantaj al la ekzameno por la atesto pri elementa lernado. La instruisto havis filinon samaĝan, celantan la saman ateston. Unu monaton antaŭ la ekzameno, li kunprenis ŝin en sia klaso. Neniama vidita evento : en tiu tempo neniu lernejo estis ambaŭseksa eĉ en plej junaj klasoj. Knabino inter knabo-lernantoj, jen estis sensacio !

Ŝi estis gracia blondineto kun oraj bukloj. Ŝi aspektis tute natura, neniel ĝenata en la ĉirkaŭstaro de tiu bubaro, kiu ŝin gape rigardis kun admiro kaj respekto : knabino kaj filino de la instruisto ! Ni ne sciis, kiel nin teni, ne kuraĝis plu riski iun sakraĵon aŭ maldecan esprimon, konkuris inter ni pri ĝentil-afekto, kaj fariĝis mildaj kiel ŝafidoj.

Post kelke da tagoj, la viglefortaj viraj ludoj estis forgesitaj, kaj ni vete ekzerciĝis en knabinaj ludoj, kiujn ŝi estis al ni instruinta.

6

Cetere, eĉ sen ina influo, la bravulaĉoj nature inklinitis al pacaj distraĵoj.

En printempo ni kaptis, kaj ne kruele (almenaŭ laŭ intenco) bredis majskarabojn, kiujn ni lasis preskaŭ

libere flugi ĉe la ekstremaĵo de longa fadeno.

Ĉefa objekto de nia intereso estis la silkraŭpo. En la sezono de kokonvendado, ni vage gapadis antaŭ la flavaj kaj rozaj amasoj kovrantaj la montrotablojn de la vendistoj sur publika placo ; tie ni forgesis pri la forpaso de l'tempo - kaj tio kaŭzis al mi oftajn punojn pro malfrua alveno en la lernejo.

Ni bredis silkraŭpojn en niaj pupitroj, provizante ilin per freŝaj morusarbaj folioj. Kiam venis la tempo de ilia maturiĝo, ni aranĝis erikbrancetojn, en kiuj ili ŝpinvolvis siajn kokonojn. Post la lasta transformiĝo, la bombikspapilio, eliĝinta, kvazaŭ el ovo, el la de interne truita kokono, demetis sur blanka paperfolio siajn ovetojn, nomitajn "grajnoj".

Nun ŝajnas al mi evidente, ke la instruisto ne povis ne scii pri tiu flanka okupiĝo, ne antaŭvidita en la oficiala hortabelo ; sed, favore al natursciencema sci- volo kaj praktiko, li fermis la okulojn ; kaj lia bon- vola ignoro aldonis ian spicon al nia kaŝita plezuro.

7

Malpli pacema estis la vespera ĉasado al vespertoj zigzage flugantaj sub la strataj elektraĵoj globlampoj. Armitaj per longaj stangoj el kano aŭ bambuo, la strat- buboj per lerta bato faligis la kompatindajn bestetojn.

Tiun kruelan ludon mi neniam partoprenis. Ne tial, ke mi estis pli bonkora ol la aliaj, sed nur pro tio, ke vespere mi ne eliris sen akompano de miaj gepatroj : mi do ne povis miksiĝi en la kanajletajn bandojn de vesperto-ĉasistoj.

X - SPORTO KAJ ARTO, PLEZUROJ KAJ REVOJ.

1

En la komenco de la 20a jarcento, la plej ŝatata sporto de la Alesanoj, infanoj kaj maturaj homoj, estis la bicikla. Ili komencis pasiigi ankaŭ pri futbalo. Teniso estis praktike rezervita al la riĉa klaso, samkiel rajdado kaj skermado.

Pli populara estis rulsketado, kiu ekfuroris en la jaroj 1911-14. Konstruiĝis du sketejoj, unu kun ligna planko inter muroj sub tegmento, alia betona, subĉiela, Ambaŭ mi alterne vizitadis. Tie mi retrovis kelkajn el miaj najbaroj aŭ kunlernantoj, kaj ekkonis aliajn el diversaj kvartaloj. Ankaŭ knabinojn, kun kiuj mi amis sketdanci, kunplektante la manojn. En tiu ludo pasis agrablaj horoj. Iafoje mi forgesis pri la tempo, kaj mia patrino, ĉiam en zorgo, timante akcidenton, venis renkonte al mi.

2

En mia infaneco, ĉiujare pasis pluraj grandaj cirkoj. Antaŭ la oficiala prezento sub la tendego, ili paradis sur la ĉefaj stratoj. Aparte bela estis la parado de Pinder. Ĉekape, trupo da muzikistoj en blanka uniformo, kun brilaj blovinstrumentoj, marŝantaj laŭ takto de gajaj arioj. Sekvis gerajdantoj sur karakolantaj ĉevaloj; poste ĵonglistoj, ekvilibristoj, akrobatoj; kostumitaj simioj sidantaj sur veturileto tirata de jungitaj hundetoj; kameloj, ĝirafoj, kaj ses elefantoj, vice paŝantaj laŭ ordo de grandeco, ĉiu tenanta per la rostro la voston de la pligranda antaŭulo. La procesion fermis grupo da kapriolantaj klaŭnoj, kies groteskaj kostumoj kaj gestoj, ŝminkoj kaj grimacoj ridigis la gapantojn sur ambaŭflankaj trotuaroj.

En la cirko de Rancy, dresitaj fokoj ĵongladis per pilkoj; post ĉiu ekzerco ili rekompence ricevis ĵetitan fiŝon, kiun ili senmanke kaptis en ĝia trajektorio.

Kiam venis Buffalo-Bill kun sia tribeto da aŭtentaj

indianoj el Nordameriko, mi pasigis tutan posttagmezon vagante inter la tendoj, barakoj kaj veturiloj de la giganta cirko. Ili kovris vastan areon, prezentante, antaŭ la nokta spektaklo sub la triobla tendego, senpagan specimenaron de plej diversaj allogaĵoj.

Sed plej forte stampiĝis en mia memoro la unua cirko, kiun mi sesjara vidis sur placo de urbeto. Malgranda, povra cirko sub eta tendo. Du magraj ĉevaloj ornamitaj per velkokoloraj pluntufoj, kun ŝajne laca dresisto kaj pala rajda gimnastikistino ; juna trapezistino en roza ĝustege alfarita vesto kun brilaĵetoj ; longkreskulo jonglanta per torĉoj kaj ponardoj ; dresitaj hundetoj ; kaj du klaŭnoj : unu "blanka klaŭno" kaj unu "aŭgusto" kun ruĝa falsa nazo, ĝibdeformita ĉapelo, larĝega pantalono kaj striktega jako ; ili interŝanĝis mokvortojn kaj burleskaĵojn sub la digna superrigardo de reĝisoro en eluzita frako, kaj ĉiu el iliaj paroloj, en alta naztono, levis ondon da ridegoj inter la junaj ĉirkaŭsidantoj. Entute ja mizera spektaklo - sed al miaj junaj okuloj, blindige mirbela.

3

Kun teatro, unuan renkonton mi ŝuldas al la nomada trupo Chichois (ŝiŝŭa'), fama en tuta Provenco kaj Langvedoko. Vagante de urbo al urbo, ĝi prezentadis, sur foiraj teatroplankoj, melodramojn kun malmultaj profesiaj aktoroj. Figurantoj (statistoj) kaj flankroluloj rekrutiĝis el la lokaj amatoroj, sentaŭguloj konataj kaj rekonataj de ĉiuj spektantoj. Ifoje Chichois sentime atakis grandajn ĉefverkojn de la drama repertuaro; pli ofte ĝi ludis teatraĵojn el propra elpenso kaj kreado. De tiu, kiun mi vidis, nur la titolo (ĉu bedaŭrinde?) restis en mia memoro : "La ŝtelĉasisto de Vakareslago".

En la Arleza urba teatro mi spektis "La ĉirkaŭmonda vojaĝo en 80 tagoj", laŭ Jules Verne. Tre impresis la rajdantaj indianoj kaj la trajno brue veturanta sur la scenejo. En la Alesa mi ĉeestis prezenton de la opero Faŭsto, kiu nemulte kontentigis min : Mefistofelo ne tute similis al mia propra imago pri diablo, kaj la "ĥoro de la soldatoj", al mi antaŭe anoncita, ne respondis, kun tiuj nejunaj militistoj en mezepokaj vestoj, al

mia ideo pri soldatoj, t.e. : junaj viroj kun kepo kaj ruĝa pantalone.

Multe pli plaĉis al mi la marioneta teatro, la farsoj de Guignol (Ginjol') kaj de lia amiko, la drinkema ŝuflikisto Gnafron (Njafron'). Guignol la Lionano, portanta bluzon kaj turbaneton el nigra silko, kun harplektaĵo pendanta sur la dorso, aspektis kiel Ĉino - kredeble pro la longe tradiciaj komercrilatoj de la Liona silkindustrio kun Ĉinio. Li estis ĉiama kontestulo, bastonanto de ĝendarmoj kaj polickomisaroj. Tion mi aprecis kiel ĉiuj infanoj, kiuj simpatie lin aplaŭdis. Kaj kiam, fine, diablo kun teruraj kornoj forprenis lin sur siaj ŝultroj, ĉiu sciis, ke morgaŭ li revenos, viva kaj petolema kiel antaŭe, kaj la tuta bubaro daŭre ridegis senprobleme.

4

24a de aŭgusto : la granda jara foirtago. Antaŭe kaj poste, du semajnojn daŭris la festo. Vespere la tuta "ŝoseo" brilis per mil acetilenlampoj kaj bruis per cent gurdegoj misagordaj, sed kiel belaj kun sia dekoracio el orumitaj skulptaĵoj ! Ambaŭflanke de la orgentuba tabulo, husare vestitaj aŭtomatoj signadis proksimuman takton per spasmaj gestoj de la brako kaj abruptaj turno de la kapo, dekstren-maldekstren.

Sur estrado, atletoj kun dikaj lipharoj ŝveligas siajn bicepsojn, defiante eventualajn amatorojn al konkuro en halter-levado, franca bokso, baston-skermado aŭ grek-romana lukto "Kun kiu vi deziras lukti?" Inter la luktistoj ofte estis, aparte ŝatataj, unu negro kaj unu virino. Iam mi vidis eĉ brunan urson : pli-ol-centkilograma besto, al kiu neniu povis rezisti, ĉar ĝi premsufokis la viron inter siaj fortaj brakegoj kaj sia larĝa brusto.

De apudaj budoj aŭdiĝas klakoj de karabenoj pafantaj al senkulpaj argil-pipoj. Ĉe aliaj, diligentaj vetantoj provadas ĉirkaŭigi per pli-malpli lerte ŝetataj ringoj la kolon de starantaj boteloj. Tie loterio prezentas premiojn - pupoj, horloĝoj kaj diversaj bagatelaĵoj - al admiro kaj deziro de hazardemuloj sekvantaj per streĉa rigardo la turniĝadon de la fortunrado, kaj gvatantaj kun korbato ĝian halton ĉe preciza cifero. Tie ĉi, sur alta podio, fortikulo en ruĝa velurkostumo kun brila kiraso elŝiras denton de kuraĝa paciento, kies dolorkriojn kovras tamburo batata de vigla servisto.

Flua promenataro lante cirkuladas inter la budoj kaj barakoj ; rigardas al sugestaj kolorbildoj de eks-terordinaraj kromnaturajoj ; legas bombastajn afiŝojn, kiuj gloras la klarvizian kapablon de fakiro aŭ diven-istino ; flarante haltas antaŭ nikelitaj maŝinoj fabrik-antaj kandbombojn, antaŭ rostantoj de kolbasoj kaj fritantoj de krespoj ; algluiĝas ĉirkaŭ turniĝantaj ka-ruseloj kaj pendolflugantaj balanciloj.

En tiu bunta kermeso mi aparte amis rajdi sur ligno-ĉevaloj kaj, ankoraŭ pli, balanciĝi en svingboatoj - precipe kiam mi sukcesis logi iun amikinon al kunludo. Tiam mi pli kaj pli, kiel eble plej alten svingis la gondoleton. Ĝi suprenflugis preskaŭ ĝis verkitalo ; kiam ĝi atingis la haltopunkton, en sendaŭra ekvilibro, la ĉielo ŝajnis kuŝi sub niaj piedoj kaj la tero super niaj renversitaj kapoj. La knabino kriis ĉu pro timo, eble afektata, ĉu pro plezuro, kiel scii ? Sed mi rimarkis, ke ĉiu volonte akceptas rean inviton al tiu ekscitanta ludo.

Por ni infanoj tro rapide forpasis la magio de tiu foirtempo.

5

Mi naskiĝis preskaŭ samtempe kiel la kinematografo, kiu disvastiĝis en la unua jardeko de mia vivo. En la urbo la nova arto eksplodis sensacie per ĉiuvesperaj prezentoj en somero sur la granda Respublik-Placo. Antaŭ vastaj terasoj de kafejoj plenplenaj de sidgastoj trink-antaj, fumantaj, babilantaj kaj svingantaj ventumilojn, estis starigita grandega ekrano. Malantaŭ ĝi etendiĝis ankaŭ vasta surfaco, sur kiu multopa amaso starante spektis, travide kaj simetrie, la moviĝantajjn lumbild-ojn.

La spektaklo konsistis el mallongaj filmoj : komik-aĵoj, dramoj, dokumentoj geografiaj kaj turismaj, kaj jam kelkaj reklamoj. Al mi aparte plaĉis la magiaj fe-rakontoj de Georgo Meliès, la genia inventinto de truk-ado.

Poste fondiĝis samtempe du internaj kinoteatroj, kiujn mi, ĉiudimanĉe, alterne vizitadis. Tie, kvankam malpli brue ol sur la placo, la spektantoj laŭte komen-tis la filmo-sekvencojn. Dume, diligenta pianistino, pli

fingrolerta ol muziksenta, fantazie improvizadis, kiam ŝi ne fuŝtraktis belajn pecojn de Ŝopeno, proksimume akompanante la ekran-agadon per pli aŭ malpli akcelata takto laŭ la ritmo de la figurmovoj.

Kiam finiĝis emocia melodramo, ĉiam per la venko de la simpatia juna heroo, savo de la bela kompatinda junulino kaj justa puno al la perfidulo, viglavoĉaj aproboj salutis la triumfon de moralo kaj virto.

6

Kiam mi restis hejme, sidanta pro malbela vetero aŭ kuŝanta pro malsano, mi plejofte desegnis aŭ legis.

Mi ŝatis la librojn rakontantajn pri aventuroj de esploristoj aŭ similaj, kiel Robinson Kruso, la verkoj de Jules Verne kaj la romanoj de H. Melville : Moby Dick aŭ Typee. Mi revis fariĝi esploristo aŭ almenaŭ maristo.

Ekde 1909, aviado estis mia nova idealo, dividata de multaj knaboj en tiu epoko. Miaj herooj estis Santos-Dumont kaj Wilbur Wright, Farman kaj Blériot, kaj ĉiuj aliaj pioniroj de la nova sporto. Mi avide legis en la gazetoj pri iliaj mirindaj faroj, mi desegnis aeroplanojn kaj faris el papero aŭ kartono modeletojn de glisiloj. Mi ĵetis ilin eksteren de mia tria-etaĝa fenestro, ĝojante kiam ili transflugis la straton aŭ la ĝardenon. Kun helpo de mia patro, mi faris eĉ pli grandan etmodelon de monoplane kun helico movata per tordita kaŭĉuka ligilo kiel motoro. Ĝi bele flugis, ĝis fine ĝi frakasiĝis, ĉar mankis sufiĉe vasta spaco por ĝia manovrado.

Iam kun mia patro mi iris al Avinjono speciale por vidi unufoje aeroplanojn en flugo. Estis du aviadistoj. Unu stiris monoplanon de la sama tipo, per kiu Blériot jam sukcesis la unuan transflugon super Maniko. La dua prezentis "fraŭlinon" Santos-Dumont : malgranda aparato el bambuo kaj tolo, pezanta apenaŭ 300 kilogramojn, kiu ruliĝis nur kelkajn dekametrojn antaŭ ol "degluiĝi" de la tero laŭ granda angulo. Tiuj malpezaj flugmaŝinoj estis tirataj per motorciklaj motoretoj de kelkaj ĉevalpovoj, kun malregula petarda kraketbruo. Por startigi la motoron, oni mane turnis la dupadelan helicon. La helico ankoraŭ ne estis variigebla ; necesis, ke pluraj viroj retenu per la vosto la aviadilon, por ke ĝi ne tuj ekmoviĝu, kaj lasu al la startiginto la tempon flanken kuri.

Post la prezentado, revenante al la urbo, ni vidis pasi super ĝi, alte en la ĉielo, unu el la konkurantoj de la vetflugado Parizo-Romo. Ĝi brilis en la sunlumo kiel blanka birdo sur lazura fono.

Kelkajn monatojn poste venis en Aleson, kun ruĝa flugmaŝino, Amerigo, mondrekordulo de distanco en rondira flugado. La unuan tagon la motoro mise funkciis, kaj li ne sukcesis "degluiĝi". La morgaŭan matenon je la kvina, la tuta urbo estis vekita per motorbruo. La Alesanoj salte ellitiĝis, kuris al la fenestroj, kaj ekvidis la grandan ruĝan birdon, kiu gracie turniĝadis ire kaj reire, preskaŭ glittuŝante la tegmentojn. La aviadisto, kies kapo kaj busto vidiĝis el la fuzelaĝo, mansvinge salutis. Mi entuziasme aplaŭdis.

La trian tagon la tuta urbanaro kunvenis ĉirkaŭ la herbejo elektita kiel flugtereno. En granda ekscitiĝo la amaso fidoplene atendis renovigon de la hieraŭa evento.

Jen alvenas la heroo, salutata per tondra aklamado : alta viro en speciala supervesto, kiu ŝajnigas lin pli korpulenta. Li grimpas al sia seĝo. La spektantaro retenas sian spiradon. La motoro ekkrakas, gruntas, regule ronkas. La bela maŝino startas, malrapide antaŭenruliĝas, akcelas sian kuradon, kaj ekflugas... sed ĝi ne sufiĉe rapide altiĝis : jen ĝi atingas la finon de la libera spaco, bate trafas la supron de kaŝtanarbo, kaj falas.

Granda emocio en la publiko ! Feliĉe la viro eliris nevundita, sed la monoplane estis grave difektita, kaj tiel finiĝis la memorinda elmontrado.

Longan tempon min tenadis la pasia interesiĝo pri aviado.

Tamen mi ne fariĝis aviadisto.

Maristo ankaŭ ne.

Ho junaj estontaj herooj, kiom el vi fariĝos maturaj pantofluloj !

XI - TRA MONTOJ KAJ VALOJ. VOJAĜOJ KAJ FERIOJ.

1

En la unua dekonono de la 20a jarcento, nur riĉuloj posedis privatan veturilon, ĉevalan aŭ aŭtomobilon. Ni veturis per trajno aŭ per publikaj veturiloj.

Ni foriris plejofte frumatene. La antaŭan nokton mia patrino maldormis. Ŝi pasigis tiun tutan nokton en preparado de niaj pakaĵoj. Niaj vestoj, tukaroj kaj tualetaĵoj ordiĝis, en zorga aranĝo, en granda peza kofro. Ĝin ŝlosinte, patrino ĉirkaŭligis ĝin per fortika ŝnuro, kium ŝi nodis tiel streĉe kiel violonkordo.

Al la stacidomo ni iris piede, kaj portisto antaŭmarŝis kun la kofro sur ĉarumo. La bruo de la rado sur la strata pavimo kaj de niaj paŝoj sur la trotuaro, en la nokta silento, restas ligita en mia memoro kun tiuj matenaj ekforiroj.

Niaj plej longaj vojaĝoj restis en la limo de centoj da kilometroj. Al Nimo kaj Arlezo por vizitoj al geonkloj kaj geavoj, somere al Mediteranea bordo aŭ al mezaltaj montoj en Ceveno kun rezinaj arbaroj, por fortikiĝo de miaj bronkoj laŭ kuracista preskribo. Miaj gepatroj faradis por mia sano oferojn, pri kiuj mi ne tre konsciis. Ili luis por du monatoj malkaran loĝejon, ne komfortan, en kiu mia patrino malfacile baraktis por kuirado, lavado kaj mastrumado. Ŝi neniam plendis, ĉiam restis bonhumora, kaj mi facile ĝuis tiujn somerferiojn, por mi tre agrablajn.

2

Mi amis la grandan bluan maron kun ĝiaj ŝanĝiĝantaj nuancoj sub la suno, kaj nokte la bruon de la plaŭdantaj ondoj sur la strando. Mi amis senti sur mia haŭto la fortajn batojn de la ŝaŭmantaj ondokrestoj, aŭ mole balanciĝi sur la moviĝanta surfaco. Mi amis la odoron de la fuko kaj la movadon de la haveno, la matenan revenon de la fiŝistoj en iliaj velboatoj, kun la longaj retoj plenaj de arĝentbrilaj skombroj kaj pilĉardoj. Mi plezure aŭskultadis la konversacion de maljunaj fiŝ-

istoj kun bistra vizaĝo kaj grifelitaj trajtoj, lerte kaj pacience flikantaj siajn blujajn retojn.

Mia patro venis sabatvespere, kaj tuj rilatiĝis kun fiŝistoj. Li rendevuis por akompani ilin en la morgaŭmatena velveturo. Mi elpetis promeson, ke li kunprenos min en tiu vira ekspedicio. Sed, kiam mi vekigis, la suno estis jam alte en la ĉielo, la ŝipo jam longe sur la ondoj, kaj baldaŭ revenonta. Responde al mia protesto, patro pretekstis, ke mi tro profunde dormis, kaj li ne kuraĝis veki min. Min konsolis la vido de la freŝaj fiŝoj, kiujn patrino preparis por la tagmanĝo, kaj precipe la promeso, ke venontfoje... Promeso, kompreneble, neniam plenumita.

En aŭgusto, 1909, ni estis en provenca fiŝista vilaĝo, kie ankoraŭ ne pasis fervojo. Oni tien venis de Martigo per ĉevala publikveturilo, aŭ prefere de Marsejlo per malgranda vaporŝipo cirkulanta dufoje en ĉiu semajno. Krom la fronto de mallarĝa haveneto, la vilaĝo estis tute ĉirkaŭita de marpinaj arbaroj, kies rando tuŝis la rokan marbordon aŭ la mallarĝan sablostrandon.

Unu tagon leviĝis forta mistralo. La maro tuj ekŝvelis. La morgaŭnon, nigra peza nuboj, suden pelata, rapide ege proksimiĝis; baldaŭ ĝi kovris la tutan ĉielon, dum sentiĝis forta gudraodoro. Inter la vilaĝanoj fulme disvastiĝis la informo: la pinaro brulas, la fajrego etendiĝis en fronto de dek kilometroj, kaj rapide antaŭeniĝas. Jam pluraj farmoj kaj vilaĝetoj, ĉirkaŭitaj de flamoj, estas neatingeblaj.

De Marsejlo, Martigo kaj aliaj urboj venis fajrobriĝadoj. Iliaj penoj estis vanaj kontraŭ la fortego de incendio. Pli kaj pli blovegis la mistralo, pli kaj pli furiozis la fajro. Baldaŭ ĝi atingis la marbordon ambaŭflanke de la vilaĝo, fermante ĉiun teran vojon. Dume la tempesto, ankaŭ pli kaj pli furioza, igis la havenon tramare neenirebla: ni estis jam tute izolitaj.

Estis ĝuste festotago en la vilaĝo; oni dancis sur la placeto antaŭ la haveno. La fajrobriĝadistoj sin antaŭtataŭis ĉe la incendio ĉiun kvaran horon. Inter du deĵortempo tiuj nelacigeblaj junuloj venis partopreni la dancadon. Sed alia pli efekta spektaklo altiris la loĝantojn kaj la feriantojn al jam tute proksima ĉirkaŭaĵo.

En la arbaro ruĝis kvazaŭ fajromuro, sed muro moviĝanta, nerezisteble antaŭenvenanta. Sur tiu ruĝa fono

nigre siluetiĝis la ankoraŭ ne trafitaj arboj kaj la haste baraktantaj homoj, kiel ombroteatro. La fajro-gardistoj, helpataj de vilaĝanoj, hake faligis arbojn - sed vane : super la artefaritaj maldensaĵoj, la ventego transportis brulantajn branĉojn kaj fasketojn da pintfolioj. Ĉiu pino, de ili tuŝita, subite ekflamis kiel giganta torĉo. En la siblado de la vento kaj la muĝado de la flamoj aŭdiĝis ekkrakoj de fendigantaj trunkoj kaj de eksplodantaj pinkonusoj, dis-radiantaj kiel sparkoj de fajro-artaĵo.

La trian tagon, la vento subite ĉesis, la maro kvi-etiĝis, la incendio estingiĝis - sed restis nenio bruligebla. Sur centoj da hektaroj la arbaro estis detruita. Sur la senherba tero, ruĝa kaj hardita, staris nur karbigitaj stumpoj. Kio fariĝis el la sciuroj kaj aliaj bestetoj iam vivintaj en aŭ sub la ŝirmantaj pinoj ? Nur unu vivulon mi renkontis : ĝi estis siblanta serpento, kiu levis kontraŭ min minacan, ŝajne koleran faŭketon.

Sub la brila sunhelo, la belega maro, intense blua, ignoris la torturon freŝdate suferitan de la najbara tero. Ĝi forgesis la furiozan frenezon de la vento, de la akvo kaj de la fajro. Ĝi serene spegulis la puran ĉielon ; kaj ni ree ĝuis la sun- kaj marbanojn.

3

Alia spektaklo, de malpli intensa beleco, sed pli agrabla, estis tiu de akvo-turniroj en la langvedokaj havenetoj, sur la kanalo inter maro kaj laguno.

Sur tiu glata akvovojo veturas kontraŭdirekte du boatoj kun teamoj de viglaj remistoj. La boatoj estas farbitaj, unu blanke kaj blue, la alia blanke kaj ruĝe, kun pentritaj ornamaĵoj, kaj speciale provizitaj per oblikva ŝtuparo, kiu, de la pobo, levigas super la akvosurfaco. Ĉe la ekstremaĵo ĝi portas mallarĝan kvadratan podion, iom antaŭen klinitan, sur kiu staras unu viro blanke vestita kun kolora zono. Li tenas per la maldekstra mano grandan rektangulan ŝildon el ligno, kiu ŝirmas tutan lian trunkon, kaj per la dekstra longan lancon kun plurpinta ekstremaĵo.

La boatoj rapide glitas laŭ la takto de gaja muziko. Kiam ili renkonte pasas flanko ĉe flanko, ambaŭ ĉampionoj, sin firmapogante sur la piedoj, antaŭen kliniĝas,

tenante horizontale la lancojn. Ĉi tiuj samtempe frapas la ŝildojn, ŝancelas la virojn, kaj unu el ili, perdirte la ekvilibron, falas de sia piedestalo en pli-malpli eleganta plonĝo. La muziko lin salutas per komika arieto, dum la venkinto fiere relevas sian lancon, preta alfronti novan kontraŭulon.

Tiel la konkurantoj vice eliminiĝas, en aplaŭdado kaj komentoj de la kompetenta publiko staranta sur la kajoj. La paca batalado daŭras tutan posttagmezon, ĉar en ĝi konkuras multaj junuloj el najbaraj vilaĝoj. Fine restas nur du, inter kiuj elstaros unu nevenkita : la triumfanta heroo de la tago.

4

Aliajn plezurojn mi trovis sur la montaro.

Kuri tra herbejoj, erikejoj kaj arbaroj ; aŭskulti la sibladon de la vento en la ĝemantaj branĉoj, la zumadon de abeloj en la foliaro de grandaj tilioj kaj en la dolĉaodoro de ties floroj ; rigardi en baseno naĝantajn ranidojn, kaj sekvi de tago al tago iliajn metamorfozojn ; naĝi kaj plonĝi en la kristala akvo de malvarma rivereto ; kapti kankrojn kaj ranojn ; marodi kelkajn tre tentantajn pomojn, pirojn, prunojn aŭ juglandojn ; pluki sovaĝajn fragojn, frambojn, avelojn, kaj buntajn florojn, super kiuj flugetas belaj papilioj. Kelkaj el tiuj floroj - sovaĝaj montdiantoj, purpura digitalo, bluj kaj flavaj gencianoj - estis nekonataj de la knabo el malalta lando.

Mi vivis en familiareco kun krudaj kaj afablaj kampuloj, kiujn mi renkontis sur la kampoj, plugantaj, falĉantaj aŭ gardantaj siajn brutarojn kun helpo de paŝtohundoj. En iliaj farmodomoj mi trinkis ŝaŭmantan lakton freŝe elmelkitan, aŭ manĝis freŝan kazeon.

En foirtagoj, la kamparanoj venis en la vilaĝegon kun blua bluzo, blanke aŭ nigre surbrodita, nigra mola ĉapelo kaj lakitaj lignoŝuoj. Portante surŝultre la longan pikbastonon, ili marŝis antaŭ la malrapida bovoparo juche jungita al knaranta ĉaro. En Langonjo, urbeto en Alta Lozero, venis ankaŭ, de la proksima Margerido-Montaro, rajdantaj kampulinoj sur altaj ĉevaloj. Ili rajdis ne flankside, "amazone", sed interkrure, kiel viroj. Ilia longa kaj ampleksa jupo kovris la gambojn ĝis la maleo-

loj, kaj la postselon de la ĉevalo ĝis la vostradiko. Antaŭ iliaj genuoj, ambaŭflanke pendis du korboj plenaj de vendotaj produktoj el la farmo : butero, ovoj, fromaĝoj, kortobirdoj, legomoj, fruktoj kaj mielo.

En tiu urbeto, en la patrontago, okazas granda festo kun parado de ornamitaj ĉaroj, el kiuj unu tradicie prezentas grandan kartonpastan figuron de Gargantuo.

Tiu giganta heroo, de Rabelezo senmortigita, ne estas elpensita de la genia aŭtoro : li fontas el tre antikva mitologia tradicio, kiu lasis multajn spurojn en tuta Ĝevodanio per loknomoj kaj ankoraŭ vivantaj legendoj.

Vespere, en akompano de sakfluto, kordogurdeto aŭ akordiono, la vilaĝanoj kun lignoŝuoj dancas la antikvan "bureon".

Alia granda festo estas tiu de Sankta Johano Baptisto, la 24an de junio. Ĝi preskaŭ koincidas kun la somera solstico, kiel Sankta Lucia kaj Kristnasko kun la vintra, - restaĵoj de paganaj ritoj en la kristana religio. En tiu Johantago la knaboj preparas grandajn branĉamasojn kaj ŝtiparojn. En la vesperkrepusko ili ekbruligas ilin, kaj ili transsaltadas super la flamoj, tiel longe, kiel la fajro brulas en la nokto.

5

Bela somertagmezo en Florako, Cevena urbeto, en hotelo mastrumata de gekuzoj niaj. Dum ekstere varmegas, agrable malvarmeta ombro regas en la vasta remizo apud la tirĉevala stalo. Tie trankvile ludas duon-dekduo da sesjaraj buboj. Inter la belaj kvarradaj veturiloj, jen ili malkovris pli modestan sed interesan trezorpecon : durada plata ĉareto kun flanktimonoj ; ilin tenante per la manoj, homo povas facile transporti sufiĉe pezan ŝarĝon, se nur ĝi estas konvene aranĝita en ĝusta ekvilibro sur la plataĵo, ambaŭflanke de la akso-stango de la radoj.

En la junaj cerboj ekĝermas ideo : kial la ŝarĝo ne konsistu el la grupeto, minus unu, kiu, laŭvice, jungiĝu inter la flanktimonoj por puŝi aŭ tiri la ĉareton kiel pieda veturiganto ? Hej! kia bela promenado ! Kien ? Nu, al Mendo, la najbara ĉefurbeto ! Ĝi situas je distanco de 40 kilometroj, 700 metrojn alte super la marnivelo. (Florako 550 m). Meze inter ambaŭ nece-

sas trairi montpasejon, iom pli ol 1000 metrojn alta. Ĉion tion ni scias, almenaŭ proksimume. Sed nek longo nek alto, nek tempo nek peno povus ŝanceli la sentiman decidemon de nia diligenta kolegaro... Ni nur konfuzete konscias, ke hodiaŭ estas iomete tro malfrue en la tago ; sed morgaŭ, morgaŭ ni nepre iros al Mendo per la braktira ĉareto ! Morgaŭ, tuj post la tagmanĝo, ĉiuj tien ĉi por senprokrasta forveturo !

La morgaŭon, en la precize difinita tempo, la tuta trupeto akurate kunvenis. La ĉareto ankoraŭ troviĝis en la sama loko. Post ekscitoplena vespero, longa profunda dormado kaj febre senpacienca mateno, fine venis la momento...

Jam kelkajn minutojn amasiĝis minacaj nubegoj. La kuraĝaj knabetoj maltrankvile gapas supren. Subite, blindiga fulmo kaj surdiga tondro ekŝiras la malhelgri-zan ĉielon kaj la pezan silenton, kaj donas startsignalon al diluvia pluvego. Ĝi falas, vertikala kaj densa kiel netravedebla kurteno antaŭ la pordego de la remizo, kaj tamburadas sur la trotuaro. Kion fari ? Rezignacie, sed ankoraŭ espere, la vojaĝontoj atendas eblan reboniĝon de la vetero - sed vane. Pli aŭ malpli forte, la pluvado daŭras. Baldaŭ evidentiĝas, ke ni devos hodiaŭ rezigni...

La morgaŭon, ĉiuj jam forgesis pri la planita veturado.

En mia longa vivo, kiom da revoj, kiom da brilaj projektoj same restis sensekvaj !

6

Mia unua pli longa vojaĝo okazis en marto 1912. Mi kun mia patrino vizitis ŝian fraton en Tunizo, kaj pasigis tutan monaton, kiu lasis al mi multajn rememorojn.

La marveturo daŭris ĉirkaŭ 40 horojn. Ni enŝipiĝis je tagmezo en Marsejlo. Kiam la ŝipo eniris en Leon-Golfon, abrupte komenciĝis tempesto, kaj baldaŭ ni ek-suferis marmalsanon.

Dum la tuta nokto ni aŭdis la bruadon de pumpiloj, per kiuj la ŝipano reeĵetis la akvon, kiu sursaltis la ferdekon. Fojfoje, pro la amplekso de la tangado, la helicoj eliĝis el la akvo ; tiam ilia turnomovo subite akceliĝis, kaj dum kelkaj sekundoj la tuta ŝipo vibris.

La morgaŭan matenon la maro iom kvietiĝis, kaj mi povis iri sur la ferdekon. Apogante min sur la pavezo, mi longe admiris la dancosaltadon de delfenoj, kiuj grege akompanis la ŝipon. La vetero restis malbela, la horizonto restis konfuza inter grizaj ĉielo kaj maro. Tagmeze, tra maldensa nebulo, fantome aperis granda ŝipo.

Jam kelkajn monatojn daŭris milito en Libio, tiam nomata Tripolitano. La Italoj strebis konkeri tiun landon, kiu estis ankoraŭ sub turka regado. La antaŭan semajnon, franca pasaĝerŝipo, suspektita pri armilo-kontrabando favore al Turkoj, estis kaptita de itala militŝipo kaj kondukita por kontrolo al Cagliari, Sardinia haveno. Ni eksupozis, ke samo okazas al ni ; sed, proksimiĝinte, ni konstatis laŭ la flagokoloroj, ke ĝi estas franca krozŝipo.

Iom post iom la vetero klariĝis. Nokte brilis la luno kaj la steloj. Restinte malfrue sur la ferdeko, ni vidis kontraŭdirekte preterpasi, je kelkaj hektometroj, alian pasaĝerŝipon tute iluminitan per ĝiaj rondaj fenestretoj. Samtempe salutsonis la trumpetejoj de ambaŭ ŝipoj.

En lakteca matenkrepusko ni atingis la golfeton, trapasis la antaŭhavenon kaj eniris en la Tunizan lagon, meze trafenditan per rekta larĝa ŝipirejo. La vasta senmova akvospegulo paŝtelkoloro nuanciĝis. Sur ambaŭ kanalbordaj terdigetoj, nevideblaj sub la akvosurfaco, senmove staris sur unu piedo longa vico da rozaj flamenegoj. Jen aperis la urbo, rozeblanka en la verda kadro de montoj Zaguan' kaj Bu-Kornin'. Tunizo la blanka, diris la franca verkistino Myriam Harry - Tunizo la verda, laŭ arabaj poetoj.

Baldaŭ min kaptis la sorĉo de tiu bela urbo, precipe de ĝia centra araba kvartalo, la Medina, kun la "suk'oj", stratetoj de vendistoj : suk' de l'kupraĵoj, de la led-aĵoj, de l'parfumoj, ktp. Mi amis promene vagadi en tiu labirinto, meze de la malrapida fluado de senurĝaj pasantoj. Iafoje azenrajdanto postulis liberan vojon per krioj : Bara! (for), balek! (gardu vin). Multaj viroj, malmultaj virinoj. Urbaj sinjorinoj kun blanka kapuĉmantelo, longaj larĝaj pantalonoj, blanka vualo kovranta la frunton, kaj la nigra "litham" kaŝanta la vizaĝon krom la okuloj. Eĉ kelkaj elegantulinoj havis la tutan kapon kovritan per unu maldika vualo, nur por la portantino travidebla.

En la urbaj stratoj renkontiĝis ankaŭ kelkaj Bedueninoj venintaj el siaj kamparaj tendvilaĝoj. Tiuj ĉi, kvankam muzulmanaj, montris ne nur sian nudan vizaĝon ; ilia larĝa blua robo, malstreĉe tenata per rondaj fiboloj, lasis liberaj la brunigitajn brakojn, kaj ofte, glitetante, malkaŝis belan rondan ŝultron ; eĉ iafoje mamon, precipe se ĝi estis june firma.

Foje pasis funebrantaro, la kadavro, sen ĉerko, volvita en bunta tuko, kuŝas sur ŝultroportilo. La irado estas rapida, preskaŭ kiel kuro, kaj la akompanantoj kriegas religiajn frazojn. Kelkaj portas matkorbojn plenajn de sekaj figoj kaj daktiloj, kiujn ili metos teren ĉe la pordo de la tombejo : revene ĉiu akompaninto prenos el ili.

En vendredaj matenoj, kun mia juna kuzo, proksime de la granda moskeo Ez Zituna (la Olivarba), kiu staras meze de la urbo kun sia alta kvadrata minareto ornamita per aĵuraj gipsoskulptaĵoj, ni estis solaj eŭropanoj en la densega svarmo de la bunta amaso eliranta post la diservo. Multaj viroj portis blankan aŭ verdan turbanon volvitan ĉirkaŭ la ruĝa tarbuŝo. Kamelharajn burmusojn apudis neĝoblankaj ĝelaboj de Marokanoj kaj paŝtelkoloraj ganduroj el silko aŭ fajna lano, ĉielbluaj, malvaj, olivverdaj aŭ havanbrunetaj.

Sur la placo Halfaŭina ni gapis al prezento de serpentdresisto, Ajsaŭna-sektano el Kajruano, kiu dancigis danĝerajn najojn laŭ flutmelodio. Ni plezure vagadis sur la fonduk'o, pitoreska bazarplaco, sur kiu vendiĝas ĉiuj manĝovaroj, kaj kie ni vidis kamelojn portantajn daktilojn el sudaj oazoj.

Nin amuzis la spektakla parado de la gvardio en turka uniformo, kun la nigra jako malsupre faldita kiel la blanka jupeto de la grekaj evzonoj, antaŭ la Dar-el-Bej (Bejo-domo), kaj ni admiris la brilajn rajdiistan akompananton de la bejo pasanta en sia kaleŝo.

Ni promenis tra la verdbordaj aleoj de la monteto Belvedero, de kies supro estas videbla la tuta urbo kun sia ĉirkaŭaĵo. Ni vizitis la bejan Bardo-palacon, kie mi admiris la marmor-leonojn kaj la belegajn romiajn mozaikojn. Ni vizitis ankaŭ la situon de Kartago, vaste ruinejo. Apude staras, blanka sur alta kabeto, la malgranda moskeo de Sidi-bu-Said. Tio estas la araba nomo de la franca reĝo Luizo la Naŭa, sanktigita de la

katolika eklezio pro pluraj faktoj, ne ĉiuj aprobindaj*. Provinde du fiaskajn krucmilitojn, li mortis en la dua, pro pesto, antaŭ Tunizo ; tion almenaŭ asertas la oficiala historio. Laŭ araba legendo, li estis kaptita, kaj resanigita de tunizaj kuracistoj ; poste li konvertiĝis al islamismo kaj restis fidela ĝis sia morto, longe poste, kiel mahometana sanktulo.

7

Inter la haveno kaj la pordego de la Medina nomita de la francoj Porte de France kaj de la Araboj Bab-el-Bahar (Pordo de la Maro) etendiĝas larĝa avenuo. Laŭlonge de ĝi, iam mi vidis grandan manifestacion.

La franca oficiala reprezentanto, efektiva reganto sub la nominala estreco de la turkdinastia bejo, revenis de Parizo, kie li subskribis pruntokontrakton. Antaŭ lia kaleŝo marŝis taĉmento de indiĝena infanterio kun klarionoj, fifroj kaj diversaj tamburoj. Post la veturilo, eskorto el rajdantaj gvardianoj. Fine, grandnombra civila akompanantaro, senorda, tamen videble respondanta al organiza intenco.

La Tuniza popolo instinkte simpatiis al siaj religiaj fratoj batalantaj en Tripolitania. La partio de "Junaj-Tunizanoj", progresista-naciista, amiko de la "Junaj-Turkoj" en Konstantinopolo (Istanbul), agitadis kontraŭ la multaj Italioj loĝantaj en la urbo. Ĉekape de la manifestacio marŝis grupo da Junaj-Tunizanoj rekoneblaj per siaj eŭropanaj vestoj kaj per la turka fezo anstataŭanta sur iliaj kapoj la tradicionan tarbuŝon. Unu el ili per eleganta bastono skandis la takton, dum la amaso, unuvoĉe, franclingve kriadis : "Vivu Francio kaj Turkio!" Apud mi, konfuzite, juna Sicilianino naive diris : E niente per l'Italia ?" (kaj nenio por Italio?).

8

Iam, kun amikino de mia onklino, kiu perfekte praktikis la araban lingvon, ni vizitis indiĝenan familion en strato Bab-Suika.

* Aludo, interalie, pri lia sinteno kontraŭ la sudaj herezuloj (Albigensoj, kataristoj).

Nur la virinoj troviĝis en la domo. Komence okazis diskutado en la interna korto por decidi, ĉu ili restu kun senvuala vizaĝo aŭ ne, en ĉeesto de viro (la viro estis mi, dek-dujara!). Ĉar tio estis progresema familio, la konkludo estis jesa. La akceptado estis ege ĝentila kaj afabla, konforme al la araba gastamo. La sinjorinoj regalis min per agrablaj dolĉaĵoj : "rahat-lukum", delikataj kukoj kneditaj kun oleo kaj mielo, kaj bongustega kafo.

Tie estis kvar junulinoj, tre belaj. Perfektaj vizaĝovaloj, fajnaj trajtoj, belformaj pulpaj lipoj, longaj okulharoj, kaj precipe belegaj okuloj.

La plej aĝa, dudekjara, estis juna edzino en vizito ĉe sia gepatra hejmo. Ŝi estis malgaja, ĉar en danĝero esti repudiota de la edzo, tial ke ŝi ankoraŭ ne gravediĝis. La dua, dek-okjara, pro tio flame koleris, kaj malbenis tiun koranan leĝon, kiu subigas la virinojn. Ŝi diris : "Mi volas nur francan edzon!" Kaj, abrupte sin turnante al mi : "Ĉu vi volas edziĝi kun mi?" "Kun mi! kun mi!" petole ekkriis ŝia dek-kvinjara fratino, kaj ni ĉiuj ridis. Escepte de la plej juna, kiu senvorte fiksas sur min la profundan rigardon de siaj larĝaj okuloj. Ĉarma knabino, vere ; sed de tiaj sorĉoj mi estis nevundebla : min gardis la memoro pri Margareta*.

La revena veturado de Tunizo al Marsejlo okazis tute glate, sub absolute pura, serena ĉielo, sur intense blua maro, kvietaj kiel oleo. La tutan tagon kaj parton de la nokto mi pasigis sur la ferdeko, kun peza koro. Mi nostalgie revivadis tiun ravan monaton en la fabela etoso de orienta lando ĉe la norda rando de Afriko. Kaj mi kvazaŭ sentis per antaŭscio, ke neniam mi revenos "trinki el la akvo de Zagan'."

* Vd. en la venonta ĉapitro.

Kiel juna knabo, mi havis inter samseksuloj bonajn kamaradojn, sed ankoraŭ ne amikojn. Veraj profundaj amikecoj estis ligitaj nur poste, en la adoleska periodo.*

Mi pli amikiĝis kun knabinoj. Eble tial, ke mia natura afableco kaj milda karaktero plaĉis al ili - kaj igis min obeema al iliaj fruvirinetaj kapricoj.

Unu el ili estis kuzino, kiun mi ekkonis en mia kvina jaro, kiam mia patrino kaj mi pasigis ferian monaton en la urbeto Florako en Ceveno, kaj loĝis kiel gastoj en la hotelo gvidata de ŝiaj gepatroj.

Ŝi estis mia estonta edzino, sed pri tio ni ne pensis. Nur dek tri jarojn poste ni reciproke enamiĝis. Kunludantino mia, ŝi estis vigla, petolema, rapiddecida. Iom post iom en la sekvantaj jaroj ni trovis plezuron en konversacio, malkovrante inter ni komunajn gustojn, precipe por muziko, pri kiu ŝi havis pli profundan kulturon ol mi. Ŝi pianoludis, kaj kantis per bela sopranvoĉo, kiun mi ĝue admiris. Mi estus aŭskultinta ĝin senfine, senlace. Tiel pasis ravaj periodoj, kiuj naskis kaj profundigis amikecon inter ni. En la intervaloj ĝin konservis diligentata korespondado kaj refreŝigis kelkaj mallongaj renkontoj. Tamen, ĝis la aĝo de dek ses jaroj inkluzive, nek ŝi nek mi imagis, ke niaj reciprokaj sentoj iam fariĝos pli teneraj kaj evoluos al sensa deziro.

Ŝi ofte logis min al fantaziaj entreprenoj, ne ĉiam prosperaj. Iam, en la kvina aŭ sesa jaraĝo, mi, por komplezi al deziro ŝia, iris levi iun rubaĵon, kiu kuŝis meze de malprofunda rivereto. Mi fiere revenis kun la trofeo, sed ankaŭ kun trempitaj ŝuoj kaj ŝtrumpetoj - kaj la akvo estis malvarma.

Tio ne plaĉis al mia patrino. Kiel puno - ĉar mi malamis sieston - mi devis tuj enlitiĝi. Kiam, unu horon poste, la severa patrino venis levi la punon kaj liberigi la kulpulon, ŝi ne povis retenri rideksplodon : sur la rando de la lito sidis la kuzineto kun akvokruĉo kaj granda skatolo da sukerbiskvitoj ŝtelita el la hotela provizejo.

* Vd. "Kontraŭflue".

Aliaj flirtemaj kuzinoj papiliumis ĉirkaŭ mi. Kun ĉiu mi kondukis en afabla detenemo, eĉ se iu logintence riproĉetis, ke mi "ne estas tre galanta".

Mi estis same diskrete afabla kun Violeta, sesjara koketulino, kiu nomis min sia edzeto. Ankaŭ kun blondaj najbarinetoj, Eliza en Arlezo, Laŭrenca en Aleso.

Tiu ĉi mi iam vizitis en proksima vilaĝo, kie ŝi pasigis libertempon. Ŝi atendis min ĉe la stacidomo, en rondo de ridemaj knabinoj, kiuj flustris inter si, flankĵetante al mi subrigardojn; mi aŭdetis mallautan demandon: "Ĉu estas Li?" Mi komprenis: la amikino fanfaronis, ke venos ŝia amindumanto. Por ne ĉagreni ŝin, mi "eniris en la ludon", afektante memfidan mienon de fieruleto, kio tute ne similis al mia funda karaktero. Kredeble mi estis en tiu rolo iom ridinda, sed Laŭrenca estis kontenta, kaj rekompencis min per longa kiso. Tiu komedieto amuzis nin ambaŭ, kaj ni restis, kiel antaŭe, bonaj geamikoj.

La granda aventuro de tiu periodo estis, en mia dekdua jaro, la renkonto kun Margareta.

En tiu somero mia patrino luis por ni ĉambrojn en la monta urbeto Langonjo. Sur la sama etaĝo loĝis ankaŭ tridekjara Arleza sinjorino kun sia fratino, licea instruistino, kaj sia filino samaĝa kiel mi.

Je la unua renkonto la patrinoj eksimpatias, kaj la beleco de la knabino fulmobate trafis min. Tuj min konkeris la bruneta vizaĝo, ĝia pura ovalo en kadro de nigraj bukloj kaj ambaŭflanke pendantaj longaj plektajoj. Sorĉis min la muziko de ŝia rido, klara kiel najtingala trilo, kaj ŝia emocia voĉo, ĵen dolĉe karesa, en la kantanta provenca tono, jen arda, kontraltete vibra. Ŝi amis reciti versojn el tragedioj de Corneille, kiun ŝi aparte ŝatis, sendube laŭ influo de la beletrista onklino. Kiel flame ŝi deklamis la koleran malbenon de Kamila al sia frato Horacio:

"Rom', unika objekto de mia venĝosento!

Rom', al kiu cia brak' buĉoferis mian amanton!"

Mi admiris, sed apenaŭ kuraĝis rigardi ŝin, ne aŭdacis esperi, ke mi povus al ŝi plaĉi. Dum kelkaj tagoj

mi vivis en malgaja pensado, unufoje konsciante, ke mi estas nebela knabo. Tamen, laŭ onidiro, mi havis belajn okulojn (kiu kredus nun pri tio ?) Foje, ŝia juna patrino diris al mi : "Rajmundo, viaj okuloj kaŭzos la pardon de via animo". Tio estis plurajn tagojn poste, kiam la feliĉo de reciproka amo jam briligis mian rigardon : ĉar intertempe la belegaj okuloj de Margareta klare esprimis, ke ŝia inklino respondis al mia.

Ni kune ludis, kiel ĉiuj infanoj, scenetojn bazitajn sur konvenciaj supozoj, kiel : ni "estus" ŝtelistoj kaj vi "estus" ĝendarmoj ; aŭ : vi estus afabla vendistino kaj mi estus riĉa aroganta aĉetantino ; aŭ vi estus la patro, kaj mi la patrino de mia pupo. Sed ŝi elpensis pli originalajn rolojn ; por ekzemplo : "ci estus prostituisto, kaj mi estus leĝermora knabino" !

Ofte la patrinoj lasis nin kunesolaj. Ni kuradis tra arbaroj kaj erikejoj, plukis florojn kaj pininuksojn, kaŝludis inter grandaj arboj, sur kies branĉoj vigletaj sciuroj ŝajnis ŝerce ludi kun ni. Aŭ ni restis longe senmovaj, ĝuante la ĉastan volupton de nia frua amo, pura kaj freŝa kiel printempa mateno. Senpeke erotikaj, ne precize seksaj estis niaj ludoj kaj karesoj. Ni nur sidis kokso ĉe kokso, jen sur kanapo en duonhela ĉambro, jen ekstere sur herbo aŭ musko, dorsapoge al arbotrunko. Mia brako ĉirkaŭpremis ŝian flekseblan talion. Ŝia kapo sin allasis sur mia ŝultro. Niaj buŝoj silentis aŭ murmuretis naivajn amvortojn. Iafoje mi kisis ŝian kolon inter la plektaĵoj, aŭ ŝi mordetis mian oreton.

Tiel pasis por ni pluraj semajnoj, en la "verda paradizo de infanaj amoj".

Unu aŭgustan posttagmezon, ni sidis en grenkampo, kaŝate inter la oraj tigoj, kies plenaj spikoj superis la alton de niaj kapoj. Estis bela somertago, varma kaj seka. Super la lekantoj, cejanoj kaj papavetoj, punkte dissemataj tra la greno, flirtis belkoloraj papilioj kaj zumis diligentaj abeloj. Fore aŭdiĝis la ĝojkanto de sage suprenfluganta alaŭdo, kaj proksime la stridado de akridoj kaj griloj. Ni sentis nin superplene feliĉaj. Ŝi turnis al mi sian ravan vizaĝon, kaj niaj lipoj interrenkontis.

En tiu prudeca epoko, oni ne vidis geamantojn sin kisantajn sur benkoj de publikaj ĝardenoj. Ne ekzistis televido, kaj la grandaj kinoekranoj ankoraŭ ne montris surbuŝajn kisojn en dika bildo. Tian kison ni neniam

vidis, pri ĝi ne aŭdis - ĝi estis por ni vera eltrovo kaj invento.

Tiel drasta estis ĝia efiko al ni ambaŭ, ke ni senparole, salte ekstaris, kaj kuris man-en-mane al la patrinoj. Ili sidis, trankvile interparolante. Ili vidis nin veni kun taŭzitaĵoj haroj, ruĝaj vangoj kaj ekscitoplenaj okuloj. Mia patrino flegme diris : "Nu, karuletoj, de kie vi venas ? Vi ja frenezumis!" De kie ni venis, ho patrino, vi ne povis konjekti ; kaj certe vi ne kredis tiel ĝuste diri.

Post tiu posttagmezo, ni ĉiutage renovigis la agrablengan eksperimenton. Ni fariĝis en kiso-arto tiel spertaj, kiel plenkreskaj geamantoj...

Kiel rapide forflugas la feliĉaj horoj ! Baldaŭ venis la tago de disiĝo. Unuavice foriris mia patrino kaj mi.

Ĉar ni havis grandan pezan kofron, fiakro venis preni nin al la stacidomo. La amikinoj akompanis nin al la veturilo. Margareta singulte plorante ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ mian kolon. Ni interŝanĝis longan kison, sur la vangoj, ĉar la buŝkiso estis nia sekreto. Mi, kiel viro, pene retenis miajn larmojn, sed mi sentis mian gorgon nodita kaj miajn okulojn malsekaj. La patrinoj komplete rigardis al ni. Ili kredeble komprenis, sed nenion diris.

Patrino kaj mi grimpis en la fiakron. La koĉero per vipoklako startigis la ĉevalon. La du starantaj sinjorinoj adiaŭis nin per afabla mangesto. Margareta sin apogis al la flanko de la onklino, kiu milde karesis ŝiajn harojn. Ŝiaj brilaj okuloj fikse sekvis la forkuron de la veturilo. Mi vidis ŝin rapide malgrandiĝi meze de la strato, kaj malaperi ĉe vojturno.

Pasis monatoj. Ni interŝanĝis kelkajn poŝtkartojn. Kion povas esprimi tia nepersona korespondado, kiam la koro estas plena de dolora pasio ? Ĝi maloftiĝis, kaj baldaŭ tute ĉesis.

Neniam okazis nova intervidiĝo. Neniam plu mi aŭdis pri ŝi.

Esperinde ŝi renkontis amon kaj feliĉon. Mi provas imagi, inter aro da adorindaĵoj genepetoj, belan maljunulinon kun afabla faltita vizaĝo en aŭreolo de blankaj haroj... sed vane. Se mi elvokas ŝin, jen magie reformiĝas nur la neta bildo de la dek-unujara amatino, sen-

Ŝanĝe gravurita en mia maljuna koro. Daŭre restas en miaj okuloj la trajtoj de ŝia vizaĝo, en miaj oreloj la sono de ŝia voĉo, sur mia buŝo la tuŝosento kaj la gusto de la freŝaj lipoj.

Ho, Margareta, se vi ankoraŭ vivas, ĉu vi konservis ian memoron pri la benitaj horoj de somero 1911, pri niaj brulaj kisoj, kaj pri la brulaj larmoj, per kiuj ni devis repagi por ili ?

Min koncerne, neniam mi forgesis. Tiu viva memoro gardis min ĝis la dek-sepa jaro kontraŭ ĉiu danĝero pri nova enamiĝo.

Poste venis aliaj amoj, kiujn mi ne malkonfesas. Sinceraj kaj belaj, ili daŭre vivas en mia velkinta koro. Apud ili, kun ili - eble tra ili ? - mi restis fidela al tiu pura sento el la kara infaneco.

En 1910, iuj scienculoj antaŭdiris, ke la renkonto kun la kometo de Halley kaŭzos "mondofinon" t.e. pereon de ĉiuj vivantaj estaĵoj sur la tero. Tiu prognozo inspiris al ĵurnalistoj sensaciajn artikolojn, al la publiko scivolemon, sed ne panikon.

Akurate al la rendevuo, la bela astro aperis en la stelpunktita ĉielo, grandigis de nokto al nokto, en ĉies admiro. Ĝi pasis, foriĝis, estingiĝis, kaj estis baldaŭ forgesita.

Forgesita ankaŭ la tripolitana milito, en kiu venkis Italio. Same la du balkanaj, finitaj en 1912 per la malvenko de Turkio, en 1913 per tiu de Bulgario. Maroko estis pacigita. La minacoj pri konfliktoj inter Germanio kaj Francio estis solvitaj per diplomaciaj aranĝoj. Déroulède kun sia Ligo de l'Patriotoj, Maurras, Daudet kaj la "Camelots du Roi" vane agitadis, predikante "revenĝon" kaj rekonkeron de Alzaco kaj Loreno aneksitaj en 1871 al la germana regno - sed kiu aŭskultis tiujn fantaziajn malsaĝulojn ?

La jaro 1914 komenciĝis sub plej favoraj aŭspicioj. Sub serena ĉielo, la mondo vivis en paco, en agrabla sento pri sekureco, en plena konfido pri neinvertigbla progresado, en komforto kaj prospero.

Ĉu do idilia periodo, la t.n. "Bela Epoko" ? Ho! certe ne.

Sendube ĉiu maljunulo emas ornami per brilaj koloroj la "bonan malnovan tempon" de sia juneco. Ni evitu fali en tiun manion.

Mi ja memoras. Komforto kaj prospero ? Nu, tre relativaj, se kompari kun la nuna meza vivnivelo en la okcidentaj landoj. Eĉ en okcidento, multaj kampaj kaj urbaj laboristoj baraktadis en vera mizero. Sekureco ? ankaŭ relativa, kaj fragila. Ne ekzistis socia asekuro. Al proletoj malsano kaj maljuneco estis objektoj de zorgo kaj timo, kaj striko estis vera dramo por laboristaj familioj.

Sed la homoj spiradis puran aeron, trinkadis nepoluitan akvon kaj nefalsitan vinon, manĝadis sanajn terproduktojn. Ili pene laboradis, en pli longaj labortagoj, sed ne en nervostreĉa tremvibrado, kaj sen konstanta timo pri senlaboreco : ĉiu sana plenkreskulo estis certa, ke al li ne mankos okupo kaj salajro. La vivokosto komencis plialtiĝi, sed oni ne devis lace kuradi por kontentigi artefaritajn bezonojn, daŭre kreskantajn. La proletaro konsciis, ke per klasbatalo, iom post iom, ĝi elŝiras plibonigojn al sia sorto, elmergiĝas el mizero, kaj ĝi esperis pri pli grandaj venkoj en estonteco. La Internacio estis entuziasme kantata.

Plenaĝuloj kaj infanoj, ĉiuj estis gajaj. Viroj kaj virinoj kantis laborante. Kvankam ne facile, oni vivis sen pezaj zorgoj.

La popolanoj diskutadis pri bagateloj, frivolaĵoj : mondumaj skandaletoj, originalaj modnovaĵoj, kiel bridjupo, ingorobo, kulotjupo. Gajaj operetoj : La Ĝoja Vidvino, Valso-Revo, altiradis al teatroj amasajn spektantarojn. Furoris tango importita el Sudameriko. La homoj pasiĝis pri aviado, "kiu forstrekis la landlimojn". Neniam pli floris fido pri tutmonda konkordo.

En la feliĉa etoso de tiu benita jaro, la esperantistaro vivis en fervora atendo pri la Dekaj Universala Kongreso. En ĝoja febro la Pariza OKK preparis grandiozan akcepton al pli ol trimil gesamideanoj kunvenontaj ĉirkaŭ la kara majstro Zamenhof. La kongreso estis malfermata en la 2a de aŭgusto.

Miaj gepatroj decidis, ke ni triope partoprenos en tiu senantaŭaĵa evento, kune kun pluraj aliaj membroj de nia klubo, l'Espero Alesa. Tio estus mia unua vojaĝo al Parizo. Mi brulis en senpacienco ekkoni la fabelan mondurbon, renkonti alilandajn kunparolantojn en la lingvo internacia, kaj vidi la respektigatan, amatan Majstron.

Venis belega, varmega somero. Ĉiutage, blindiga suno brilis en la pura lazuro. Ĉiu sentis sin bonstata, ĝoja, feliĉa.

Subite aŭdiĝis el oriento surda tondro-gruntego. La 28an de junio, en Sarajevo, estis murditaj arkiduko Franc-Ferdinando kaj lia edzino.

Tuj ekamasigis nuboj, pli kaj pli nigraj. Ultimato de Aŭstri-Hungario al Serbio, avertoj, minacoj, provokoj de Rusio, de Germanio, de Francio. Intensa aktiveco en ĉiuj eŭropaj ambasadoj kaj kancelarioj.

Kelkiuj komencis paroli pri ebla milito inter la grandaj regnoj ; tamen la plimulto ne kredis pri tiu ebleco. La plej pesimistaj asertis : "Pro la terura efikeco de la moderna peza artilerio, tia milito apenaŭ povus daŭri du semajnojn!". Sed, laŭ ĝenerala optimisma fido, la pacamo de la popoloj ne permesos perarmilan konflikton.

Kelkajn monatojn antaŭe, la franca opinio estis ne-multe atentinta pri hasta vizito de prezidento Poincaré al caro Nikolao en Kronstato. Nun kelkaj pli klarvidaj personoj komencis pensi, ke eble ne ĉiuj regnestroj kaj registoj sincere deziras gardi pacon.

Dum iuj anglaj diplomatoj multobligis klopodojn por bremsi la iom-post-ioman venenadon de la oficialaj internaciaj rilatoj, pacistaj kaj kontraŭmilitaristaj fortoj strebis organizi eventualan rezistadon. Germanaj kaj francaj socialistoj interfratumis en grandiozaj mitingoj. Sindikataj gvidantoj memfide proklamis : "Se krimuloj ordonus mobilizadon, ni respondus per obe-rifuzo kaj ĝenerala striko." En tiu koncerto elstare sonis la granda voĉo de Jaurès.

Dume, la jam startigita infera maŝino, kiel taŭge lubrikita mekanismo, en rigora reguleco, senkompate, ne-kontraŭstareble daŭrigis sian akceliĝantan ŝtupgrimpadon. En la daŭro de tuta monato ĝi fariĝis pli kaj pli preciza, pli kaj pli potenca, pli kaj pli rapida.

La 1an de aŭgusto samtempe ekkrakegis du tondraj novaĵoj :

- Hieraŭ vespere Jaurès falis mortpafite de fanatika naciisto.
- Hodiaŭ matene la registaro dekretis ĝeneralan mobilizadon. La ludkuboj estis ĵetitaj.

Jen eksonis sur la strato la malbonaŭgura klariono. En peza silento aŭdiĝas la voĉo de urba anoncisto :

"La unua tago de l'mobilizado estos dimanĉo 2a de aŭgusto..."

Mia patro, kvazaŭ freneza, eksaltas al la malfermita fenestro kaj krias :

"Murdistoj!! MURDISTOJ!!!"

Voĉo krianta en dezerto : ĉar al la oreloj de la amaso, surdigitaj per ebriiga bruego, estis neeble aŭdi ĝin. Unuopa, malforta voĉo, kiel ĝi povus konkuri kun la muĝado de la ondego, kiu nerezisteble levas tutan polon en patriotisma deliro ? En unu tago tiu ondego forbalaos ĉiun kontraŭstaron, ĉiun dubon aŭ heziton. Tian kolektivian psikozon oni neniam revidos.

En tiu preciza momento forpasis historia epoko. Levigas la ruĝa kurteno sur la scenejo de la aĉa tragedio, kiu dum pli ol kvar jaroj mergos Eŭropon en sangobanon.

En tiu tago komenciĝis por la homaro nova erao de maltrankvilo kaj suferoj.

En tiu jaro finiĝis mia kara infaneco.

EPILOGO.

Mi refermas tiun ĉi kajeron, kiel oni refermas kofreteton, en kiu dormas malnovaj leteroj, rubandoj, harbukloj - vantetaj memoraĵoj. Kiel oni remetas kovran ŝtonon sur momente malfermitan tombon.

Jen noktiĝas. Ĉirkaŭ mi ankoraŭ ŝvebas kelkaj amataj fantomoj : maljunaj homoj, plenkreskuloj, infanoj, amikaj bestoj. Kaj pluraj knabetoj de diversaj aĝoj, inter si malsamaj kaj tamen similaj. Ili havas la saman nomon - la saman kiel mi. Ili similas al mi, kvazaŭ ili estus miaj filoj aŭ nepoj.

Responde al mia voko, ĉiuj tiuj fantomoj revenis el la nekonata lando de eterneco. Por kelkaj horoj ekster la pasanta tempo, ili reprenis korpan figuron. Mi vidis iliajn okulojn ridetantajn aŭ malgajajn. Mi aŭdis iliajn voĉojn. Palpis iliajn manojn kaj vizaĝojn. Sentis ĉirkaŭ mi, en mi, ilian varman ĉeeston.

Jen ili denove forsvenas en la nebulo de forgeso...

Ripozu en paco, karaj miaj.

Nun mi scias, ke vi daŭre vivas en mi, tiel longe, kiel plu daŭros mia propra vivo.

Kaj ke mi povos laŭvole reelvoki kaj reanimi vin per la sorĉo de rememoro

el la kara infaneco.

GLOSARO

1 - Komunaj vortoj

- adoleski : esti en tiu vivperiodo, kiu venas post la infanaĝo, kaj estas karakterizita per la ekfunkciado de la seksaj glandoj (PIV).
- akvedukto : masona kondukilo subtera aŭ surponta, destinita transporti akvon de unu loko (rivero, fonto ks) al alia malproksima (PIV).
- apreci aŭ aprezi : kompetente taksi la artan valoron de io (PIV).
- arbuto : frukto de --ujo, daŭrafolia arbo (de la g. Arbutus L.) el erikacoj (...); veruka manĝebla frukto (PIV), ruĝa; fr. arboise.
- bridjupo, aŭ piedliga jupo, fr. jupe entravée : longa jupo kun laĉaĵo antaŭ la piedartikoj, kiu ĝenis la marŝadon, permesante nur tre mallongajn paŝojn (efemera modo en j. 1912 aŭ 1913).
- brutala : havanta la karakteron de --o (krudaĉa, perfortema, kruela homo (PIV)).
- bureo : fr. bourrée : tradicia danco en pluraj provincoj de la franca Centra Montaro, kun takto forte markata per kalkanfrapoj (G. Waringhien, Grand Dictionnaire esp.fr.).
- devota : sindoneme, fervore pia (PIV).
- ekumena : celanta al unuiĝo de la kristanaj eklezioj (PIV,2).
- evzono aŭ eŭgono : greka infanteriano en tradicia kostumo.
- fantasmo : fr. phantasme : sonĝa aŭ halucina bildo.
- felibro : poeto provenclingva, aŭ, pli ĝenerale okcitana.
- fibolo (PIV,1) = fibulo 2 (PV).
- fragila : malfortika, facile rompebla, rompiĝema (PIV).
- ganduro : arab. gandura : malstrikta vesto simila al robo sen manikoj, aŭ kun larĝaj mallongaj manikoj.
- garigo : fr. garrigue : veprejo sur monteto, malpli densa makiso, en Provenco kaj precipe Langvedoko.
- ĝelabo : arab. ĝellaba : longa bluzo kun kapuĉo el blanka lanaĵo.
- havanbruneta : hele kaŝtankolora, kiel havanaj cigaroj.
- homereca : en la stilo de Homero, helena plej granda epopeisto (PIV).

hugenoto : franca kalvinisto (PIV).

kamizaro : Cevena ribelanta kalvinisto (PIV), ĉ. 1700.

karbonaro : ano de --ismo, sekreta societo, fondita en Italio en la 19a j.c. por triumfo de liberalismo. (PIV).

komputero : tiu elektronika aŭtomato, regata per programo, kiu efektivas instrukciojn por la operaciado de donitaĵoj aŭ informoj (PIV).

kontraŭmilitarista (PIV), vd. militaristo.

leĝera : malserioza, senprofunda :-a virino (PIV,2).

matadoro : homo, kies profesio estas mortigi per spado taŭron en taŭrludoj (PIV,1).

militaristo : tiu, kiu inklinas al la uzado de militaj rimedoj por solvi ĉiujn demandojn (PIV).

mitraismo : la religio de Mitrao, genio en la mazdaismo, fariĝinta ĉ. la unuaj j.c. a.K. la dio de misterreligio, kiu forte rivalis la kristanismon (PIV).

nekropolo : granda subtera tombejo ĉe antikvaj popoloj (PIV) ĉi tie uzata en pli larĝa senco = tombejo.

okcitana : nomepiteto, difinanta la tuton de la sudfrancaj dialektoj (provenca, gaskona, k.a.) kaj la literaturon verkitan per ili. --o : loĝanto de Okcitanio, la teritorio de la --a dialektaro.

parieto : interna surfaco de cilindro, vazo, tubo aŭ alispeca objekto (PIV).

pobo : (PIV) = poŭpo (PV).

polui : malpurigi vivesencan elementon, kiu fariĝas mal-saniga por la uzantoj ; Poluado (Neergaard) = polucio (PIV,2).

rako : ingo por pluraj samspecaj objektoj (Vd PIV,2, kun la ekzemplo : -- por pipoj).

sekvenco : serio da bildoj aŭ scenoj formanta kunaĵon (PIV).

sketi : gliti,2 : antaŭeniĝi sur glata surfaco konservante sian ekvilibron. Sketado, rulsketilo (PIV).

strida : akre, orelŝire sibla. --i : eligi --an sonon (PIV).

tarbuŝo : arab. tarbuŝ' : ĉapo el ruĝa drapo kun dika pendanta kvasto el nigra silko, portata sole aŭ envolvite en turbano. Ĝi distingiĝas disde la cilindra "ŝeŝia" kaj de la fezo (ĉi tiu en formo de renversita florpoto, (PIV) per tio, ke ĝi estas malpli alta kaj en formo de cilindro kun proksimume duonsfera fundo.

verda-kverko : ileks-kverko (*Quercus ilex* L.) (PIV).

2 - Fremdaj vortoj.

aficionado, hisp. pr. proks. aficionado : fervora amatoro de taŭroludoj.

ajsaŝa, arab. : ano de la mahometana sekto de Sidi-ben-Ajsa'

corrida de muerte, hisp. pr. proks. korrida de mŭerte, laŭvorte morto-kurado : taŭroludo finiĝanta pĕr mortigo de taŭroj.

hold-up, angl. pr. proks. holdap : atako far armita bando por priŝteli bankon, oficejon, trajnon ks.

litham, arab. : nigra aŭ blanka vualo, kiu kaŝas la mal-supran parton de la vizaĝo.

oppidum, lat. ĉirkaŭremparo sur altaĵo.

rahat-lukum, arab. aŭ turk. : orienta sukeraĵo farita el fekula pasto parfumita per fruktosuko.

toreros, hisp. : toreadoroj, taŭristoj.

tab, angl., pr. proks. tab : plata ronda pelvo por duŝoj.

3 - Propraj nomoj esperantigitaj.

Aleso, fr. Alès : urbo, 40 km N W de Nimo.

Anduzo, fr. Anduze : urbeto, 10 km SW de Aleso.

Alzaco, fr. Alsace, aŭ Elzaco, germ. Elsass (PIV).

Arlezo, fr. Arles : urbo en Suda Francujo, 4°38'E, 43°40'N (PIV).

Avinjono : urbo en Suda Francujo, ĉe Rodano 4°48'E, 43°57'N (PIV).

Banjolo, fr. Bagnols-sur-Cèze : urbeto 50 km E de Aleso.

Bastilo : Pariza fortreso kaj malliberejo, detruita de la unua Revolucio la 14an de julio 1789 (PIV).

Bedueno : ano el nomada araba gento (PIV).

Ceveno(j) : sudorienta rando de la franca Centra Montaro (PIV).

Diĵono : urbo en Francujo, 5°03'E, 47°19'N (PIV).

Eldorado : utopia lando, kie oro tiel abundas, ke ĝi ne havas valoron (PIV).

Fortuna (PIV,2) : Roma diino de la fortuno (= fortuno 1, PV).

Gallo-Romano : loĝanto de Gallujo alpreninta la lingvon kaj la morojn de la Romanoj. Transalpa Gallujo : proksimume la nuna Francujo (PIV).

Gevodanio, fr. Gévaudan : altebena kaj monta regiono
NW de Ceveno.

Julo : nomo de antikva pagana festo en Nord-Eŭropo,
poste anstataŭigita per Kristnasko kaj sekve ofte
uzata en tiuj landoj por ĉi tiu festo (PIV). De
Skandinavio la nomo nun disvastiĝas en tutan Espe-
rantion.

Kajeno, fr. Cayenne : ĉefurbo de franca Gvajanio,
52°21'W, 4°55'N - (PIV).

Kajruano : sankta urbo en Tunizio.

Kamargo, fr. Camargue (G. Waringhien, Grand Dict. Esp.
Franc.) La deltinsulo de Rodano.

Kebeko : ĉefurbo de --io, franclingva provinco de
Kanado (PIV).

Konstantinopolo (PIV), nun Istambulo.

Kraŭo, fr. Crau : ebenaĵo oriente de Kamargo (maldeks-
traborde de Rodano).

Kronstato (Cronstadt) : insulo kaj militmara bazo ĉe la
Finlanda Golfo, W de Leningrado.

Kurjero, fr. Courrières : urbeto en la nordfrancia kar-
bomina regiono.

Langvedoko : regiono en la sua Francujo, ĉirkaŭ Tuluzo
kaj Montpeliero (PIV).

Loreno : franca provinco kaj regiono (PIV) ; fr. Lorraine
germ. Lothringen.

Luizo : franca, itala kaj hispana virnomo, i.a. de pluraj
reĝoj (PIV). La plej ofta el la francaj formoj de
Ludoviko.

Luiziano : unu el la ŝtatoj de Usono, ĉe la Meksika gol-
fo, nomita laŭ Luizo la 14a (PIV).

Maniko : la Kanalo de Atlantiko, inter Francujo kaj An-
glujo (PIV) ; fr. La Manche, angl. The Channel.

Martigo, fr. Martigues : haveno ĉe la Berre-lageto, W de
Marsejlo.

Mirejo, fr. Mireille, prov. Mirèio : heroĥno de samnoma
poemo en 12 kantoj de F. Mistral. La 3 unuaj kantoj
estas esperantigitaj de P. Champion kaj Dro Noël.

Montpeliero : franca urbo, 3°52'E, 43°36'N (PIV).

Nimo aŭ Nimeso (PIV) : franca urbo, 4°21'E, 51°51'N.

Nioba : filino de Tantalo, naskinta sep filojn kaj sep
filinojn, ĉiujn sagmortigitajn de Apolono (PIV).

Novlando = Tero Nova : nordamerika insulo, ĉe la elfluejo
de Sankta-Laŭrenco, prezentanta le dekan provincon de
Kanado (PIV).

Nov-Orleano : havenurbo en Usono, 89°57'W, 29°57'N (PIV),
 (ĉe "nova" kaj ĉe "Orleano") naskiĝejo de la ĵazo.

Pasteŭro (Luizo) : franca kemiisto kaj biologo, fama pro siaj studoj pri la mikroboj (1822-1895) (PIV).

Petersburgo, poste nomita Petrogrado, nun Leningrado.

Provenco : malnova franca provinco, inter Rodano, Alpoj kaj Mediteraneo (PIV).

Rabelezo : franca kuracisto kaj humanisto, aŭtoro de komikaj romanoj (1494-1553) (PIV).
rabeleza : prezentanta superabundan fantazion, riĉegan vorttrezoron kaj krudajn ŝercojn aŭ satiraĵojn, laŭ la maniero de R-o (PIV).

Rodano : Svis-franca rivero, enfluanta en la Mediteraneon (PIV).

San(kta)-Stefano, fr. Saint-Etienne : ĉefurbo de karbomina kaj metalindustria regiono, W de Liono ; loĝantoj : Stefananoj.

Sankta Eliĝo, fr. Saint-Eloi : oraĵisto, ĉeftrezoristo de reĝo Dagoberto (ĉ. 588-660).

Saraceno : ĝenerala nomo, kiun la mezepokaj Grekoj kaj Romianoj donis al la Araboj de Proksim-Oriento (PIV).

Sardinio aŭ Sardlando : insulo de Italujo, sude de Korsikujo (PIV).

Sedano, fr. Sedan : urbo en franca Ardeno, ĉe Mozo. Tie, en 1870, kapitulacis Napoleono IIIa.

Sejno : la rivero, kiu trafluas Parizon (PIV).

Stentoro : heroo en la Troja milito, rimarkinda pro sia fortega voĉo (PIV).

Ŝopeno Frederiko : franchevena pola pianisto kaj komponisto (1810-1849) = Chopin (PIV).

Taraskono, fr. Tarascon : urbo ĉe Rodano, 15 km N de Arlezo.

Tero Nova = Novlando, fr. Terre-Neuve, angle Newfoundland (Vd. ĉi-supre).

Uzes, fr. Uzès : urbo, 20 km N de Nimo, 30 km SE de Aleso.

ĈEFEC-ŝlosilo estas elementa broŝureto tre fama antaŭ 1914. E.Ĉefec estas fonetika transskribo de la angla prononco de la komencliteroj de la aŭtoronomo, angla : H.F.H. (eĉ-ef-eĉ).

4 - Propraj nomoj ne esperantigitaj
(kun proksimuma prononco)

Belfort (belfor') : urbo en neaneksita Alzaco.

Blériot (blerjo') : fama aviadisto, kiu unua transflugis Manikon.

Cagliari (kaljari) : haveno en Sardinio.

Camelots du Roi (Kamlo' dü rŭa), laŭvorte stratkolportistoj de la reĝo. Tiel sin nomis la naciistaj rojalistaj militantoj, asocioj de l'Action Française (Franca Agado).

Clair René (Renato Kler) : aŭtoro de kinfilmoj, membro de la Franca Akademio.

Corneille Pierre (Petro Kornej') : franca poeto, aŭtoro de klasikaj tragedioj kaj tragikomedioj (1606-1684).

Daudet Léon (Leono Dode') : kuracisto kaj verkisto, filo de la verkisto Alphonse Daudet ; polemikisto, fondinto kun Maurras de l'Action Française en 1908.

Davy (sir Humphrey) (Devi) : angla kemiisto, inventinto de la elektra arko kaj de sekura lampo por karboministoj (1775-1829).

Déroulède Paul (Paŭlo Deruled') : poeto kaj politikisto, aŭtoro de Kantoj de l'Soldato.

Farman Maŭrico kaj Henriko, fratoj : francaj, de angla deveno, pioniroj de aviado.

Faure Sébastien (Sebastiano For) : fama anarkiista oratoro kaj verkisto.

Garibaldi Giuseppe (Jozefo) : itala patrioto, batalinta por la unuecigo de Italio kaj por aliaj aferoj en Sud-Ameriko kaj Francio. Veninte helpe al la 3a Respubliko, li efektive venkis germanan trupon en la Diĵon-batalo (1807-1882).

Goya Francisco (Francisko Goja) : fama hispana pentristo (1746-1828).

Hemingway Ernest Miller (Heminguej) : usona verkisto, Nobel-premio de literaturo 1954 (1898-1961).

Ibañez Blasco (Blasko Ibanjes) : hispana verkisto (1867-1928).

Jaurès Jean (Johano Ĵores') : granda oratoro socialista kaj pacifista (1859-1914).

Lippi Filippo : florenca pentristo, majstro de Botticelli, aŭtoro i.a. de "la Virgino kun la infano kaj du anĝeloj" en la Uffizi-Muzeo (ĉ. 1406-1469).

Maurras Charles (Karlo Moras') : historiisto, filozofo, beletristo kaj polemikisto, direktoro de la rojal-ista gazeto l'Action Française ; rigardebla kiel antaŭtempa teoriisto de faŝismo.

Melville Hermann (Melvil) : usona maristo kaj verkisto, aŭtoro de romanoj mondfamaj (1819-1891).

Mirbeau Octave (Oktavo Mirbo') : verkisto de anarkiista tendenco, aŭtoro de romanoj kaj komedioj (1848-1917).

Mistral Frederi (Frederiko) : provenca poeto, Nobel-premio de literaturo 1904 (1830-1914).

Moby Dick (Mobi Dik) aŭ la Blanka Baleno : tre fama romano de Melville, 1851.

Montherlant (Henri de) (Henriko de Monterlan') : franca verkisto, aŭtoro de teatraĵoj kaj romanoj (1896-1973).

Picasso Pablo (Paŭlo Pikaso) : la plej fama el la modernaj pentristoj (1881-1973).

Richelieu (Riŝliö') : kardinalo, ĉefministro de reĝo Luizo XIIIa (1585-1642).

Rousseau Jean-Jacques (Johan-Jakobo Ruso') : francalingva verkisto kaj filozofo, kies verkoj preparis en la spiritoj la grandajn politikajn ŝanĝojn de la Unua Revolucio (1712-1778).

Saintes-Maries-de-la-Mer (Sent'Mari'dla'mer) Sanktaj Mariaj de la Maro : havenurbeto en Kamargo. Tie, laŭ legendo, albordiĝis boato, kiu transportis de Palestino la tri Mariajn : Magdalena, Jakobea, kaj Salomea, kun ilia servistino Sara kaj pluraj aliaj gesanktuloj. Magdalena retiriĝis en Provenca ermitejo, la du aliaj fondis la urbeton, kiu fariĝis loko de pilgrimado.

Santos-Dumont (Dümon') : brazila inĝeniero, pioniro de aerveturado per direkteblaj balonoj kaj aeroplanoj (1873-1922).

Typee (Tajpi') : romano de H. Melville pri aventuroj en insulo kun kanibaloj.

Vénus d'Arles (Venüs d'Arl), Venuso Arleza : antikva statuo el marmoro, elfosita en Arlezo, donacita al reĝo Luiza XIVa, nun en la Louvre-muzeo en Parizo.

Wright Orville kaj Wilbur (Orvil kaj Ŭilbr' Rajt) : usonaj fratoj, pioniroj de aviado.

TABELO DE ENHAVO

Prologo	... 7
I - Avoj kaj avinoj.	... 7
II - Arlezo-ĉe-Rodano	... 24
III - Gepatroj	... 30
IV - Onklo el Ameriko	... 42
V - Kompano Klaŭdius	... 47
VI - Mia urbo	... 51
VII - Fremdaj tipoj	... 58
VIII - Lernanto kaj lernejoj	... 62
IX - Knabeto en ĉambro kaj buboj sur strato	... 65
X - Sporto kaj arto, plezuroj kaj revoj	... 71
XI - Tra montoj kaj valoj	... 77
XII - Amikinoj en la rondo	... 87
XIII - La kataklismo	... 92
Epilogo	... 96
Glosaro	... 97

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laŭte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1983 * 12 FF